


*Palaco
de
Danjero*

*Mabel
Wagnallo*



Mabel Wagnalls
Palaco de Dançero

Robert Wagner
Palace de Langens

MABEL WAGNALLS

PALACO DE DANĜERO

Rakonto pri Madame la Pompadour

Tradukis el la angla originalo

Edward S. Payson

Honora Prezidanto de la Esperanto Asocio
de Nordameriko



FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1926

ESPERANTO-FAKO



1910.
CIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ
COPYRIGHT 1926 BY FERDINAND HIRT & SOHN
MADE IN GERMANY



821.111(73) - 312.6 Pompeoburg
= 822

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

TABELO DE ENHAVO

Ĉapitro	Paĝo
I „Benedicite“	7
II Brodita Teksaĵo de l' Sorto	18
III Mortvundanta Ŝerco	23
IV Danĝera Personigado	33
V En la Landon de Silento	37
VI Okazaĵo ĉe Sankta Cyr	51
VII Kanto de Fido kaj Rikano de Dubo	56
VIII Multe da Bruo pri Nenio	64
IX La Pompadour Frakasas Vazon	70
X La Fantomo Ĝemas en la Ĝardeno.	79
XI La Nimbo de la Pompadour	84
XII Du Lumoj en Bellevue	91
XIII Kiam Madame Pompadour Iris al Parizo	99
XIV „Mi, la Reĝo, Parolis“	104
XV La Krono Pikas la Reĝan Kapon	108
XVI Animo Esploras Sin	111
XVII Festo en Bellevue	115
XVIII La Muroj Havas Langojn	120
XIX Ĝustatempe	135
XX La Ombro de la Bastille	141
XXI Konfeso en Arbaro	148
XXII Ĉambro sen Dio	152
XXIII Konflikto de Interesoj ĉe la Pordo de l'Morto	159
XXIV La Rado de l' Sorto turniĝas	163
XXV Reĝo Povas Ordoni, Virino Povas Malobei	169
XXVI Se Mi Estus Reĝo	175
XXVII La Teruro de Nokto	179
XXVIII Sub Matena Ĉielo.	186
XXIX Kelkaj Impresoj pri Palaco	195
XXX Talismano Miregata	199
Historiaj Notoj	204

NOTO DE LA AUTORO.

Konforme al la libereco, kiun *Horace Walpole*, *John Morley* kaj aliaj kelkfoje uzis en siaj verkoj pri *Madame de Pompadour*, la prefikso „de“ rilate al ŝia nomo estas ofte forigita en ĉi tiu rakonto. La pli mallonga formo falas pli ritme, en la rapidan agadon de fikcio.

Mabel Wagnalls.

Ĉ A P I T R O * I

„BENEDICITE“*)

Versailles jam komencis vekigi kaj malvolvi siajn laborantajn tentaklojn. La kamentubisto, fumnigrita kaj malpura, eliĝis kun siaj balailo kaj ŝtupetaro; la kapristo, fajfante sian trinotan arion, venis pelante sian aron antaŭ si; la bruano ĉaron de la karbovendisto oni povis aŭdi de malproksime; la lavistino kun sia korbo plena de tolaĵo estis survoje al la rivero.

Flirtanta flava papero, mallerte presita kaj rapideme najletita kontraŭ muro sur strato Sta. Martin, allogis la atenton de la pangajnantoj. Amaso grade kolektiĝis antaŭ ĝi; scivola, gorĝridanta mokema amaso, ĉar nova afiŝo verŝajne valorus la legadon kaj sendube enhavus ion mokan, celitan al la kortego aŭ la reĝo.

Ĉi tiu pamfleto, kvankam malpli pikanta ol aliaj, ne estis sensignifa. Ĝi komencis kun la dato, ellaboreme verkita:

En ĉi tiu jaro de nia Beata Sinjoro,

1756.

Post tio:

Je la naskiĝo de Jesuo estis

Ĉe l' kortego granda agitado,

Kaj Louis per kaleŝo iris

Al Pompadour sen hezitado.

Diris li: „Ni iru, por vidi la infanon.“

Diris ŝi: „Ne, tute ne! Oni alportu ĉi tien la infanon;

Ĉar neniam mi eliras pro vizito.“

*) Latina vorto = laŭdu (scil. dion)!

Jen, ĉio tio ĉi okazis en la koro de Versailles kaj ne malproksime de la pordegoj de la palaco de Louis. Tio montris la arogantecon de la anonimaj rimaĉantoj kaj de la homoj, kiuj legis ilian verkon¹.

La flava papero sur la muro amuzadis ĉiun preterpasanton. Riskema junulo, pro subita inspiro, skribaĉis alian strofon:

„Krom tio“, ŝi aldonis kun ĝemeto,
„La societo de Jesuo,
Estos al ni konstanta dorneto!“

Ĉi tiu vortludo, aludanta al la bone konata malamo de Madame Pompadour kontraŭ la jezuitoj, alie nomitaj la „Societo de Jesuo“, estis ricevata kun koraj ridegoj de ĉiuj, kiuj legis la riskeman krajonon de la skribaĉantoj.

Ĉiu novevenanto faris ian komenton.

„Ha! — nova papera pilolo, kiun la *Poissonière*² devos engluti! Akra osteto por sufoki ŝin.“

Ĉe la kortego ŝi estis la „*Grande Marquise*“, antaŭ kiu riverencis dukoj kaj sinjorinoj; ŝia favoro estis pli dezirinda ol tiu de la reĝino. La Favoratino de Louis estis potenca en la regno. Ĉu Voltaire mem ne tre serioze asertis, kiel bona civitano de Francujo, ke li sentis sin devigata, fari honoron al Madame de Pompadour?

Sed la pariza popolamaso kaj provincaj kamparanoj konsideris sin liberaj, malestimi ŝian nomon, moki pri ŝia humila deveno, kaj sibli kaj ĝemi, kiam ajn ili vidis ŝin preterveturi en ŝia kvarĉevala kaleŝego.

„La aĉulino! Ŝi rajte devus veturi en bovĉaro!“ laŭte ekkriis per akresona voĉo ruĝvizaĝa virino, kiu skuis sian fortan pugnon antaŭ la nomo de la Pompadour,

¹, ², ³ ktp: rilatas al la historiaj notoj en la fino de la libro.

dum ŝi legis la liniojn sur la muro: „Per beleta vizaĝo ŝi fiŝis por havigi al si riĉan edzon; per riĉa edzo ŝi fiŝis por kapti la reĝon; per la reĝo ŝi nun fiŝas por gajni regnon — la — la ...“ Tion la virino aldonis, ĉar la Pompadour lastatempe estis enŝovinta la fingron en mondan politikon, incitante traktatojn kun Aŭstrujo kaj tiel plu.

Alia rigardanto, kies metio estis montrata de leda antaŭtuko kaj la vaksitaj, nigraj fadenoj ĉirkaŭ lia kolo, opiniis, ke la ritmoj farus bonan kanton kaj tuj sulkumis la nerazitajn lipojn kaj fajfis arion, kiu ŝajne taŭgis por la vortoj. Tiam la gaja botriparisto formarŝis, kantante la rekantaĵon survoje.

Pli poste la homoj, kiuj kolektiĝis antaŭ la flava afiŝo, estis pli diversaj. Lakeoj el la palaco, sinjorinoj en portseĝoj, negocistoj el Parizo, sinjoroj sur ĉevaloj, ĉiuj haltis, ekvidante la mokaĵon, tiam ili mem legis ĝin aŭ ordonis, ke iliaj servistoj ripetu ĝin al ili. Eĉ monaĥo kun pia mieno ne sentis sin tro altanima, por malkaŝi karnan scivolemon, dum li preterpasis.

Je la horo kiam la suno faris mallongajn ombrojn, juna rajdanto alproksimiĝis nerapide kun sia kapo kurage ekvilibrata, obstina kliniĝo de sia galonita ĉapelo kaj kun agrabla rideto sur la lipoj. Pro lia vestaĵo, lia sintenado kaj la direkto de kie li venis, estis klare, ke li apartenis al la palaco. Vidiĝis io alloga en lia senĝena mieno, dum li gvidis sian riĉe ornamvestitan ĉevalon.

Vidante la elstaran afiŝon li haltigis la ĉevalon, tiam senzorge etendis sin de la selo kaj platigis la flirtantan folion per la glavo. Sed lia frunto subite ombriĝis kaj liaj lipoj fariĝis streĉitaj pro kolero, kiam li eltrovis, ke Madame Pompadour estis la temo de la ŝerco. Li glitigis la glavon sub la afiŝon kaj per unu rapida movo

deŝiris ĝin kaj ĝin ĵetis al la ventoj. Tiam li tintigis laŭte sian glavon en la glaŭvingon kaj forrajdis el la urbo al la arbaro de Bouviers.

La okazaĵo estis tipa por la naturo de la juna, bela, impulsema junulo. Li ridis, kiam aliaj nur ridetis, riverencis, kiam aliaj balancis la kapon, eltiris la glavon, kie aliaj levetis la ŝultrojn. Liaj arkajaj brovoj pensigis pri aroganteco, la pinta mentono montris la amanton, liaj okuloj — ha nu! — sufiĉe estas diri, ke ili povus fari sian propran laboron. Li estis riĉa, nobela, sola kaj libera por agi, kiel plaĉis al li. Kion pli li povus deziri je la aĝo de dudekkvin?

Dum li rajdis en la arbaro, lia menso estis videble trankviligita de la mola efiko de ombro post la flava brilego de la larĝa vojo.

Forsendante la kalumnian strofon el siaj pensoj, li cedis sin al la ĝuado de la paca oktobra tago. Malmultaj sonoj aŭdiĝis krom la knaro de la selo kaj la hufbatoj de lia altpaŝanta ĉevalo. Laodoro de l' aŭtuno estis en la aero, de mortintaj folioj kaj malsekaj muskoj revarmigataj de sunaj radioj.

La rajdanto enspiris longan spiron, rimarkante laŭkutime la kontraston de siaj sentoj en la arbaro kun tiuj, kiujn li havis, kiam li estis devigata riverenci kaj pozii antaŭ la reĝo pro la postuloj de sia ofico kiel „*Introduceur des Ambassadeurs*“).

„Vi sentas same, ankaŭ, estas pli facile marŝi ekstere de Versailles ol en ĝi, ĉu ne, Sancho?“ li diris al sia ĉevalo.

Tamen liaj devoj estis neniel pezaj; ili konsistis nur en la prezentado de la fremdaj ambasadoroj, ĉiumarde ĉe la akcepto de la reĝo, kaj formala anoncado ĉe la reĝa ĉefmanĝo, kiam ĉiuj atenditaj gastoj ĉeestis.

*) Enkondukanto de ambasadoroj.

Li pasigis la plej grandan parton de sia vivo en la palaco, servinte, kiam li estis juna knabo, kiel paĝio por la reĝino. Beleta knabo li estis, — en beleta vestaĵo, pufita jako, silkaj ŝtrumpoj kaj flirtantaj rubandoj — kaj lia sola devo, je tiu tempo, postulis, ke li staru ĉiutage ĉe la fundo de la ŝtuparo de la ĉambraro de Ŝia Reĝina Moŝto kaj faru unu imponan riverencon, kiam ajn ŝi iris survoje al kapelo.

Kanda ekzistado! Li kelkfoje komprenis la fakton kaj ofte sentis senripozan deziron, renkonti aliajn fazojn de l' vivo, ol tiujn interne de la orumita cirklo de Versailles.

Sed ĉi tiuj sopiroj, tiaj, kiaj ili estis, ne multe lin ĝenis, dum li rajdis tra la arbaro. Memoroj kaj espero, tute agrablaj, trovis esprimon en kelkfoja rideto, kiu aperis sur lia vizaĝo.

Ĉe kurbo de la vojo, iom malproksime, li vidis du virinojn alproksimiĝantaj.

„Marŝu pli malrapide, Sancho“, li diris al sia ĉevalo, „por ke ni ne timigu tiujn infanojn en la arbaro.“

Ili estis dolĉevizaĝa monaĥino kaj brilokula junulino. Nek unu nek la alia jam lin vidis, ĉar la monaĥino rigardis malsupren kaj la junulino rigardis supren, rigardante al ĉio escepte rekte antaŭ ŝi.

La pli maljuna virino moviĝis antaŭen, serioza kaj malgaja, kiel aŭtuna ombro, sed la junulino, fleksiĝema kaj gracia, konstante moviĝadis, nun por kapti en sia manplato flugantan folion, nun por observi ian strangan pecon da likeno, aŭ por kolekti unu el la glatbrilaj hipo-kaŝtanoj, kiuj kvazaŭ ŝtonetajis la vojon.

Subite, kvazaŭ inspirita de la gajiga libereco de la arbaro, la junulino komencis kanti. Ŝiaj tonoj havis ekscitantan dolĉecon, kaj ŝia kanto estis „Ave Maria“, kun sonoraj latinaj vortoj mirindaj por aŭ de la lipoj de homo tiel juna.

Sed la kanto baldaŭ finiĝis, ĉar la monaĥino ekdiris, admone:

„Silentu, silentu, Destine! Ĉu mi ne ofte diris al vi, ke estas malkonvene kanti eksterdome, eĉ kvankam vi estas en la sovaĝejo? La bona Dio donus al vi plumojn kaj flugilojn, se li intencus, ke vi kantu en la arbaro.“

Je tio ŝi ekrigardis supren kaj tiam aldonis mallaŭte:

„Malbonŝanca knabino! Vidu, kio okazis! Kavaliro alproksimiĝas kaj li nepre aŭdis vin. Mallevu la okulojn kun montro de modesteco kaj forlasu la vojon. Ni eniru ĉi tiun densejon por lin eviti.“

Ŝi faris enirejon por la junulino kaj, dum la observema juna rajdanto atente rigardis, ili malaperis simile al du timigitaj fazanoj.

„Timigitaj, Sancho, malgraŭ ĉio!“ li flustris al sia ĉevalo, malpeze glatigante la kolharojn per la pinteto de sia vipo. Tiam li reenpensiĝis kaj supozis, ke la okazaĵo finiĝis. Sed okazis, ke, kiam Destine aŭdis la ordonon mallevi la okulojn, ŝi, je tiu momento, tute okaze levis ilin (tia estas la kapriceco de virineco) kaj vidis, ke la kavaliro, ju pli proksima, estas des pli bela ol ŝi atendis, kaj stranga konfuziĝo ekposedis ŝin. Senatente kie ŝi paŝis, ŝi blinde iris antaŭen en la densejon.

Sed ŝajnis, ke la arbaro taŭgas por junulinoj tiom malmulte por enmarŝado, kiom por kantado. Nur momento pasis, antaŭ ol Destine faletis en tion, kion la kreitaĵoj de la arbaro estis sufiĉe saĝaj por eviti. Klaka sono, firma tenego de ŝia piedo, akra doloro tute neatendita kaŭzis, ke ŝi falis kun krio de teruro, dum dornoj kaj ŝtonoj aldonis senkompate al ŝia suferado.

Per la helpo de Fratino Thérèse ŝi levigis, sed doloro eldevigis alian nevolan krimon.

„Sankta Maria! Jen estas ia kaptilo de ĉasgardisto,

en kiun vi paŝis!“ ekkriis la bona Fratino Thérèse, rapide genuante por esplori ĝin. „Nur estu pacienca,“ ŝi aldonis, „dum mi liberigas vian kompatindan piedon.“

Ŝi komencis tiri kaj premi ĉe la kruelaj feraj dentoj, kiuj ne estis ŝirintaj la maldikan maleolon nur pro la fortaj ledaj botoj, kiujn ŝi portis. Sed la fero estis rusta kaj nefacile malfiksebla. Fratino Thérèse duobligis siajn penojn kaj kun iom da teruro komencis kompreni, ke ĉio, kion ŝi povus fari, estus senutila.

„Pro la favoro de Dio! Kion fari?“ ŝi demandis, ekscite, dum Destine, kun larmoj en la okuloj, kuraĝe penadis elporti la doloron.

Je tiu momento la sorto sendis savantan kavaliron en la formo de la juna rajdanto, kiu aŭdis la unuan krion, desaltis kaj puŝis sian vojon tra la arbetojaro. Kiel ofte la malbono, de kiu ni forkuras, fine vidiĝas kiel beno! Tiel, almenaŭ, pensis Fratino Thérèse, kiu nun estis plej kore danka por la ĉeesto de la nekonato.

Tuj li komprenis la kaŭzon de la malfeliĉaĵo.

„Ha! — fera ŝuo, kiu estas tro malvasta!“ li diris, dum per unu forta premo de sia fergantigita mano li liberigis la kaptitan piedon. Pro la ĉesigo de l' doloro, tima rideto venis sur la vizaĝon de Destine, kaj ŝi lin dankis, kun okuloj ankoraŭ malsekaj.

Li rimarkis kiel ŝiaj longaj, kurbaj okulharoj kun-kroĉiĝis simile al la petaloj de duone droninta rozo, kaj li decidis, ke la plej sorĉa esprimo de virina vizaĝo estas la malofta kombino de larmoj en la okuloj kaj ridetoj sur la lipoj.

Fratino Thérèse ankaŭ diris ĝentilajn esprimojn de danko, sed, neniam senzorga pri sia difinita devo kaj la insida danĝero de plua konversacio kun belaspekta sinjoro,

ŝi ne penis plu reteni lin kaj ordonis al Destine, ke ŝi sekvu ŝin.

Kun kortega gracieco li disigis la arbitaĵojn antaŭ la monaĥino, por ke ŝi trapasu kaj atingu la ĉefvojon; tiam li iris al Destine. Ŝi lametis kiam ŝi paŝis, kaj tuj li donis al ŝi la subtenon de sia brako.

Kun surprizita ekrigardo de tremanta miro, ŝi rigardis supren kaj tiam malsupren, ĉar iliaj okuloj renkontiĝis; liaj estis malhelaj, brilaj kaj jam longe kutimis al tiaj renkontoj sen embaraso. Li rimarkis kun admiro la rapide ŝanĝantan koloron sur ŝiaj vangoj, sed li ne sciis, ke lia vizaĝo ŝajnis al ŝi simila al tiu de la anĝelo Gabrielo. Kaj li ne sciis, ke la tuŝo de lia juvelita mano kaj la bonodoro de lia punta jaboto faris sur ŝin efekton similan al tiu de la granda kresĉendo de orgeno je Pasko-tempo.

Alveninte ĉe la ĉefvojo, kaj sen penso pri la disciplino de Fratino Thérèse, li proponis al Destine, ke ŝi rajdu.

„Vi nur malutilos vin penante marŝi, Mademoiselle, vi nepre devas fari uzon de mia ĉevalo dum la cetero de via vojo. Je tio, sen plua admono, li facile levis Destine sur la selon.“

„Mi marŝos flanke de Sancho kaj gardos, ke vi ne falu. Ne timu! Diru al mi, kien vi iros.“

Fratino Thérèse, kiu komprenis, ke la afero estas preter ŝia direktado, humile nomis la monaĥinejon de Sankta Cyr; tiam la eta aro iris antaŭen. Destine iom terurita pro la grandiozeco de la ĉevalo kaj de la ornamaĵoj, sur kiuj ŝi sidis, estis tute kontenta restante tie, precipe kiam la nekonato prenis ŝian manon en sian propran, por pli bone teni ŝin en la loko. Li rimarkis ŝian manradikon kaj diris:

„Vi tranĉis al vi la manradikon, Mademoiselle, per ŝtono.“

Tuj li eltiris puntborderitan poŝtukon kaj volvis ĝin firme ĉirkaŭ la vundo.

„Ho! — mi sincere dankas vin,“ ŝi timeme murmuris.

Li demandis kompateme pri la difektita piedo kaj certigis al ŝi, ke ŝi sidas komforte.

„Do, mi eskortas unu el la fraŭlinoj de Sankta Cyr,“ li diris kvazaŭ interesata, „la monaĥinejo, kiun fame konata Madame de Maintenon³ fondis.“

„Jes sinjoro,“ respondis Destine, „ŝia portreto pendas en nia vestiblo.“

La juna kortegulo demandis sin, kian klarigon koncerne la vivon de ĉi tiu sinjorino la monaĥinoj efektive komunikas al siaj lernantoj?

„Oni diras, ke Sankta Cyr donas plej bonan instruadon,“ li diris (kun komplimenta kapoklino al Fratino Thérèse), „kaj estas honoro, mi scias, esti akceptata, sed ho ve, tio signifas ankaŭ, ke Mademoiselle estas orfino.“

„Jes sinjoro,“ estis la milda respondo, „de mia dekdua jaro.“

„Kaj de tiam vi loĝas ĉe Sankta Cyr?“

„Jes, sinjoro.“

„Permesu al mi diri, Mademoiselle, ke Francujo ŝuldas multon al Madame de Maintenon se, pro ŝia malavareco, Sankta Cyr enloĝigas multajn kantantojn tiajn, kia vi!“

Rapida ekrigardo de Fratino Thérèse al Destine klare signifis: „Tion mi atendis.“

Nia juna kavaliro nun sin turnis al la monaĥino kaj demandis kun ĉarma respekto, tamen miksis ankaŭ kun iom da indiferenteco (ĉar la maltrankvila vizaĝo de Fratino Thérèse tute ne ĝenis lin): „Ĉu vi ne opinias, ke, ĉar mi estis la savanto de ĉi tiu juna birdo de la

arbaro, ke mi meritas rekompencan — ŝi certe apartenas al la arbaro kun siaj kastanobrunaj haroj kaj avelkoloraj okuloj!." Li suprenrigardis al Destine, dum li tion diris kaj ridetis — tiam li ree sin turnis al la monaĥino: „Ĉu vi ne opinias, ke ŝi devus fini por mi la kanton, kiun ŝi komencis antaŭ nelonge?“

Fratino Thérèse penis meti la malfeliĉaĵon, kiel ŝi opiniis ĝin, en tiel favoran lumon kiel eble, kaj klarigis, ke Destine kantis, ĉar ŝi deziris ekzercadi sian solon, kiun ŝi kantas je vespera Diservo.

„Sed estis malkonvene tion fari,“ ŝi aldonis, „kaj mi tuj riproĉis ŝin. Mi timas, ke vi opinias ŝin ankoraŭ ne sufiĉe edukita.“

„Jes,“ estis la trankvila respondo, „se ŝi ne kantas por mi nun!“ La rideto, kiu akompanis ĉi tiun parolon, enhavis varmecon kaj mildecon, kiuj tuŝis la koron eĉ de la iom severa Fratino Thérèse.

„Kantu, infano, ĉar oni tiel petas de vi!“ Ili marŝis antaŭen, — la nigre vestita monaĥino ĉe unu flanko de la ĉevalo kaj grandioza kavaliro ĉe la alia — dum Destine, simila al klarokula mateno inter nokto kaj tago, rajdis brilega kun la ardo de nova stranga ĝojo.

Sen hezito aŭ timo, ŝi levis la voĉon kaj kantis:

„*Benedicite, omnia opera Domini!*“*)


La potenca signifo de la psalmisto kvazaŭ transformiĝis en simplan kanton de ĝojego. Ĉiu vorto estis nuancita per klarsona sonoro de juna espero kaj heleco. Ŝiaj tonoj elsonis tra la arbaro simile al batoj sur arĝenta sonorilo.

La nobelo ĉe ŝia flanko, kiu inspiris ŝian kanton, perdiĝis en si, dum li aŭskultis, kaj tute forgesis, ke li

*) Laŭdu Dion, ĉiuj kreitaĵoj de l' Sinjoro!

firme tenadis ŝian manon dum la tuta tempo. Li revenis tamen al tero, kiam la ĉevalo faletis, kaj la kanto subite finiĝis en delikata eta krio, sekvite de ondeto de rido je la absurda finiĝo de la muziko. Li ankaŭ ridis kaj baldaŭ Fratino Thérèse sentis la infekton, kaj tiam — ial aŭ iel — ili rompis la ligilojn de sindetenemo kaj subite interkonatiĝis. Eĉ Fratino Thérèse parolis libere nun.

Sed ĉi tiu agrabla stato finiĝis, ĉar la muroj de Sankta Cyr leviĝis malhele antaŭ ili, simile al devo superombriganta plezuron. La manoj estis dekroĉitaj, la piedingo mallevita kaj — en momento ĉio finiĝis. Kelkaj vortoj estis parolataj (Destine neniam povis rememori ilin), tiam sekvis svingo de vipo, la sono de galopantaj hufoj, la tintado de ornamaĵoj laŭ la ĉefvojo. Unufoje la nekonato rigardis malantaŭen kaj afable svingis sian trikornan ĉapelon por adiaŭo, kaj ankaŭ, se oni diras la veron, por la lasta penso, verŝajne, kiun li iam donacos al la kantanta junulino de Sankta Cyr; ĉar okazis, ke lia koro estis nuntempe plena de alia virino.



Ĉ A P I T R O * I I

BRODITA TEKSAĴO DE L' SORTO

Destine, multe konfuzita kaj enpenza, plenumis la devojn kaj lecionojn de la tago; post la vespera Diservo finita kaj la vespermanĝo servita ŝi estis libera, por preni sian kutiman kandelon de la benko, en la arkaĵa ŝtona koridoro, kaj supreniri la larĝan ŝtuparon al sia izola dormoĉambro, malgranda, senmebla kaj blanka.

Ŝi iom plirapidigis siajn paŝojn, kiam ŝi alproksimiĝis al tiu eta sanktejo, sed kiam ŝi estis interne, ŝia rapido malaperis, forportita sur la flugiloj de feliĉa ĝemeto. Ŝi malrapide fermis la pordon. Estis esprimo de reva ĝojo sur ŝia vizaĝo, kiun la kandelo, ankoraŭ en ŝia mano, iluminiis simile al la vizaĝo de Madono en sanktejo.

Fine ŝi povus liberigi siajn pensojn, ellasi sian imagon, ekzerci sian memoron. Neniu ĉeestis, por ĝeni aŭ maltrankviligi ŝin, neniam lecionoj malhelpus nun.

Ŝi fermis la okulojn kaj ree travivis la okazoplenan historion de tiu mirinda aventuro de la mateno. Ŝi pensis pri sia „Amiko de la Arbaro“, liaj vortoj, lia ekrigardo. Kiel simila al ferakonto! Nekonata kavaliro savis ŝin de la feraj makzeloj de l' morto!

Ree ŝi ĝemetis, kvazaŭ en ia tragedia ravo, kaj glitis trans la ĉambbron kun la mieno de malliberigita prinĉino, metante la kandelon sur la preĝan benkon ĉe sia litflanko.

Tiam ŝi iris al la fenestro, ekkomencis kuntiri la purajn,

amelitajn muslinajn kurtenojn, sed haltis reve, cedis sin al la lukso de plua imagado. Kun pensema rigardo ŝi observis la malhelajn ombrojn sub la arboj kaj penis imagi, ke ŝi vidas lin tie, ke li revenis kaj atendas por vidi ŝian vizaĝon ĉe la fenestro! Kompreneble ŝi sciis, ke li ne estas tie. Sed kia ĝojo, se li estus tie! Vere ĉio tio ĉi estas la tute delikata vefto, kun kiu la imago de virgulino teksas ĉiujn siajn variecolorajn desegnojn.

Malrapide kaj malvolonte Destine kuntiris la kurtenojn, tiam ŝi sidiĝis sur la malalta liteto kaj komencis mal-fiksi siajn harojn. Ŝi havis nenian spegulon, en kiu ŝi povis admiri la efekton de lanugaj bukloj volviĝantaj ĉirkaŭ ŝiaj ŝultroj, sed la spegulo de memoro ŝajnis anstataŭi ĝin, kaj ŝi karesis buklon, dum ŝi rememoris liajn vortojn pri siaj „kastanobrunaj haroj“. Ree ŝi profunde pensigis en rava ardo de lumaj fantazioj.

Sed subite ŝi rememoris, ke Fratino Thérèse ne aprobus tiajn revojn. Destine kun firma intenco malfermis etan libron de „Meditadoj“ kaj komencis legi la lecionon de tiu tago.

„Oktobro, la 17-an. — Dum ĉi tiu monato de velkanta verdaĵo, ĉi tiu sezono de falantaj folioj, ni devas noti la flugon de l' jaroj, esti konsciaj de la malkreskanta tempo de l' vivo kaj mediti pri la alproksimiĝo de l' morto. Vivo estas ŝtupetaro, sur kiu ni aŭ supreniras al Ĉielo aŭ malsupreniras al Infero ...“

En tiu lasta frazo estis sugestio, kiu kreis novajn pensojn.

Ŝtupetaroj! Amforkuroj! Ŝi jam legis pri tiaj aferoj ... Eble ...! Supozu ke ...! Ŝi senkonscie haltis la spiron, duone atendante aŭdi la frapeton de ŝtoneto ĉe la fenestro.

Ŝi aŭdis anstataŭe la frapeton de kapela sonorilo kaj

eksaltis kiel ektimigita infano. Estis la duonhora frapeto kaj la signalo, ke oni pretigu sin por enlitiĝi.

Ridetante je sia timo kaj forpelante siajn pensojn, Destine komencis senvestigi sin.

Unue ŝi demetis la blankan koltukon, sternis ĝin sur la genuojn kaj zorge faldis ĝin laŭ la klare markitaj faldetoj. Tiam ŝi disbutonumis la taliveston de sia robo. Ĝiaj nepremaj manikoj permesis, ke ĝi falis de ŝiaj deklivaj ŝultroj kaj firmaj, rondaj brakoj. Ŝi rigardis malsupren al sia manradiko, kaj — jen! — la malofta peco da punto ankoraŭ restis tie.

Ŝi ekkriis: „Lia poŝtuko!“

Ŝiaj nudaj brakoj kaj ŝultroj kaj ankaŭ ŝia vizaĝo subite koloriĝis pro sento de ĉagreno, eĉ honto, ĉar ŝi ne redonis tion, kio ne apartenis al ŝi. Kia estus lia opinio, post tiom multe da lia komplezo? Se ŝi nur povus resendi ĝin al li!

Eble iam ŝi renkontus lin! La penso enplantis ĝojigan pecon da espero en ŝian koron. Ŝia unua ĉagreno cedis al sento de plezuro, ke ŝi posedas ion apartenantan al li.

Malrapide kaj zorge ŝi malvolvis la delikatan memoradon. Ŝi sentis la bonan odoron de santalo; ties aromo ree envolvis Destine en la rememoron de tiu magia momento, kiam la brako de la nekonato ŝin subtenis, kaj lia voĉo, tiel proksima de ŝia orelo, alparolis ŝin kun sentema zorgemo. La peco da punto fariĝis tre kara al ŝi. Ŝi tenis ĝin zorge kaj premis ĝin ĉe sia brusto, ĉe siaj lipoj, kaj tiam, ne sciante kial aŭ pro kio, ŝi enigis sian vizaĝon en la kapkusenon kaj ploris la neinvititajn larmojn de la unua majotempo de sia koro.

Baldaŭ ŝi sekigis la okulojn kaj pli zorge rigardis la delikatan pecon da punto; palpis kaj admiris ĝian gracian teksaranĝon. Tiam kun granda ĝojo ŝi trovis, en

unu angulo, la broditajn literojn: „de V-r-i-e“, lian nomon. Kaj supre troviĝis krono. „Li estas nobelo, altrangulo“, ŝi flustris al si.

Kun ekbrilantaj okuloj kaj rapide batanta koro ŝi kalkulis la pintojn sur la krono, denombrante ilin mezavoĉe, kvazaŭ deŝirante la petalojn de lekanto.

„Unu, du, tri — tiu estas kavaliro! Kvar, kvin — barono; ses, sep — grafo! Li estas grafo! Nur pensu! savita per la helpo de grafo!“

La grandeco de ĉi tiu penso preskaŭ konsternis Destine. Ree ŝi rigardis al la nomo, ĵetante buklon for de siaj okuloj, dum ŝi silabis la nomon: „de V-r-i-e, la grafo de Vrie“. Ŝi povus pensi pri li nun laŭ lia nomo; ŝi sola en Sankta Cyr!

Subite ŝi fariĝis pensema kaj ŝi demandis sin, ĉu estas ŝia devo sciigi Fratinon Thérèse? Post longa konsiderado ŝi decidis ne fari tion. Havante nenian rimedon, per kiu ŝi povus resendi la poŝtukon al la posedanto, ŝi retenus ĝin kiel sian plej karan posedaĵon.

Do ŝi zorge ĉirkaŭligis la etan memoraĵon per peco da blua rubando kaj tiam serĉis, por trovi lokon, en kiu ŝi povis kaŝi ĝin. La espero plej supra en ŝia koro estis, ke ŝi povos renkonti la nekonaton, kaj, en tia okazo, ŝi nepre devos havi ĝin preta por redoni. Do ŝi planis rimedon, per kiu ŝi povus porti la trezoran memoraĵon kun si.

Je tiu momento iu ekfrapis sur ŝian pordon kaj milda voĉo admonis: „Lithoro! Estingu la lampojn!“ Destine obeis senprokraste kaj genuante ĉe la preĝa benko ripetis la ofte diritan „Ave“ de sia rozario.

Pala, malklara lumo de la nube vualita luno naĝis tra la kurtenoj kaj donis mildan brilon al la ĉambro. Ĉio estis silenta, escepte de la malforta sono de svingantaj

rozariaj globetoj kaj maloftaj siblaj literoj de moviĝantaj lipoj.

Fine la sankta nombro estis kompleta, sed Destine ne tuj leviĝis. Anstataŭe estis paŭzo de momento, tiam per dolĉaj, timemaj tonoj ŝi mallaŭte diris aventureman aldonon:

„Dio benu la grafon de Vrie — kaj realportu lin al mi!“

Feliĉaj pensoj longe flugpendis ĉirkaŭ ŝia kapkuseno, dum kun mano sub vango kaj kliniĝantaj palpebroj ŝi kuŝis longtempe sendorma. Ŝia fantazio imagis, kiam kaj kiel ŝi eble povus renkonti sian heroon. Ŝi imagis lin marŝanta en la kapelon iam dum vespera Diservo, dum ŝi kantas sian solon; ŝi esperis, ke la solo estas la „*Laudes Domini*“, kies notoj portis ŝian voĉon tiel alten. Ŝi deziris mirigi lin per sia kantado. Eble iam, kiam ŝi laboras en sia ĝardeno, li okaze pasus ekster la monaĥinaj muroj. Ŝi decidis ĉiam kanti ĉe sia laboro. Aŭ eble ŝi renkontus lin, kiam denove ŝi iras kun Fratino Thérèse tra la arbaro; ŝi bedaŭras, ke la Fratino malpermesis, ke ŝi kantu eksterdome. Post ĉio, la espero plej alloga estis, ke ŝi povos vidi lin en la kapelo. Perioda rideto, kiu estis flugetanta super la vizaĝo kun revantaj okuloj sur la kapkuseno, malleviĝis kaj restis tie, dum la pezaj okulharoj dekurbiĝis pli malsupren kaj fine ripozis sur la ronda vango ankoraŭ ruĝeta pro la varmece de feliĉaj pensoj.

Ĉiutage post tio, dum la vespera Diservo, la okuloj de Destine serĉis la nekonaton, iun sinjoron, kiu portas veluran veston kaj puntan ĵaboton. Sed semajnoj pasis, kaj nur la familjaraj kamparanoj, tagon post tago, petegis la benon de Dio en la eta kapelo de Sankta Cyr. Ankoraŭ ŝi kantis „*Benedicite*“ kaj ankoraŭ ŝi preĝis:

„Dio benu la grafon de Vrie — kaj realportu lin al mi!“

Ĉ A P I T R O * I I I

MORTVUNDANTA ĜERCO

Ĉe la fundo de la granda ŝtuparo en la palaco de Versailles estis konstruita por la plezuro de Louis per elspezo de du milionoj da *livres**) la fama „*Théâtre des petits Cabinets*“**).

Mirindaj prezentoj estis faritaj sur ĉi tiu eta scenejo, kie Madame Pompadour, kiel ĉefaktorino kaj estrino de aristokrata eta aro, elmontris eksterordinaran aktoran kapablon. Oni malŝparis nek monon nek penadon, por fari ĉi tiujn privatajn teatraĵojn kiel eble plej perfektaj. Profesiaj dancistinoj estis dungitaj por baletoj, ĥoristoj por operoj kaj spertaj muzikistoj por la orkestro.

Krom Madame Pompadour, estis nombro da bonaj aktoroj inter la amatoroj de Versailles. La duko d'Orléans estis bonega en roloj komediaj, kaj Madame de Brancas pruvis esti kontrastaĵo al li, dum la ĉarma Madame Mirapoix povis ludi junulinojn perfekte.

Kiam la kapablo de ĉiu partoprenanto evidentiĝis, li aŭ ŝi fariĝis la ludanto de unu speco de persono. Pro tio rezultis, ke la neŝanĝebla scena amanto de Madame Pompadour estis la juna „*Introducteur des Ambassadeurs*“, la grafo Romain de Vrie. Speciale taŭga por la prezentado de amroloj pro lia aspekto, li aldonis al tiu kaj aliaj ecoj nekutiman intensecon en siaj personadoj. En tiaj teatraĵoj kiel „*Les Surprises de l'Amour*“, „*Cléo-*

*) Funtoj.

**) Teatro de malgrandaj kabinetoj.

pâtre“, „Venus et Adonis“ kaj „La Méchante“, li malkaŝis tiom da juneca ardoro, ke ĉiuj aŭdantoj tute forgesis scenejon kaj planklumojn.

La aŭdantaro estis ĉiam tre limigita; Louis mem estis elektanta ĉiun gaston. Kelkfoje la reĝino kaj ŝia sekvantaro ĉeestis, sed pli ofte nur la reĝo kaj liaj apartaj favoratoj vidis tiujn rafinitajn kaj zorge preparitajn prezentaĵojn.

Louis ne ĉiam aplaŭdis tion, kion li vidis. Kelkaj homoj dubis, ĉu Lia Reĝa Moŝto ricevis la ekvivalenton de du milionoj da *livres*, vidante Madame Pompadour respondi al la pasiiga amindumo de la bela grafo de Vrie. Ĉi tiu dubo pligrandiĝis, kiam la reĝo, ĵus vidinte trege realisman prezentadon de „Venus et Adonis“, subite deklaris sin tute indiferenta pri teatraĵoj. Post tio oni ne faris ilin plu.

Romain de Vrie, facilhora kaj senpripensema, neniam rimarkis la venantan nubon sur la reĝa frunto, ĉar Louis ruze kaŝis sian malplezuron.

Ĉiuj plej bone informitaj komprenis tamen, ke ĉi tiu estas la plej minaca signo el ĉiuj. Louis ankoraŭ traktis la „*Introducteur des Ambassadeurs*“ kiel sian plej valoregan serviston. Tiel Romain estis blinda al sia kondamno, kiu, malgraŭ la preĝoj de junulino ĉe Sankta Cyr, rapide kuregadis sur lin.

La lasta prezentado en la eta teatro okazis la unuan de Decembro. La sekvintan mardon Louis edifis sian kortegon per eta teatraĵo, sia propra, kaj dum semajnoj poste oni diris en Versailles, ke la grafo de Vrie ricevis sian leteron de ekzilo.

Estis tuj post la matena akcepto de ambasadoroj. Multaj el la sekvantaro ankoraŭ restis en la aŭdantara ĉambro, sed, ĉar la devoj de la prezentado finiĝis, Romain estis klinsalutante montranta sian foriron de Lia Reĝa

Moŝto, kiam Louis faris mirinde ludeman kaj personan ekdiron.

„Ĝis revido, de Vrie; ne estu malfrua ĉe la ĉefmanĝo hodiaŭ vespere“⁴.

Ĉar nek de Vrie nek iu el la reĝa sekvantaro estis iam malfruaj, deĵorante ĉe la ĉefmanĝo de la reĝo, la grafo nur supozis, ke la malgrava diraĵo estas nur bagatelaĵo aŭ speciala signo de kamaradeco.

La minaca intenco de Louis tamen klariĝis, kiam Romain renkontis, ekster la akcepta ĉambro, paĝion, kiu, kun preciza klinsaluto, donis al li leteron kaj respektive diris:

„De Lia Reĝa Moŝto“.

Oficiroj de la gvardio kaj ataŝeoj je postenoj ĉe la granda ŝtuparo vidis la grafon rompi la sigelon kaj rapide legi la enhavon.

Je la nura tuŝo de la papero antaŭaverto de ĝia enhavo venis super lin kiel glacia ondo. Instinkto simila al klarvido kaŭzis la signifon de iuj vortoj ekbrili tra lia cerbo, eĉ antaŭ ol liaj okuloj ekvidis ilin: „ekzilo“, „tuja“, „konstanta“. Li ne bezonis duan rigardon por kompreni la premegan veron.

Tuj alia penso leviĝis — la konscio de observo. Li decidis ne malkaŝi sian agitadon per ia ajn signo. Lia longa sperto pri sintenado kaj la konformeco de parolo al la formaleco de kortega etiketo ebligis al li nun regi sin.

Neniu muskolo de lia vizaĝo perfidis lian ĉagrenon. La rideto, kun kiu li eliris de Lia Reĝa Moŝto, ankoraŭ restis sur liaj lipoj, kiam li alparolis la senditon.

„Bonvolu peti, ke Lia Reĝa Moŝto ne atendu min ĉe la ĉefmanĝo hodiaŭ vespere“.

Tiam la grafo de Vrie, reĝa „*Introduceur des Ambassadeurs*“, grandioza en kostumo el griza atlaso kun karmezinaj garnajoj el oro kaj krispoj el punto, mal-

supreniris la grandan ŝtuparon. La ritma klakado de liaj kalkanoj sur ĉiu ŝtupo montris nerompitan regulecon, kaj li respondis kun sia kutima gracieco al la salutoj de la soldatoj gardantaj la grandan portalon.

Sen prokrasto Romain forlasis la palacon kun sia intendanto kaj rapidegis al la apartamento, en kiu li loĝis en Versailles.

Tuj kiam li estis en sia propra loĝejo, liaj enfermitaj emocioj elverŝis sin en eksplodo de kalumnio kaj malbenoj. „Pereo lin prenu“, li ekkriis furioze, ekkaptante de la tablo miniaturon de la reĝo kaj jetante ĝin al la planko en frenezeco de kolerego.

Lia intendanto, ne sciante la kaŭzon, staris en deca silento kaj observis la neregatajn eksplodojn de kolerego.

Subite Romain eltiris la reĝan leteron, premegis ĝin en la mano kaj fine jetis la ĉifonitan dokumenton al sia fidela intendanto.

„Legu tion, Lemojne, tiam helpu min malbeni la kortegon kaj la reĝon!“

Lemojne estis pli maljuna ol lia mastro kaj ĉiam kapabla konsilanto. Tuj li komprenis la signifon de la letero, tiam li kviete diris:

„Eĉ muroj havas orelojn, kaj malaprobaj vortoj pri la reĝo havas mirindan povon esti aŭdataj malproksime.“

„Ili rajdu sur la kvar ventoj de la ĉielo, — estas indiferente al mi“, akre respondis Romain, preter ĉia averto. „Malbenoj estas ĉio, kion monarko kun mal-larĝa animo meritas.“

„Mia kara grafo“, trankvile respondis Lemojne, „se reĝo havus larĝan animon, lia krono ne taŭgus por li. Ne sentu vin tiel maljuste traktita nur, ĉar Lia Reĝa Moŝto decidis senigi sin de via kunestado. Al multaj krom vi oni jam montris la vojon el Francujo. Kaj post

ĉio, estas nenia malhonoro, ĉar oni ekzilas nur altegajn homojn.“

Sed Romain respondis kolere: „Ne nur la eksigo, sed ĝia maniero min frenezigas. Ĉu vi zorge legis la ordonon? Ĝi donas al mi neniom da tempo por preparado. Mi nepre devos foriri el la provinco hodiaŭ kaj raporti ĉe Evreux hodiaŭ nokte; tio ne donas oportunan okazon por diri adiaŭ al miaj amikoj! Mi estas eljetata simile al turbulo de ŝovelilo! Pro ĉielo, tio estas monstra, post kiam mi servadis al Lia Moŝto dum mia tuta vivo, riverencante antaŭ li, balaante la plankon per la rando de mia ĉapelo je ĉiu horo de la tago kaj nokto. Jen mia rekompenco: esti forsendata senceremonie; eĉ mian foriron li uzis kiel serĉon. Li min admonis, ke mi ne estu malfrua ĉe la vespermanĝo!“

Dum la memoro de tiu ofendego mordis en sian fieron, Romain tenis la brakojn rigidajn kaj streĉis la lipojn super fermitaj dentoj por deteni la pasion de indigno, kiu posedis lin.

Post momenta paŭzo li ironie aldonis: „Kaj tiu estas nia Suvereno de Francujo! Nia Plej Kristana Reĝo — kiun ni nomas „Louis la bone amata!“

Ree li paŝis tien kaj reen en la ĉambro, dum Lemoyne, pro manko da vortoj, relegis la fatalan leteron. Antaŭ ol li finiĝis, Romain estis krianta laŭte kiel antaŭe:

„Mi komprenas la signifon de tiu ago lia. Mi vidas la celon de la plano! La ruza vulpo! La tuta afero estas lerte planita por malebligi intervjuon kun la markizino antaŭ mia foriro. Louis havos ŝin sub sia propra okulo hodiaŭ posttagmeze dum la reĝa ĉaso ĉe Senart.“

Lemoyne penseme kapojesis: „Mi atendis ĉi tiun rezulton, kiam vi diris al mi, ke Lia Reĝa Moŝto laciĝis pri teatraĵoj! Oni devus neniam ‚laciĝi‘ reĝon.“

Ne rimarkante la dirajon, Romain daŭrigis sian spas-majn malbenojn.

„Sed mi ja diras al vi ĉi tion — ordoni estas facile, esti obeata — estas alia afero. Mi intencas lin malobei!“

Lemoyne konsterniĝis: — „Malobei la reĝon?“

„Jes; mi ne iros, ĝis kiam mi estos vidinta ŝin. Mi preferas morton. Ne parolu! Mi ne foriros! Ĉu vi aŭdas? Mi ne foriros!“

Romain emfaze diris la lastajn vortojn, batante sur la tablon per ambaŭ manoj; peza arĝenta kaliko falis de la tablo kun krako.

„Estus pli bone, fosi vian propran tombon kaj ensalti“, serioze avertis Lemoyne, sed li parolis al surdaj oreloj.

Romain malbukis sian spadon, brue ĵetis ĝin sur la plankon, tiam li daŭrigis sammaniere kiel antaŭe:

„Mi diras al vi, ke mi decidis. Mi intencas, vidi ŝin spite ĉion. Mi igos ŝin foriri kun mi! Tia estas mia respondo al la reĝo!“

Post ĉi tiu ultimato Romain elverŝis glason da vino kaj englutis ĝin.

Dume Lemoyne paŝis senbrue pli proksimen, por malkovri antaŭ sia mastro la seriozecon de la situacio kaj la malsaĝecon de lia plano.

„Vi forgesas, ke malobei ordonon pri ekzilo signifas morton. Vi havas nenian alternativon, vi nepre devas obei. Antaŭ sunsubiro hodiaŭ vi devas esti vidata ĉe la provinca landlimo sur la vojo el Francujo. La ordono de la reĝo estas klara.“

Pro tiuj vortoj de deteno Romain furioziĝis. Li sin turnis al Lemoyne kaj akre riproĉis lin:

„Kontraŭu min, aliĝu al la reĝo — tio estas saĝa! Alie vi timas personan danĝeron por vi mem. Ordonu, ke mi foriru simile al vipita knabo! Nomu min malsaĝulo

kaj frenezulo! Puŝu la kadukan muron! — Tiu estas la monda moro! Sed mi ne supozis tion de vi.“

Li ekkaptis la ŝultrojn de Lemoyne kvazaŭ por skui lin, sed subite lia kolero trankviliĝis, ree amikeco regis. La manoj, kiuj estis metitaj sur la larĝajn ŝultrojn de Lemoyne, ripozis tie dum momento kun la sentemeco de petego.

„Pardonu min, Lemoyne“ — la juna grafo parolis raŭke — „pardonu min, mi ne povas kompreni, kion mi diris. Mi estas malprava; vi estas prava. Mi nepre devos obei — kaj iri.“

Li fale sidiĝis kaj apogis kapon kaj brakojn sur la tablon. Ĝemeto, preskaŭ ĝemo, skuis lian korpon, dum li plordiris:

„Vi ne komprenas, vi neniam povas scii, kion tio signifas por mi.“

Letargio sekvis la tumulton. Longtempe li ne moviĝis. Lemoyne, profunde simpatia sed ĉiam diskreta, parolis neniun vorton, sed sin okupis preparante la foriron. Estis multe por fari; li devis doni ordonojn kaj aranĝi paperojn; tiujn Lemoyne metis antaŭ sia mastro, kiu silente kaj duone senkonscie surskribis ilin. Sed subite li forŝovis la dokumentojn, ĵetis la plumon sur la tablon kaj anoncis, trankvile, decide, preskaŭ ĝoje, kvazaŭ li havis novan inspiron:

„Lemoyne, mi ne foriros!“

La intendanto apenaŭ povis kredi, ke li aŭdis ĝuste.

„Vi ne foriros?“

„Ne, mi konsideris la aferon, Lemoyne, — sed ni devas ne perdi tempon. Mi rapidegos al Vrieonne.“

Vrieonne estis la prapatra bieno de la grafo. Lemoyne demandis pripense:

„Ĉu vi efektive intencas permesi al la landlimaj gvardi-

anoj raporti hodiaŭ nokte, ke neniu respondanta al la priskribo de la ekzilita grafo de Vrie pasis tiun vojon?"

Estis knabosimila animo en la voĉo de Romain, dum li rapide respondis:

„Tute kontraŭe! ili devas raporti, ke iu respondanta al mia priskribo estas jam pasportita eksteren de la landlimo.

Lemoyne preskaŭ perdis la paciencon.

„Ĉi tiu ne estas ŝerca afero. Pro ĉielo, diru al mi, kion vi intencas?"

„Mi intencas — Pierre Nicod! Mi nepre sendos lin anstataŭ mi. Estas strange, ke mi ne pensis pri li ĝis nun; sed ni devas rapidi! Tiru la sonorilŝnuron, ordonu la ĉevalojn! Vigligu vin, alportu miajn rajdveston kaj botojn! — Rapidu! — Tempo pasas!"

Sed Lemoyne ne povis eniri la spiriton de ĉi tiu vervo. La propono konsternis lin.

„Ĉu estas eble, ke vi intencas sendi ordinaran stalknabon anstataŭ vi?"

„Pierre ne estas ordinara stalknabo“, Romain akre respondis, dum li piedbatis boton en la plankon. Li estas tre neordinara junulo, ĉar li aspektas sufiĉe simila al mi, por esti la filo de mia propra patro. Eble li estas, mi ne scias. Sendube vi mem ofte havis tiun saman opinion, kvankam vi neniam diris ĝin. Almenaŭ vi devas konfesi, ke li similas min?"

„Jes — iom.“

„Iom! Ĉu lia nazo ne estas simila?"

„Jes.“

„Kaj lia frunto?"

Ree Lemoyne malvolonte respondis jese.

„Kaj lia mentono?"

„Jes, eble, se ĝi estus razita.“

„Kaj ankaŭ lia buŝo?“

„Jes, kiam fermita.“

„Kaj vi ne povas nei do, ke lia profilo estas mirinde patricia kaj simila al mia propra. Mi intencas sendi tiun profilon, dum kelka tempo almenaŭ, sur ĉi tiu vojaĝo de ekzilo. — René, metu la selojn sur la ĉevalojn!“

Tiujn vortojn li diris al lakeo, kiu aperis responde al lia sonoro.

Post la foriro de la servisto Lemoyne penis, tiel energie kiel antaŭe, kontraŭkonsili sian mastron.

„Sed, mia kara grafo. La simileco de Pierre al vi ne estas tiel frapanta, kiel vi opinias.“

„Vi eraras“, Romain interrompis. „Foje lisin vestis per mia vestaĵo kaj trompis ĉiujn servistojn, ĝis kiam li malfermis sian stultan buŝon.“

„Kaj precize tion li ree faros“, protestis Lemoyne serioze. „Vi ne povas silentigi lian buŝon.“

„Jes, mi povas; mono malfermos ĉiun ajn buŝon aŭ fermos ĉiun ajn buŝon.“

„Sed aŭskultu, mi petas, pensu iomete, planu iomete“, konsilis Lemoyne.

„Mi jam pensis kaj planis“, tuj respondis Romain. Li nepre transiros la landlimon hodiaŭ nokte anstataŭ mi, kaj lia aspekto sufiĉe konformiĝos al la priskribo, kiun la ĝendarmoj havos pri mi. En du tagoj mi atendas renkonti lin, kondukante la markizininon kun mi, kaj tiam mi reprenos mian identecon. Jen, ĉio estos simpla, sed vi devos iri kun li.“

Lemoyne konsterniĝis. „Mi — kun li — ?“

„Certe — por fari ĉiom de la parolado. Rekuraĝigu, Lemoyne! vi ne intencas rifuzi?“

„Mi neniam rifuzos fari ion por vi, sed mi ĉiam donos

al vi mian konsilon, kaj mi nun petegas vin plej serioze, forlasu ĉi tiun riskon. Ne faru ĝin, mi petegas.“

Kun egala seriozeco Romain faris respondon, dum li ekprenis la manon de Lemoyne.

„Kaj mi, miaparte, petegas vin, mia kara Lemoyne, kiel amiko konsenti pri mia plano.“

De sia infaneco Romain povis logi Lemoyne al ĉiu ajn plano, precipe kiam li sin turnis al persona petego. Kaj nun, dum la pli maljuna viro rigardadis la figuron antaŭ li — la ardajn malhelajn okulojn, la memfidan knabecan pozon de la kapo, la duone ridetantan, duone petantan esprimon de la bele ĉizita buŝo — li estis subite superregata de amaj memoroj pri la fruaj tagoj de sia juna mastro. La spirito de la knabo brilis tra la vizaĝo de la viro; la okuloj de la servisto pleniĝis de subita nebulo el larmoj. Post ĉio, li pensis, juneca impulso iam portos nin super barojn, kiujn diskreteco lasus neprovataj. Do, laŭkutime, Lemoyne cedis al la volo de la junulo — ĉiam la volo de la ventoj.

„Faru kiel plaĉas al vi. Mi sekvos.“

„Ha! tio eksonas simile al la Lemoyne de antaŭe!“ ekkriis Romain kun ruĝeto de ĝojo sur la vizaĝo.

La intendanto ridetis. „Vi opinias, ke konsilo estas bona, sed konsento pli bona! Ni devas eviti erarojn. Li, kiu transsaltas fendegon, ne kuraĝas halti duonvoje! Ĉu la ĉevaloj estas malsupre?“

Romain paŝis al la fenestro.

„Jes.“

„Do ni nepre devas rapidi. Postulas fortegan rajdadon por atingi Vrieonne ĝustatempe.“

DANĜERA PERSONIGADO

Vrieonne kuŝas apud Marly-le-Roi, kaj, dum la foresto de la grafo, nur kelke da servistoj deĵoris tie.

La alta ŝtona pordego jam restis fermita dum semajnoj, kiam Romain kaj Lemoyne venis galope al la dometo de la pordistoj; iliaj bridoj gutis ŝaŭmon, iliaj botoj estis kovritaj de koto, al la ĉevaloj jam mankis spiro.

Ili batis laŭte ĉe la pordego je la konsterno de la pordisto kaj ties edzino, kiuj amuziĝis je lotludo. Ĉio estis en konfuzo, kiam la inda paro ekscite forŝovis siajn seĝojn kaj rapidis por rigardi tra la eta kurtenita fenestro de la dometo.

„Sankta Madono — jen Lia Princa Moŝto — la grafo!“

La pordisto eliris, la bona edzino rapide kaptis puran antaŭtukon, kiun ŝi penis ligi super tiun, kiun ŝi portis, kaj ekstaris ĉe la pordejo por diri koran bonvenon, kun siaj manoj treege okupataj pro la konfuzo de la ŝnurtoj ĉe sia dorso.

Post momento la pordegoj estis tre malrapide malfermitaj de l' pordisto, maldika eta viro kun lango, kiu svingiĝadis sur facila ĉarniro kaj voĉo, kiu sugestiis tute la malon.

„Estas tia surprizo, Via Moŝto, kaj tia honoro, ke vi venas tiel neatendite. Vi trovos ĉion bonorda ĉi tie, mi opinias, — ĉion kun escepto de la pavoĵ. Ha, Via Moŝto, mi havas malbonan raporton pri ili; ili mortis,

ĉiuj. Mi penis iel savi ilin; mi grasumis iliajn gorgojn, kaj dozis al ili juniperan sukon, kiu estas bona — oni diras —, sed ne ĉiam. La birdoj estis . . .“

Romain interrompis sian flue parolantan pordiston.
„Kie estas Pierre?“

„Pierre? Ho, li estas ie proksime. Mi estis dironta, ke la birdoj . . .“

„Respondu tuj, kie estas Pierre?“

„Mi . . . mi ne scias; kun la ĉevaloj, eble.“

„Rapidu, Lemoyne, trovu lin; vipu, galopu, spronu!“

Lemoyne ekiris, Romain rajdis al la kastelo, kaj la pordisto sekvis.

„Ni konservis ĉiujn plumojn“, li rekomencis pri la pavoj, havante ankoraŭ la plej supran temon en sia menso, dum lia edzino, lasita en la pordejo, daŭrigis siajn penojn, malimpliki la ŝnuretojn de siaj du antaŭtukoj.

Lemoyne kurigis sian ĉevalon al la staloj. Neniu estis tie. Li vokis laŭte: „Pierre! Pierre!“ Neniu respondis. Li elseliĝis, rigardis tien kaj reen, serĉis tra la staloj. Li serĉis ĉie sen signo de Pierre.

Kiam Lemoyne revenis al la kastelo, li trovis la grafon en frenezo de necerteco. La pordisto jam serĉis la ĉambron de Pierre, la vinkelon, la oranĝerion. Li nun traserĉis ĉiun ĉambron en la kastelo.

Fine oni trovis la junulon Pierre en la armilejo. Okazis, ke li eniris tiun mezepokan ĉambron por poluri unu el la ŝildoj, sed en la sama momento kiam Romain enmarŝis, li trovis la junulon parade paŝanta kaj portanta kirason — tio estas, tiom da ĝi, kiom li povis buki sur sin. Kasko de prapatra famo restis sur la kapo, ŝildo sur brako, kaj masiva glavo ekbrilis heroe en la mano. Tiel armita, Pierre paradis tien kaj reen en la longa galerio kun mieno de kuraĝulo, dum li skermis kun imagaj malamikoj.

Kiam la pordo estis subite malfermita, kompatinda Pierre sentis spasmon de teruriĝo, lia kasko falis sur la plankon kun grandega klakado; lia glavo falis de la mano, dum la ŝildo, alfliksita al lia brako, iom servis kiel apogilo.

Li atendis riproĉon, sed je sia surprizo li aŭdis nenian vorton de mallaŭdo. Kontraŭe, la grafo vidante lin ŝajnis ĝoja.

„Fine mi trovis vin, Pierre, dank' al la ĉielo! Venu rapide, mi bezonas vin. Liberigu vin de tiuj stultaj aĉaĵoj. Jen Lemoyne, helpu lin eliri el tiu feraĵo. Konduku lin al mia tualetejo. Rapidu! Ne perdu tempon!“

Pierre, konfuzita kaj mutigita de mirego, baldaŭ sin trovis en la privata ĉambro de la grafo, kie li penis paroli, por senkulpigi sin kaj petegi pardonon. Sed li estis haltigata.

„Ne estas tempo por paroli“, insistis la grafo. „Nur aŭskultu bone. Penu kompreni tion, kion mi diros al vi. Lemoyne, tuj komencu vesti lin. Sidiĝu ĉi tie, Pierre!“

Neniam antaŭe Pierre sidiĝis en la ĉeesto de sia mastro, kaj fari tion nun estis preskaŭ neeble por li. Fine Lemoyne ekkaptis lin je la ŝultroj kaj devigis lin sidiĝi. Foje en seĝo, tie li restis, laŭkutime.

Pierre estis iom da sentaŭgulo, naskita kaj edukita ĉe la bieno; lia patrino mortis je lia naskiĝo. La aliaj servistoj lin nomis „*Crève-cœur*“*) pro lia deziro eviti laboron pretekste, ke li havas malfortan koron, kaj pro lia malgaja plendo, ke „laboro dolorigas lin ĉi tie“. Je tio oni kutime ridis, sed malgraŭ mokado li iel sukcese evitis laboron.

Dum li sidis observante, kun miro kaj senkomprenado, la eksterordinarajn movojn de Romain kaj Lemoyne, kiuj sin okupis je taŭga vestaĵo kaj diskutis pri ĉi tio kaj tio, estis malfacile trovi similecon inter li kaj la grafo.

*) Korĉagreno.

Stopla barbo difektis bone formitan mentonon, li estis ruĝhara, kaj la ĝenerala esprimo de lia vizaĝo, precipe kiam li parolis, ne estis konforma al la forto de liaj trajtoj.

Sed li ne estis sencerba, kaj kiam la grafo tre difinite klarigis al li pri la dezirata servado, Pierre rapide komprenis la celon de la miriga propono. Li ne nur komprenis, sed eniris en la spiriton de aventuro, kiu ebligas al li, ludi la rolon de grafo dum du tagoj — kaj, samtempe, li pensis pri la rekompenco promesita.

Miriga estis la aliformiĝo, kiu baldaŭ aperis pro ŝanĝado de vestaĵo, razado de lia vizaĝo, surmetado de pudrita peruko, tuŝeto de nigro sur la brovojn, gantoj sur la manoj kaj glavo ĉe la flanko. Jen sufiĉe bona anstataŭulo por trompi ĉiun ajn nesuspektantan oficiston tiel longe, kiel ĉi tiu kvazaŭgrafo tenas la buŝon fermita. Pri tiu gravaĵo li estis instruata multfoje.

„Lemoyne estos kun vi por fari ĉiom de la parolado. Atentu, ke vi neniam malfermu vian buŝon!“ admonis la grafo, dum li fiksis sur la bruston de la novebakita nobelo diversajn ordenojn, kiuj montris liajn rangon kaj identecon.

Post plua konsultado estis decidite, ke Lemoyne kaj lia gardato iros tra la arbarego de Sta. Germain, por eviti, se eble, konatulojn de la grafo.

„Kaj se tio okazos, nur rajdu rekte antaŭen, kaj ne parolu! Rememoru, via vivo dependas de la lango! — Ne malfermu la buŝon!“

Timema „*Crève-cœur*“ estis profunde impresita de la admono de sia mastro kaj promesis obei fidele.

Apenaŭ unu horon, post kiam la plano estis klarigita al Pierre, li kaj Lemoyne elrajdis el la kastela korto, precize kiam la ombro sur la granda sunhorloĝo montris sur la ciferon tri.

Ĉ A P I T R O * V

EN LA LANDON DE SILENTO

La sentoj de la du rajdantoj estis treege malsimilaj. Aventuro neniam estis alloga al Lemoyne kaj la nuna entrepreno plenigis lin per duboj. Ĉi tiu peno anstataŭigi patricion per servisto, kvankam dum nur unu tago, estas, li sciis, treege riska.

Post zorga observado de la lukse ornamita kaj parfumita figuro rajdanta ĉe lia flanko, Lemoyne rimarkis, kun iom da trankvilo, ke la vulgarulo bone tenis la kapon — la providenco estu laŭdata pro tio! — kaj rajdis kvazaŭ li estas kreskinta en la selo. Sed kiel li kondukus? Ha, jen la dorno, de kiu malfeliĉaĵoj povus dependi! — kiel li kondukus, se ili devos ekhalti ĉe gastejo? Ĉi tion li timis pli ol la gvardion ĉe la provinca landlimo.

Estis klare, ke Pierre ne pensis pri la graveco de la entrepreno, sed nur pri la rolo de grandsinjoro. Lemoyne, dum ili galopis antaŭen, donis multajn kaj precizajn instrukciojn pri sintenado, por eviti la eblajn kontraŭaĵojn, kiujn li timis. Pierre ĉiam respondis ĝentile kaj kun afabla obeemo, sed lia provinca akcento estis ridinda, venante el gorgo ĉirkaŭita de delikata punto kaj ĉenoj el oro.

Estis tamen ofte intertempoj, kiam nur la ritma frapetado de la ĉevalaj hufoj rompis la silenton. Lemoyne ne povis paroli pro maltrankvileco, kaj Pierre estis ankoraŭ forte impresita de la ordono, ke li „ne malfermu la

buŝon“. Ili rajdis en la arbarego kiel eble plej multe, kvankam, eĉ tiel, pli ol unu fojon ili renkontis rajdantojn.

Apud Port-Marly ili transiris la Seine per eta ŝarĝboato.

Dum la transiro Lemoyne observis la ĉirkaŭan pacan scenon; larĝaj perspektivoj de aŭtunaj kampoj, kie virinaj postrikoltistoj en mallongaj jupoj, pale ruĝaj, malhele verdaj, kaj kun plejdoj briligis la bildon. Tre malproksime, enfiksitaj sur montetflanko, similaj al pingloj starantaj sur kuseno, brilis la kalke blankigitaj dometoj de eta vilaĝo. Iliaj kadukaj muroj kaj enfalantaj tegmentoj estis kaŝataj en la nebuleto de malproksimeco. Tre proksime kuŝis la verdaj bordoj de la serena rivero. La Seine mallarĝiĝis ĉi tie kaj kurbiĝis simile al nova luno, kun randoj zorge enigataj sub kurbiĝantaj salikoj kaj alta, dika herbo. Ĝia trankvila, ekbrilanta supraĵo brilis simile al polurita metalo, escepte kie la rebrilo de longa, griza nubo similis la nebuladon de spiro sur spegulo.

Silento preskaŭ palpebla plenigis la tagon kaj horon. La solaj sonoj aŭdeblaj estis la plaŭdo kaj trempo de la boata stango kaj la persista krio de birdo, terura krio, kiel Lemoyne baldaŭ rimarkis. Sekvante la sonon de la ploranto, li vidis alaŭdon, kiu estis falinta de superpenda arbo en la riveron. La eta kreitaĵo havis rompitan flugilon kaj baraktis kompatinde por atingi la bordon. Sed la forto mankis, kaj baldaŭ la ridetanta, paca rivero serene englutis sian viktimon.

Super ĉio brilas la suno; sub ĉio atendas la tombo.

La okazaĵo malĝojigis la koron de Lemoyne. Pierre, ankaŭ observante, kviete sin krucesignis.

„Estas malbonŝanco vidi suferantan birdon“, li klarigis al Lemoyne tute naive; li estis treege superstiĉa.

Lasante la riveron, ili ĉirkaŭiris la arbaron de Vesinet; malgaja loko, kies legendon Pierre sciis bone. „La Arbaro

de la Perfidulo“ oni nomis ĝin, ĉar ĉi tie la kuraĝa kavaliro Roland estis kaŝe mortigita de sia servanto Ganelon.

Elirante post tempospaco ĉe alia kurbo de la Seine, ili retransiris kaj tiam eniris la arbaron de Sta. Germain. Ĉi tie Lemoyne sentis sin pli sendanĝera, ĉar malpli multe da homoj vojaĝis en ĉi tiu regiono ol en Vesinet. Sub la densa ombro de fortikaj kverkoj, ŝirmantaj ulmoj, glatŝelaj fagoj kaj betuloj, ili rapidegis antaŭen senhalte, kvankam unufoje, ĉe vido de kruco kaj sanktejo sur la vojo, Pierre volis halti kaj preĝi. La eta sanktejo signifis la lokon kie, antaŭ jaroj, banditoj mortigis viron. Lemoyne ne volis resti kaj avertis Pierre, ke estas malbonŝance stari, kie viro estas mortigita. Pierre silentiĝis kaj volonte daŭrigis la vojaĝon.

Baldaŭ ili aŭdis la fortajn batojn de hakilo kaj la aero pleniĝis de laodoro de freŝe tranĉita ligno kaj amasigitaj ŝtipoj. Ĉe la dometo de arbohakisto Lemoyne haltis por demandi pri la vojo. La bronzovizaĝaj laborantoj en longaj, malrigidaj, nelarĝaj-manikaj bluzoj fikse rigardis la rajdantojn, precipe Pierre, la pli grandiozan el la du.

„Pro ĉielo!“ diris unu el ili, „mi oferus ĉiujn fingrojn sur mia mano por esti granda sinjoro tia, kiaj ili“.

Pierre aŭdis la diraĵon kaj pro tio spertis la plej fieran momenton de sia vivo. Irante survoje, li tenis la kapon pli alte ol iam antaŭe kaj sentis sin vera princo.

Kvankam ekstere trankvila, Pierre, fakte, estis plena de eksciteco, interna agitado, kiu pligrandiĝis pro la progreso de okazaĵoj post la unua ekscita momento, kiam oni eltrovis lin en la armilejo. Lia koro batis ĉe liaj ripoj kiel freneza malliberulo ĉe la baroj de l' ĉelo por sin liberigi. Lia pulso frapis furiozan tamburadon, kiu sonis en liaj oreloj kvazaŭ infera bruego. Ofte antaŭe li sentis konfuzon de bruo, sed hodiaŭ ŝajnis kvazaŭ

tuta orkestro ludas post liaj tempioj. Nun super ĉio eksonis klare la blovo de klariono. Ĉi tio lin timigis; la sono estis preskaŭ supernatura — ĝi similis al malproksima ĉaskorno. Li malprecize pensis pri la trumpeto de Gabrielo kaj bedaŭris, ke li ne havis sufiĉe da tempo por sin krucesigni per sankta akvo antaŭ sia foriro kiel grafo.

Ho! ree la ĉaskorno eksonis. Sankta Patrino! tio ne estis supernatura! Ĝi estis io pli malbona. Li haltigis la ĉevalon kaj aŭskultis kun esprimo de agitado sur la vizaĝo.

Nun aŭdiĝis la sono de alproksimiĝantaj ĉevaloj, la bojado de hundoj, ekkrioj de ridado kaj la gajaj blovoj de ĉaskorno. Lemoyne ne bezonis plu por informiĝi pri la konsterniga fakto, ke la reĝo ne sekvis siajn planojn.

„Ĉielo nin helpu!“ li ekkriis per raŭka voĉo. „Tio estas la reĝa ĉasantaro!“

„Ni forlasu la vojon“, petegis Pierre pro subita teruro.

Ili turnis la ĉevalojn nur por eltrovi, ke la ĉasantoj estas proksimiĝantaj de ĉiuj flankoj.

„Ne parolu! ne parolu!“ admonis Lemoyne serioze. „Eĉ se la reĝo ordonos — ne parolu!“

„La reĝo!“ eĥis Pierre, kun cindra koloro sur la vizaĝo, dum la grandeco de lia danĝero venis al lia komprenado. Preskaŭ blinda pro timo li komencis elseliĝi kun la duone formita deziro surgrimpi arbon.

„Restu kie vi estas“, ordonis Lemoyne. Li elstreĉis brakon kaj per forta tenego penis malhelpi la desaltadon de Pierre, sed subite io igis lin eksalti de la propra selo kaj kuregi kun nova timo por helpi sian kunulon.

„Kio okazis al vi? Ĉu vi estas freneza, aŭ malsana?“ Lemoyne demandis senspire. Je tiu momento li vidis, kun kreskanta teruro, ke Pierre alpremis la manon al sia brusto, tiam ŝanceliĝis antaŭen kaj defalis.

„Pierre! Parolu al mi!“ Lemoyne, surgenue, freneze ekkaptis la falintan viron kaj kuŝigis lin sur la dorson.

Lia terurita rigardo vidis marmorblankan vizaĝon kun firme kunfiksitaĵ dentoj.

Kompatinda Pierre! estis nenia danĝero nun, ke li parolos! Li jam ŝanĝis la mastrojn, kaj la nova, same kiel la antaŭa, ordonis, ke li estu silenta. Malmulte ili imagis, ke, dum sia tuta vojaĝo, la pala ĉevalrajdisto rajdis laŭlonge, eletendante la manon por kapti la malfortan koron de Pierre, la kompatindan, malsaĝan koron, kiu antaŭ nelonge ŝvelis pro fiero.

Paralizita pro la subiteco de la kruela ekprenego de l' morto kaj la grandeco de la danĝero, Lemoyne staris senmova, senpova, konfuzita.

Dume la reĝa ĉasaro brue alproksimiĝadis. Iuj venis galope el diversaj direktoj disŝirante la arbustaron sub si; la ĉevaloj estis ŝaŭmantaj, altpaŝantaj, kun oreloj oblikve starantaj, viglaj pro la sonoj de ĉaskornoj. Ĉasantoj en helaj garnaĵoj kaj korteganoj en brilegaj kostumoj, orpasamentitaj kaj butonitaj, ekaperis tra la abarego kvazaŭ fragmentoj de belega sunsubiro.

Ĉiu rajdanto haltis vidante la viron kuŝantan sur la vojo. Ĉiu demandis al la alia:

„Kio okazis? Kiu li estas?“

Baldaŭ oni faris spacon, faritan por rajdanto pli grandioze vestita ol la aliaj. Li estis iom dika, sed kun impona sintenado, kun vizaĝo, kies tro pezaj vangoj kaj mentono ankoraŭ ne povis kaŝi la antaŭan belecon de liaj trajtoj. Liaj okuloj, kvankam grandaj, ne plu estis klaraj kiel ili estis, kiam ili estis konataj kiel la plej belaj bluaj okuloj en Francujo. *Louis Quinze**), kiu, je la aĝo de kvindekkvar jaroj, ankoraŭ sidis sur sia ĉevalo

*) Dekkvina.

laŭ reĝa maniero, havis pli taŭgan figuron por porti la reĝajn robojn, ol animon por manipuli la sceptron.

„Detenu la hundojn“, li ordonis, kaj tiam, vidante la teruritan Lemoyne, kiu dume ne povis trovi vortojn, li rajdis pli proksime kaj, rigardante al la senmova formo, demandis:

„Kio okazis al la grafo de Vrie, ke li falis tiel malalten?“

La nuanco de aroganteco kaj sarkasmo en ĉi tiu diraĵo komunikis al Lemoyne iom da kuraĝo. Lia menso, ĝis nun en ĥaoso de konsterno, subite agis rapide kaj klare. Li komprenis, ke la reĝo estas tute trompita. Rapide malagrafante sian mantelon, Lemoyne sternis ĝin milde super la palan, senmovan vizaĝon, dum li respondis kortuŝante:

„Li estas mortinta, Via Reĝa Moŝto.“

„Mortinta?“ ekkriis, kvazaŭ per unu voĉo, la reĝo kaj kelke da ili, kiuj estis apudaj. Multaj el ili elseliĝis, kaj ĉiuj estis demandantaj kaj parolantaj kun multa eksciteco.

„Ĉu okazis akcidento? Ĉu li defalis de sia ĉevalo?“

La klarigo de Lemoyne, „subita malforteco de la koro“, estis rapide portata de orelo al orelo. Tiuj preter la aŭdo de la reĝo esploris la aferon pli profunde.

„Lia Reĝa Moŝto donis al li leteron de eksigo hodiaŭ matene“, diris la grafo de Beringen, unua mastro de la ĉevaloj, fingre forigante falintan folion de sia ĉabrako.

„Kaj, kiel mi okaze scias, lia koro estis la celtabulo“, respondis la markizo de Livry, dua mastro de la ĉevaloj.

„Jes“, ridetis de Beringen, „kaj la pafo trafis! Kompatinda de Vrie! Ha — jen venas Madame la Marquise plengalope. Ni premu antaŭen; estos nun — atentu miajn vortojn — sceno de teatro, kiu superegos tiujn ĉe la *Petits Cabinets!*“

La sinjorinoj plejparte estis malantaŭe en la ĉaso, ĉar ili havis pli da intereso pri sia aspekto kaj siaj koketajoj, ol pri la ĉaso mem. Pro tio ili laste alvenis.

La spektakla alproksimiĝo de Madame Pompadour disigis la korteganojn. Ĉiuj okuloj observis ŝin, dum ŝi efektivigis per superega lerteco abruptan halton.

Estis ŝia aspekto, kiam ŝi aperis surĉevale, kiu unue gajnis la admiron de la reĝo. Ŝia lerteco kiel rajdantino estis ĉiam temo por laŭdo. „Nimfo de la Arbarego“, kaj „Diano de la Ĉaso“, li ofte nomis ŝin.

Hodiaŭ ŝi portis kostumon el verda veluro. Ŝia gaja trikorna rajdĉapelo, borderita de marabuaj plumoj, sidis sur mirinde pudrita hararanĝo. Ŝia vizaĝo kaj figuro montris belecon pli spiritan ol voluptan, kaj ŝiaj bluaj okuloj, kvankam ne grandaj, estis rimarkeble esprimo-plenaj. Ŝi donis impreson de vigla vivopovo; ĉiu ekrigardo kaj movo radiis viklecon.

„Kio okazis?“ ŝi demandis. „Io surpriza?“ — ekscita? — akcidento? — kia ĝi estas?“

Ŝi parolis kun la plej granda gracieco kaj gesto de francino, kaj ŝia voĉo havis strangan ĉarmon.

Madame du Hausset, ŝia korteganino, kiu alvenis al la sceno iom pli frue, unue sciigis ŝin. Je la nomo „de Vrie“ kaj la novaĵo pri lia morto, ŝia vizaĝo paliĝis kaj ŝi nerve mordis la lipojn. Ĉar la reĝo estis apud ŝi kaj, rimarkante la efekton sur ŝin, klopodis plue esplori ŝiajn emociojn, la subiteco de la situacio metis ŝin en embarasan dilemon.

„Tio okazas je stranga tempo! La grafo de Vrie vojaĝis pli malproksimen ol nia dekreto de ekzilo signifis.“

Madame Pompadour, ankoraŭ tro surprizita por hipokriti, rapide ekkriis:

„Ĉu li estas ekzilita? Mi ne aŭdis pri tio.“

Louis sulkigis la brovojn signife, dum li demandis kun sarkasma ĝentileco:

„Ĉu tio multe surprizas vin, Madame?“

Dume la markizino regis sin kaj kun gracia kapoklino respondis:

„Eble jes, ĉar sen ia dubo la saĝeco de Via Reĝa Moŝto en ĉi tiu okazo ricevas la konfirmadon de l' ĉielo.“

Ŝia respondo iom malpliigis la premegecon de la sceno, ĉar ĉiu sentis la malafablan humoron de la reĝo. Baldaŭ li sin turnis al Lemoyne kaj postulis pluajn sciigojn pri la morto de la grafo, dum aliaj el la ĉasantaro venigis konstruaĵon de kruda portilo, por porti la kadavron al la kasteleto.

Vidante, ke la reĝo atentis ion alian, Madame Pompadour firmintence elseliĝis kaj paŝis al la silenta formo nun ripozanta sur bedo el folioj.

„Ĉu li estas efektive mortinta? Eble oni eraras pri tio!“

Ŝi eldiris ĉi tiujn frazojn kiel kvazaŭan klarigon al tiuj, kiuj ŝin observis, kiam ŝi kliniĝis kaj parte malkovris la mortintajn trajtojn.

Konfuzita vizaĝesprimo tuj videbliĝis, ĉar ŝiaj akraj okuloj eltrovis — diferencon. Ŝi ekscite rigardis supren, sed ŝi ekvidis la dolorplenajn, petegajn okulojn de Lemoyne, kiu en teruro observis ĉiun ŝian movon — fakto, kiu klarigis la distritajn respondojn, kiujn li donis responde al la demandoj de la reĝo. Sed tiu sola ekrigardo sufiĉis por informi la markizininon.

Ŝi komprenis.

Per tremantaj manoj ŝi ree kovris la vizaĝon, kiu, kiel ŝi sciis, ne estis tiu de la grafo de Vrie.

Ŝi malvarmiĝis, komprenante la agon de Romain, kaj sentis svenon, dum ŝi pensis pri la eblaj rezultoj. Ŝia emocio malkaŝis sin pro streĉitaj lipoj kaj rapida spirado.

Rimarkante la surprizitajn vizaĝesprimojn de la ĉirkaŭstarantoj, ŝi ekdiris ion pri sia timo je la vido de l' morto.

Je tio, unu el la korteganoj elverŝis likvoron el sia ĉasboteleto en malgrandan pokalon kaj ĝentile pasigis ĝin al la markizino. Je tiu momento la reĝo alparolis ŝin.

„Via malĝojo estas evidenta. Ni kondolencas kun vi pri la perdo de tiel kara amiko.“

Tio estis danĝera momento por la Favoratino. La silento, kiu atendis ŝian respondon estis tiel intensa, ke la gardistoj poste asertis, ke la hundoj ĉesis treni siajn trenŝnurojn.

De Beringen ekrigardis al de Livry kun scianta trembrilo en siaj okuloj; ĉi tiu efektive estis „sceno de teatro“, ja aŭdinda.

Madame Pompadour levis la okulojn al la reĝo kaj rigardis rekte al li; brilo de koloro subplenigis ŝian ĉiam allogantan vizaĝon, kiam ŝi respondis per trankvilaj, firmaj tonoj:

„Mi ne perdis apartan amikon, Via Reĝa Moŝto! Ĉi tiu sinjoro ne estis pli al mi — ol tio!“ kaj per rapida ĵeteto ŝi malplenigis la enhavon de la vinglaso sur la nesciantan figuron ĉe ŝiaj piedoj.

Tiu ago surprizis ŝiajn rigardantojn kaj ankaŭ dispelis la densecon de sento ĉirkaŭ ŝi. Ĉiu povis vidi, ke la malplezuro de la reĝo malaperis. Li pie sin kruce signis, estante ĉiam superstiĉa kvankam neniel religia, kaj diris:

„Vi ne estas gardema, spitante la mortintojn, Madame; sole al ili mi riverencas.“

La arbaristoj jam kuŝigis la korpon sur la improvizitan portilon, kaj sub la direktado de Lemoyne ili ekiris kun sia ŝarĝo al la kabano de la arbohakisto, por havigi al si vagonon, per kiu oni povis reporti kompatindan Pierre — mortintan sed ankoraŭ maskumiĝantan — al la kastelo Vrieonne.

Dume la ĉasantaro demetis la ĉapelojn kaj silente observis la procesion, ĝis ĝi malaperis.

Tiam ĉiuj okuloj turniĝis al la reĝo, kiu malbonhumore anoncis:

„Sporto ne plu interesas min. Ni reiru al Versailles.“

Madame Pompadour surseliĝis per la helpo de kortegano, kaj paĝio tenis la ĉasĉevalon de la reĝo, dum li surseliĝis. La rajdantaro ekiris de la sceno malpli brue, ol kiam ĝi alproksimiĝis, kaj kun nenia peno pri ordo aŭ antaŭeco, ĉar la reĝo kutime formetis ĉiun ceremonion, kiam li estis en la arbarego.

Li rajdis flanke de la markizino, iom aparte de la aliaj, en profunda meditado natura al sia temperamento.

„Longan vojaĝon la grafo komencas hodiaŭ“, li diris kvazaŭ pensante laŭte. „Ĉiu el ni laŭvice devas veturi tiun vojon sola, tute sola. En tio kuŝas la teruro!“

„Reĝo devus neniam veturi sola; kun la permeso de Via Reĝa Moŝto, mi promesas iri kun vi, kiam venos la fina voko.“

La Pompadour parolis kun efekta seriozeco. Ŝi estis iom sincera, sed super ĉio, ŝi estis dramema; ĉia ajn ekscita parolo, kiu venis el ŝiaj lipoj, baldaŭ instigis en ŝia koro similan emociion.

Ŝia simpatia respondo al lia humoro eble estus foriginta la malgajecon de la reĝo, se je tiu momento ili ne estus ekvidintaj tombejon rekte antaŭ siaj okuloj. Ili eliris el la arbarego kaj jen troviĝis unu el la multaj, solecaj, rapide polviĝantaj vilaĝoj, kiuj karakterizis la regnon de Louis. Sur monteto super ĝi, simila al krono sur kadavro, estis la ŝtonpunktita tombejo, la tombejo kreskis, dum la vilaĝo malgrandiĝis.

„Tie“, montris la reĝo, „estas unu el la silentaj civitoj, kies loĝantoj neniam malpliĝas.“

Li haltigis la ĉevalon kaj alvokis sian grandan falkiston, la Duc de la Vallière de la Boume le Blanc, la nevon de Madame Pompadour. Louis mallongigis ĉi tiun nomon.

„Vallière!“ li vokis, „rajdu ĝis tiu tombejo kaj vidu por mi, ĉu troviĝas tie iuj nove fositaj tomboj⁵.“

Senprokraste obeante la reĝan ordonon, la granda falkisto baldaŭ revenis kaj raportis la eltrovon de tri nefermitaj tomboj.

„Ha!“ ĝemetis la reĝo, plena de la terura ideo, „do estas unu por ĉiu el ni, Madame — por vi kaj mi — kaj — de Vrie!“

Pompadour ekstremis je tiuj vortoj. Post momenta paŭzo, ŝi plej serioze anoncis:

„Vi alkondukis la morton tiel proksimen, ke mi timas pri la sendanĝereco de mia animo. Mi iru tien al la kapelo por preĝi.“

La reĝo ne konsentis.

„Estas Diservo tie nun; oni rekonos vin; la adorantoj estos ĝenataj.“

„Tio ne estas grava“, ŝi respondis. „Mi kovros mian rajdveston per la mantelo de Madame du Hausset.“

Tion ŝi faris, dum la reĝo ŝin observis, iom surprizite pri la efekto de la konversacio, kiun li mem komencis, tamen multe interesate.

„Ĉu vi ne venos kun mi?“ la Pompadour poste demandis, direktante sian ĉevalon al la kapelo.

„Ho, kompreneble“, li respondis sufiĉe ĝentile. „Kien ajn vi iras — ĉiuj sekvas. Sed mi ankaŭ bezonas mantelon por kaŝi mian identecon.“

Pompadour ridetis maltime. „Nur genuu, Via Reĝa Moŝto, tiam neniuj suspektos, ke tiu estas Louis Quinze.“

La reĝo ne atentis tiun diraĵon, kaj, akceptinte la mantelon de sia Granda Falkisto, li forrajdis kun la markizino.

Lasante la ĉevalojn kun la lakeoj ĉe la pordeto, ili marŝis preter la tombejo kaj eniris la etan kapelon de Sankta Cyr.

Neanoncitaj kaj nekonataj, ili ne estis rimarkataj; tia okazaĵo ĉiam estas fonto de mirego kaj surprizo al reĝantoj. La flegemaj kamparanoj surgenuantaj ĉe siaj rozarioj apenaŭ rimarkis la eniron de sinjoro kaj sinjorino en ĉaskostumoj sub manteloj.

Madame Pompadour, kun superema instinkto por efekto, klinis la kapon kaj formon sur preĝan benkon, kiu estis en rekta linio kun la lumo de fenestro el kolorigita vitro. Radio de oro miksita kun ruĝo iluminis ŝiajn kapon kaj manojn. La reĝo rimarkis kaj admiris.

Ne estis multo alia por atentigi lin en ĉi tiu senpretenda loko por preĝo. La povo de simpleco, la gracio de humileco, la forto de sincereco estis ecoj, kiujn li neniam komprenis. Li estis konscia nur pri la malvarmeta atmosfero en la arkaja navo, la gutantaj kandeloj, la kupra Madono, la neagrablaj pentraĵoj de mizeraj martiroj, la rigidaj statuoj de malĝojaj sanktuloj. Li malŝategis la zumadan voĉon de la pastro ĉe la altaro kaj la enuigan kantadon de la ĥoro dekstre, enfermita kaj duone kaŝita de malhela, penta kradaĵo. Laodoro de la svinganta incensilo naŭzis lin. Li volis, ke li estus restinta ekstere, kaj estis jam tion dironta, kiam io igis lin rigardi supren. Madame Pompadour ankaŭ levis la kapon.

La proza tonumado de la ĥoro estis interrompita de solovoĉa kanto. Tia afero, tute nekutima en la Diservo tiama, estis alprenita en ĉi tiu eta kapelo, simple ĉar Diodono trovis rifuĝon tie, kaj la monaĥinoj kaj novicoj, la ĥorknaboj kaj akolitoj kaj la maljuna abato mem ĉiuj laŭdis Dion tiom pli bone pro tio, ke ili aŭdis.

Hodiaŭ, je la komenco la tonoj iom ŝanceliĝis, simile

al la unua flugo de birdeto, sed baldaŭ ili altiĝis, liberaj, ĝojaj, sonoraj, kaj ŝajnis pleniĝi la malhelan altarejon per lumo. Eĉ nek la peza signifo de la vortoj, nek la solena kadenco de la muziko povis subpremi la fajreran brilegon de tiu voĉo. Ĝi portis sian propran anoncon de ĝojo.

Madame Pompadour, kiu treege ŝatis la belecon en ĉiu arto, sentis tujan intereson por la kantantino kaj deziris laŭdi ŝin.

Kiel rimedon por fari tion, ŝi donis orpecon, por almozo, al la pordisto post la Diservo kaj diris al li, ke ŝi deziras renkonti la junan solistinon.

Jam aliaj el la ĉasantaro vagis en la kapelon. Do, kiam Destine kaj la Patrino Supera venis antaŭen, ili trovis dudekon aŭ pli multajn el la altkalkanaj nobeloj ĉe la pordo.

Diri, ke neniu impresiĝis kaj interesiĝis, kiam la reĝo kaj Madame Pompadour eniris la kapelon, ne estus vere. Jen, fine alvenis „velura vesto“ kaj „ore garnita ĉapelo“! Kompreneble, la portanto ne estis li, kiun Destine serĉis, sed la ĉeesto de iu ajn nobelo en la kapelo de Sankta Cyr estis ekscita al junulino, kiu sekrete preĝis por precize tia okazaĵo.

De sia loko en la ĥorejo, Destine povis vidi, tra la malfermita pordo, aliajn el la ĉasantaro, kiuj restis ekstere. Ŝi kredis sen dubo, ke la grafo de Vrie estas inter ili. Li iĝis siajn amikojn, lin akompani! Kiam ŝi ricevis la alvokon, iri antaŭen, ŝia kredo eĉ fortiĝis. Ŝi ĝojis, ke ŝi havas lian puntan poŝtukon kun si, preta redoni ĝin al li.

Kiam la eleganta sinjoro ĉe la pordo parolis al ŝi, laŭdis ŝian kantadon kaj demandis ŝian nomon, ŝi donis tre embarasajn respondojn.

Madame Pompadour ne povis esti ne amuzata je la evidenta intereso de la junulino pri ĉio, kio okazas, ĉar ŝiaj brilaj okuloj vagis tien kaj reen, rigardante al ĉiu ano de la ĉasantaro.

Destine baldaŭ komprenis, ke ŝia „Kavaliro de la Arbarego“ ne estas inter la nombro, sed ŝi ankoraŭ ne povis disigi lin, en sia menso, de la nuna eksterordinara vizitado. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi ne devos perdi la oportunan okazon, por fari almenaŭ ian penon redoni tiun valoran puntan poŝtukon.

Dum la Patrino Supera parolis kun la aliaj sinjorinoj, Destine kuraĝis demandi demandon, post konvena genu-flekso, kaj petinte permeson de la „kompleza sinjorino“.

„Certe, mia kara, kio ĝi estas?“ demandis la Pompadour.

„Mi demandis min ĉu —.“ Destine ekrugiĝis kaj hezitis. „Mi scivolas — ĉu eble la grafo de Vrie estas konato de Madame?“

Nenia nomo sub la ĉielo, parolita de Destine, estus povinta pli mirigi la markizininon.

La reĝo, starante apude, mallaŭte ridis kaj milde diris:

„Madame, vi vidas, ke estas neeble, hodiaŭ eviti la grafon de Vrie!“

La Pompadour sulkigis la brovojn. Ŝi ne nur surpriziĝis, sed malplaĉis al ŝi, aŭdi tiun nomon de la lipoj de ĉi tiu junulino, sed ŝi ne kuraĝis montri intereson aŭ scivolemon, dum la reĝo ĉeestis. La situacio ŝin ĉagrenis, kaj ŝi abrupte turniĝis for de Destine kun la vortoj:

„La grafo de Vrie mortis hodiaŭ, Mademoiselle.“

La ceteraj ĉasantoj sekvis la Pompadour el la kapelo, lasante Destine, je la mirego de la Patrino Supera, strange malfeliĉa.

Ĉ A P I T R O * V I

OKAZAĴO ĈE SANKTA CYR

Pro ĉielo kaj la bona Sankta Cyr! Kial tiu junulino, kun sia buŝo plena de preĝoj, demandis pri la grafo de Vrie?

Ĉi tiu demando estis ofte en la cerbo de la Pompadour kaj ŝi multe volis scii la klarigon.

Malakorda noto ĉiam ŝajnas sonori plej laŭte kaj plej longe, kaj sammaniere tiu demando restadis en la memoro de Pompadour kun stranga kaj incita persisto. Simile al vesperto en farmtenejo ĝi loĝis en ŝia cerbo, flugetis, konstruis neston tie kaj maltrankviligis ŝian dormantan scivolecon ĝis tuta vekigo.

Ŝi estis ĝenita ankaŭ pri la rezulto de la ruiniga entrepreno de l' grafo de Vrie. Kion li intencis? Ĉu li perdis la prudenton? Ŝi ne aŭdis de li kaj ne sciis liajn estontajn movojn.

Baldaŭ ŝi estis plena de ekscito, indigna kaj kolera; ŝia burĝa sango bolis. Ŝi furiozigis pro la hazarda situacio, kiun ŝi travivis en la arbarego de Sta. Germain. Longan tempon ŝi bezonis, por dispeli la rememoron de tiu maltrankvila horo, kiam ŝi apenaŭ savis sin de la malplezuro de la reĝo.

La amo de Romain fariĝis tute tro ĝena. Ŝi akceptis lian amon kiel aferon naturan, ĉar ŝi estis belega koketulinino kaj li estis bela adoranto, ĉio cetera sekvis laŭnature.

Sed ŝi neniam imagis, ke lia ardo kondukus lin ĝis tia miriga malsaĝaĵo, ke li farus maskigadan ruzon kon-

traŭ la reĝo. Ŝi ne povis ne admiri la riskeman kuraĝon de Romain, eĉ dum ŝi estis ĉagrenita, sed ŝi efektive sentis ankaŭ veran timon.

Kie li povus esti? Ŝi sciis, ke li vivas. Se oni eltrovus lian identecon, ĉielo lin helpu! — kaj ĝi helpu ankaŭ la Pompadour! Unu streko de la reĝa plumo, unu vorto el la lipoj de Louis — kaj ŝi kvazaŭ ne plu ekzistus. La lokoj, kiuj nun konas ŝin, neniam poste konus ŝin.

Ŝi ekstremis je la penso.

Se ŝi nur povus ricevi sciigon de Romain aŭ komuniki kun li, ŝi forte atentigus lin pri la fakto, ke li endanĝerigis ŝin kiel ankaŭ sin mem, tiel freneze spitante la reĝon.

Tiel ŝiaj pensoj sekvis unu la alian, ĝis tiu malaminda demando kvazaŭ ungumadis kaj elgratadis ĉiom da ŝiaj glatigitaj rezolucioj.

Kial, pro la nomo de la Sankta Virgulino, tiu modesta, humilema, juna kreitaĵo demandis pri la grafo de Vrie?

Kaj kie li sin kaŝas?

La necerteco grade malsanigis ŝin. Pasis kvar tagoj. Sanktaj martiroj! Ĉu de Vrie elpensis tiun eviton de la reĝa ordono pro amo al alia virino?

La penso donis tute novan koloron al la flama indigno de la Pompadour. Eble tiu bela, duone matura, ne senplumigita junulino posedis solvon de la tuta mistero! Mil tondroj! jen afero, kiun ŝi baldaŭ decidus!

La markizino fortege ektiris la sonorilŝnuron ĉe sia flanko — ŝi ankoraŭ kuŝis en la lito, kvankam estis jam tagmezo — kaj alvokis Madame du Hausset, instigite de subita decido. Ŝi sciigis, kion la junulino havas por diri pri la grafo de Vrie; farante uzon de la tuto de sia virina lerteco, ŝi eltirus ĉiun sekreton el ŝia animo.

Kiam la korteganino alvenis, Madame Pompadour ordonis, ke ŝi iru tuj al Sankta Cyr.

„Tie troviĝas junulino — ŝian nomon mi forgesis, sed facile vi trovos ŝin — kiu kantas solojn en la kapelo, havas voĉon de anĝelo, vizaĝon similan al Fra Angelico, kaj parolas stulte. Alkonduku ŝin ĉi tien. Diru, ke mi deziras, ke ŝi kantu por mi.“

Kaj do okazis tiun tagon, kiam la lernantinoj kaj instruistinoj de Sankta Cyr leviĝis de sia tagmeza manĝo en la granda, malgajega manĝejo, aŭdiĝis brua klakado de ĉevaloj kaj radoj, kaj tintado de arĝentaj ornamaĵoj en la korto malsupre. Tuj la knabinoj kaj junulinoj kun blankaj antaŭtukoj kaj modestaj hararaĝoj kuregis al la fenestroj, de kie ili vidis brilegan vidon: belan kaleŝegon tute bluan kaj arĝentan, blankajn ĉevalojn kun flugantaj kolharoj, lakeojn livree vestitajn, veturigistojn kun pudritaj haroj.

Eleganta sinjorino en la kaleŝego parolis al la pordisto, kiu poste helpis ŝin deiri kaj gvidis ŝin en la pordojn de la akcepta vestiblo.

Multaj estis la ekkrioj de miro, kiuj venis de la lipoj de la junulinoj ĉe la fenestroj, sed tiuj estis mildaj kompare kun la ekkrioj, kiam baldaŭ poste Fratino Thérèse eniris kaj anoncis, ke Destine de Vârel devas tuj pretiĝi, por fari viziton al la Kasteleto de Bellevue, kie loĝas Madame la markizino de Pompadour.

Ke Destine estis lastatempe kvazaŭ la favorato de l' sorto, ĉiu junulino ĉe Sankta Cyr devis konfesi. Ŝia renkonto kun la kavaliro, rakontita de Fratino Thérèse, plengigis iliajn junajn korojn per sufiĉe da envio, kaj la okazo ĉe la kapelo estis pli ol ili povis toleri. Ili reciproke interkonsentis, protekti Destine kontraŭ la danĝero de tro granda fiereco per tuta indiferenteco por ŝi mem kaj ŝia voĉo. Sed kiam sukceso iras preter ia nedifinebla

linio, ĵaluzo, ĝis nun evitebla, subite ŝanĝiĝas kaj kuregas antaŭen kun brakoj eletenditaj, pretendante esti amiko.

La invito al Bellevue metis Destine preter la limo de envio, kvankam ŝi estis tro mirigita kaj ekscitita por rimarki la subitan varmon de siaj junaj kunulinoj.

Iuj sekvis ŝin al ŝia ĉambreto kaj enpuŝis sin por helpi por la vestado, dum aliaj staris ĉe la pordo kaj en la koridoro, ĉiuj parolantaj, ekkriantaj, gestadantaj, scivolemaj, admirantaj, demandantaj.

„Vi rakontos al ni ĉion, kion vi vidos, ĉu ne, Destine?“ diris Fanchon, kiu ne estis parolinta al ŝi dum la lasta semajno.

„Kaj se ili ordonos, ke vi kantu, mi petas, ke vi kantu *„Laudes Domini“*. Tiu estas la plej bela kanto, kaj vi kantas ĝin bele.“

Adrienne pinglis en ĝian lokon neregeblan buklon, dum ŝi parolis.

„Eble vi vidos la reĝon!“

Ili ĝemetis pro miro.

„Aŭ la reĝinon!“

Destine dubis pri tio, ridis nerve kaj asertis, „ke la afero estas tiel ekscita, kiel Unua Komunio!“ Fratino Therese estis iom ŝokita, sciante bone, ke ekzistas malmulte da simileco inter Unua Komunio kaj vizito al la Pompadour. Sed ŝi sciis, ke la komparo prezentis sin nur, ĉar Destine estis surmetanta simplan komunan robon el mola, blanka silko, ĉiam rezervita por grandaj okazoj. Ĝi ŝajnis al Fratino Thérèse simbola kaj konvena, ĉar ŝi malprecize sentis, ke eble la junulino bezonos protektan influon.

Eble ŝajnas strange, ke oni tiel libere konsentis al tiu neatendita invito al la „Pentrita Tombo de Versailles“ — kian nomon la popolamaso ofte donis al la loĝejo de

Madame Pompadour. Sed kion ajn ili opiniis, la fakto restis, ke invito de la reĝa Favoratino estis eĉ pli ol invito, preskaŭ egala al ordono. Madame Pompadour ĉiam penis sekvi la ekzemplon de sia eminenta antaŭulino, Madame de Maintenon. Ŝi ofte en antaŭaj tagoj esti malpleniginta sian monujon en la pordonacajn monkofrojn de Sankta Cyr, kaj la almozo de la markizino estis ĉiam malavarega. Akompanante la peton pro vizito de Mademoiselle de Vârel venis granda donaco, kiun la Patrino Supera tute ne volis rifuzi. Madame du Hausset portis ne nur la donacon, sed ankaŭ la inviton.

„Madame de Pompadour estas tiel ravita de via voĉo tiun tagon en la kapelo“, ŝi diris al Destine post la prezento de la Fratino Supera, „ke ŝi volas aŭdi vin kanti kelke da siaj komponaĵoj“.

Destine ne povis kaŝi siajn plezuron kaj surprizon.

„Ĉu la bela sinjorino, kiu parolis al mi en la kapelo estas la grandioza markizino?“

La Patrino Supera ridetis. „Mi rekonis ŝin, sed mi ne sciigis vin, ĉar mi vidis, ke ili deziris resti nekonataj. Sed rapidu, Destine, vi ne devas deteni Madame du Hausset. Permesu, ke mi ligu vian kufon.“

Ŝi kisis la junan vizaĝon, dum ŝi faris tion, kaj diris: „Adiaŭ, etulino; estu bona knabino, kaj Dio vin benu kaj gardu!“

Tiam oni helpis Destine en la mirindan kaleŝegon flanke de la ĉarma grandioza sinjorino. La du lakeoj per unu sola salto atingis siajn lokojn malantaŭe kaj staris kiel statuoj, dum la veturigisto parade svingis la vipon, kaj la kaleŝego forruliĝis al la centro de la universo — Versailles!

Al la junulinoj, kiuj restis ĉe Sankta Cyr, ŝajnis kvazaŭ la sunsubiraj pordegoj fermiĝas kaj, ke Destine estas foriranta al la lando de oro kaj gloro.

Ĉ A P I T R O * V I I

KANTO DE FIDO KAJ RIKANO DE DUBO

Dum la veturo al Bellevue Destine estis tre okupata, respondante al fluo de demandoj de Madame du Hausset, virino kun agrabla vizaĝo kaj graseta, belaspekta figuro, kiu havis senofendan, tamen persistan, scivolemon pri ĉiu kaj ĉio.

Ŝi demandis per serena, afabla, neinterrompita monotono pri la jaroj pasitaj de Destine ĉe Sankta Cyr. Ĉu ŝi amas la monaĥinojn? Kiun aĝon ŝi havas? Ĉu ŝi rememoras siajn gepatrojn — ambaŭ? Kie ili loĝis? Ĉu ŝi havas fratojn kaj fratinojn? Ĉu ŝi iam sentas solecon? Ĉu ŝia patrino estis kantistino aŭ ĉu ŝia patro amis la muzikon? Kiu enirigis ŝin en la monaĥinejon de Sankta Cyr? kaj multaj aliaj similaj demandoj.

La multnombraj kaj ŝajne sencelaj demandoj embarasis Destine, kaj kiam ajn tio okazis, ŝiaj palpebroj havis kutimetan, dekurbiĝintan iomete, kvazaŭ por ŝirmi la emocion. Ili releviĝis tuj, kiam ŝi estis trankvila; ŝia natura kuraĝo tiam respondis, kaj ŝi povis rigardi rekte al sia demandanto per paro de grandaj, pensemaj okuloj.

Madame du Hausset interesiĝis pri ĉi tiu kaŝo kaj ŝerco de timemo kaj kuraĝo. Ŝi ne malgrandigis siajn demandojn, sed ŝanĝis sian metodon, demandante pri la monaĥinejo, la lernantinoj tie kaj kiel ili sin okupas.

Destine parolis kun vigleco pri la bela brodaĵo, kies faradon la fraŭlinaro instruas, kaj rakontis pri la mirinde

belaj altaraj tukoj kaj ornatoj, kiujn ili faris kaj vendis al la katedraloj. Ŝia vizaĝo heliĝis pro entuziasmo, dum ŝi parolis pri la floroj, kiujn ili kreskigis kaj sendis ĉiusemajne al la bazaro en Bouviers.

Poste Madame du Hausset atentigis ŝin al la vido el la kaleŝega fenestro.

„Baldaŭ ni vidos la kasteleton; jen estas la pordegejo.“

La demandoj kaj konversacio tiom okupis la atenton de Destine, ke ŝi ne povis tute ĝui la pejzaĝaron laŭ la vojo, nek la mirindan senton de veturado en tiu belega kvazaŭ cindrulina kaleŝego.

Ili eniris la belan parkon de Bellevue kaj povis vidi malproksime la turetplenan kasteleton, alte sur impona altaĵo kun terasoj kondukantaj ĝis la rivero Seine. La kaleŝvojo rondiris la malgrandan monton, malkaŝante ekvidojn de malproksimaj kampoj, malaltaj montetoj kaj boskaj valoj, ĉiuj kunligitaj de la brila eta rivero, kiu kvazaŭ ĉirkaŭpremis la teron simile al arĝenta ĉeno. En la oriento oni povis vidi klare la murojn kaj turpintojn de Parizo, kaj egale klare en la kontraŭa direkto elstaris la masonaĵo de Versailles — ĉar Bellevue estis mezvoja inter Parizo kaj Versailles.

Fantazia arbustaro ornamis la belegajn herbecajn spacojn de la parko, kaj artefaritaj kaskadoj, kiujn senlace gardis mardioj, blankaj kaj fantomaj, senĉese elverŝis akvon el potoj faritaj el polurita ŝtono.

Destine, kvazaŭ ensorĉita, rimarkis la statuojn de bakĥantinoj kaj satirusoj, kiuj ŝajne elrigardis el foliecaj enfermaĵoj, dum ĉe ambaŭ flankoj de la kaleŝvojo staris kolonoj festonitaj de kreskantaj vinberoj.

Fine ili atingis la grandiozan kasteleton, kiu estis desegnita kaj konstruita sub la persona direktado de la Favoratino. Kiam la kaleŝego haltis, du lakeoj, kiuj

ŝajne leviĝis el la tero, atendis por helpi la du sinjorinojn, Madame du Hausset kaj Destine, deiri.

Larĝaj marmoraj ŝtupoj kondukis supren ĝis la grandaj enirejaj pordoj de Bellevue, garditaj de svisaj grenadistoj, same kiel ĉe la *Palais Royal**).

Madame du Hausset pasis kun Destine tra ŝajne senfina labirinto de marmoraj koridoroj, kiujn gardis senmovaj lakeoj vestitaj en la purpura kaj ora livreo de Bellevue.

Post kiam ili estis demetintaj siajn mantelojn en la apartamento de Madame du Hausset, tiu sinjorino kondukis la junulinon en la grandan buduaron de la markizino, kiu, ĉirkaŭite de sinjorinoj kaj korteganoj de diversaj rangoj, estis akceptanta siajn intimajn geamikojn.

Konfuziga ja estis la vido al Destine; la sono de multaj voĉoj kaj kultura ridado, interrompita intertempe de Gourbellon, la servisto, kiu anoncis la nomojn de novevenantoj, estis konfuza kaj tute nekomprenebla.

Ĉar lia voĉo estis la plej laŭta, lia figuro la plej alta, kaj lia vestaĵo la plej brila, Destine unue supozis, ke Gourbellon nepre estas la reĝo.

Madame du Hausset penis informi ŝin pri la diversaj gravaj personoj, kiuj ĉeestis.

„La sinjoro, kiu ĵus alvenis, estas Monsieur de Marigny, la frato de Madame de Pompadour^e, kaj la persono, al kiu ŝi parolas estas D-ro Quesnay, ŝia kuracisto.“

„Kiu estas la markizino?“ demandis Destine.

„Tie, sur la divano, ĉu vi ne vidas? — ĉiuj aliaj staras.“

La pentrinda anaro, kiu kolektiĝis ĉirkaŭ la divano, estis nereala al Destine kaj fantazia kiel figuretoj el

*) Reĝa palaco.

Sèvres-porcelano. Ŝi vidis vizion de rozkoloraj kaj blankaj sinjorinoj en flordeseĝnaj silkoj, kun krinolinoj, beligaj plastretoj, pudritaj haroj, kaj de sinjoroj vestitaj en frakoj el atlaso, kiuj multe riverencis kaj faris uzon de nazumoj. Ŝajnis strange, ke la figuroj efektive parolis, kaj ke ŝi kelkfoje aŭdis parolojn.

„D-ro Quesnay tremas pro timo, ke la reĝo aperos“, ŝerce diris la markizino, „li ĉiam embarasiĝas ĉe Lia Moŝto!“

La fama ĥirurgo klinis la kapon kaj senprokraste respondis: „Madame, vi estas prava. Kiam ajn mi estas ĉe la reĝo, mi diras al mi — jen estas homo, kiu povus ordoni mian kapon for de miaj ŝultroj!“

(„Dio mia!“ pensis Destine, „kia terura penso!“)

La ĥirurgo daŭrigis: „Kaj ĉi tiu ideo, Madame, maltrankviligas min!“

„Do, portu vian kapon hodiaŭ konfideme, ĉar la reĝo ne ĉeestos.“

Plaĉis al Destine aŭdi tion.

Estis aliaj anaroj en la ĉambro, iuj malgrandaj kaj aliaj grandaj, konstante ŝanĝantaj kun kalejdoskopa efekto. Al vireca junulino, bela kaj parfumita, kiu estis parolanta kun Monsieur de Marigny, Madame du Hausset elmontris kun la klarigo:

„Tiu estas Madame de Mirapoix, la edzino de nia ambasadoro al Anglujo!“

„Ĉu la ambasadoro ĉeestas ankaŭ?“

„Ne, kompreneble ne; li estas en Anglujo, ŝi nepre ne restas ĉe li, ĉar la klimato difektas ŝian vizaĝkoloron.“

Inter la maloftaj frazoj hazarde aŭditaj de aro de sinjoroj starantaj apude, la esprimo „*Encyclopédie Universelle*“ estis elstara.

„Mi faros ion por helpi la grandan verkaĵon; mi verkos traktaton pri — punktoj — kio ajn!“ diris eta, malgrasa, ironieaspekta viro, kun okuloj similaj al la pintoj de du rapiroj. Destine estis demandonta, kiu li estas, kiam Madame du Hausset atentigis ŝin al io alia.

„Ĉirkaŭen turnu vin, kiam vi povos, kaj vi vidos la Princon de Condé; li estas la posedanto de kvincent flartabakaj skatoletoj.“

La princo tenis en la mano unu el tiuj skatoletoj, ĵus proponinte iom da ĝia enhavo al sia kunulo, kiu, evidente rekomencante la temon de ilia konversacio, nun diris:

„Li estis kortegano superega, valora kunulo kaj sperta pri multaj aferoj. Li rekomendis al mi mian gantparfumiston.“

La princo eklevis la ŝultrojn kaj diris: „Kompatinda de Vrie!“

La koro de Destine preskaŭ ĉesis bati, ŝi haltigis la spiron kaj atente aŭskultis, por aŭdi plu. Sed je tiu momento la markizino ŝin alparolis. Estis evidente, ke la Pompadour estis konscia pri la ĉeesto de Destine de la momento, kiam ŝi eniris la ĉambron.

„Mademoiselle, bonvolu kanti por mi.“

Destine konsterniĝis, trovante sin en pozicio tiel elstara, ŝi ruĝiĝis kaj hezitis.

„Ho, Madame, mi lernis nenian muzikon krom nia ĥormuziko.“

„Tute bone“, interrompis la gastigantino, ne malafable, „tamen, kantu pri infaneto Jesuo! — estos io nova.“

Neniu paliĝis je ĉi tiu blasfemaĵo, ĉar tia estis tipa por la epoko.

Destine apenaŭ aŭdis la diron; ŝi estis tro interesata pri la tasko antaŭ si.

„Kantu por mi tiun solon, kiun mi aŭdis en la kapelo lastan semajnon. Mi rememoras la temon kaj eble el-pensos akompanaĵon.“

La markizino paŝis al bele ornamita klavicimbalo*). Talenta kaj sperta pri la arto muzika, Madame Pompadour, per sia majstra ludado subtenis kaj kuraĝigis la junan kantantinon, kiu baldaŭ sentis nur la raven de la kanto kaj la mirindan akompanaĵon, kiu portis ŝiajn tonojn kvazaŭ lilioj sur lago, kaj ŝi kantis kun voĉo kaj spirito akordigitaj al la sankta temo. La simpleco de ŝia monaĥina vestaĵo, la natura gracio de ŝia knabineca figuro, la sen-konscia seriozeco de la vizaĝesprimo — ĉio faris ĉarman bildon. Tia neornamita beleco en tiu orumiĝinta buduaro similis arbaran burĝonon en bombonujo.

„Dolĉa rezedo en sankta vazo!“ afable kriis la princo de Condé, kuniĝante en la aplaŭdo, kiam la muziko finiĝis.

Destine restis apud la muzikilo, kuntiriĝante for de la aro, kiu kolektiĝis ĉirkaŭ Madame Pompadour. La maldika, eta viro kun la penetrantaj okuloj faris sian vojon al la junulino!

„Pri kio vi pensas, Mademoiselle, kiam vi kantas tia-maniere?“ li demandis abrupte. Destine unue mallevis la okulojn, tiam subite rigardis al li nekaŝeme, kaj diris:

„Mi pensas pri tio, kion mi kantas; se la kanto estas preĝo, mi pensas, ke mi estas preĝanta.“

„Ĉu vi preĝas, Mademoiselle?“

Nenio povis egali la lakonecon de liaj demandoj, sed estis io alloga en ilia absoluta rekteco, kiu senigis eĉ Destine de memkonscieco. Kvankam timema, ŝi posedis

*) Instrumento, kiu ĝis la fino de 1' 18-a jarcento ludis preskaŭ la saman rolon, kiel hodiaŭ la fortepiano.

ennaskitan forton, kiu vekigiĝis, kiam oni malplej atendis tion. Tiu povo evidentiĝis per ŝia nuna trankvileco, kiam ŝi respondis:

„Jes, Monsieur; ĉu vi ne?“

„Ne“, estis la tuja respondo. „Mi nek kredas pri preĝo, nek pri senmorteco. Sed plaĉas al mi, aŭdi pri la kredoj de aliaj. Mi petas, ke vi diru al mi, kial vi preĝas?“

Destine, subite agitata de prozelita spirito, iom hezitis, kaj tiam respondis serioze, kun okuloj tre brilaj kaj vangoj tre ruĝaj:

„Ĉar, Monsieur, mi opinias — ŝajnas al mi — pli sendanĝere.“

„Kion vi intencas per ,pli sendanĝere‘, Mademoiselle?“

Je ĉio tio ĉi Destine enpensiĝis. Liaj demandoj estis tiel mirigaj. Sed ŝi baldaŭ trovis kuraĝon klarigi:

„Estas minacoj pri eterna puno, se oni ne preĝas, sed neniam mi aŭdis pri tiaj, se oni preĝas.“

Esprimo de amuzo vidiĝis sur la kutime rikana vizaĝo de la demandinto, sed li tro respektis ŝian seriozecon kaj ŝian Junecon, por montri eĉ nuancon de sarkasmo en sia respondo.

„Via logiko estas bona, Mademoiselle, kaj mi ne volus, ke vi kredu alie. Espero estas la ĉefa ĉarmo de juneco. Se la birdido pensus pri timo kiel ankaŭ pri libereco, ĝi neniam flugus; se la rozburĝono pensus pri ventego kiel ankaŭ pri sunbrilo, ĝi neniam florus. Sed ne estu konfuzata pri mi, Mademoiselle, mi estas meteoro, falinta de l' ĉielo sur la teron, kaj fariĝis ŝtono, malmola, malfacile movebla, malfacile moligebla.“

Aperis subita ĉarmo en la rideto, kiu lumigis liajn nepenetreblajn trajtojn, kiam li aldonis:

„Viaj vortoj egalas vian kanton je valoro, kaj mi esperas, aŭdi ambaŭ denove. Ĝis revido, Mademoiselle!“

Li kisis ŝian manon, ago de ĝentileco tute nova al Destine, kaj tiam formarŝis. Madame du Hausset iris al la junulino kaj diris:

„Mi timas, ke la Patrino Supera riproĉos min, ĉar mi permesis tian longan interparoladon. Pri kio vi parolis? Viaj vangoj estas similaj al ruĝaj rozoj!“

Destine estis ankoraŭ sekvanta per siaj okuloj la strangan etan homon, nun kisanta aliajn blankajn manojn kaj kapoklinanta siajn adiaŭojn.

Sed ŝi aŭdis la vortojn de Madame du Hausset kaj respondis:

„Ni parolis pri religio. Mi estis diranta al li, kial mi kredas je preĝo.“

„Sankta koro — la infano estas predikinta al Voltaire?!“

MULTE DA BRUO PRI NENIO

La gastoj foriris, kaj oni forsendis ĉiujn aliajn. Destine kaj la belulino de Bellevue estis solaj. Beleta sceno sekvis — beleta ludo de subtileco kaj sincereco. La markizino tre artifika en sia peno sciigi pri tio, kion laŭ ŝia supozo la junulino deziras kaŝi. Destine, tima, maltrankvila; tute nescia pri la intenco de la markizino.

Ĉi tiu komencis per delikata tuŝo de miksitaj gajeco kaj afableco. „Venu ĉi tien, vi eta sanktulino kaj pekulino! Ĉu mi ne aŭdis, ke sinjoro Voltaire tiel nomis vin? Sidigu ĉi tie apud mi sur la divanon.“

La markizino ŝajnis energia, eĉ kiam ŝi duone kuŝis, ĉiam estis io intenca en ŝia pozo. Ŝi apogis sin gracie kontraŭ la malvokoloraj atlasaj kusenoj, sed estis decido en la ritma svingo de ŝia ebura ventumilo. Ŝiaj piedoj en rozkoloraj pantofloj, eliĝantaj el ŝaŭmo de falbaloj, estis krucigitaj kaj suprenturnitaj decide sur orbrodita kuseno. Unu juvelita, punte drapirita brako ripozis firme sur la dorso de la divano.

Destine, iom time, tamen kun la natura gracio, kiun abunda sano komunikas, sidigis sin flanke de ĉi tiu grandiozeco.

La markizino parolis gaje.

„Mi deziras koni vin pli intime, mia karulino. Ĉu vi scias, ke vi kantas simile al anĝelo?“

Destine murmuris „dankon“, sidigis sin iomete pli mal-

antaŭen sur la divano kaj time admiris la flordesejne silkan robon de Madame Pompadour.

„Sed diru al mi“, la markizino daŭrigis, „ĉu estas vere, ke vi scias neniun muzikon krom ‚Ave‘ kaj ‚Miserere‘ kaj tiuj aliaj Patrino-Mario-kantoj?“

„Tiuj estas ĉiuj, kiujn mi iam kantis ĉe Sankta Cyr.“

„Dio mia! vi nepre devas vivi tie simile al serafoj ĉirkaŭ la Eterna Trono. Ĉu vi scias, mi havas ideon, ke la muziko de l' ĉielo nepre estas tre teda! — ĉiom da ĝi dutempa takto kaj plennotoj! Mi estas certa, ke mi penos reformi la metodon tuj post mia alveno tie; mi enmetos kelke da diabletaj ornamaĵoj, iom da impertinentaj stakatoj kaj enpuŝos multajn deksezonajn notojn kaj frivolajn trilojn!“

Destine ekstremis kaj konfuziĝis pro tia indiferenta maniero rigardi en la eternecon, por vigligi la konversacion.

Sed ĉi tiuj vortoj kaj tiuj, kiuj sekvis, estis nur antaŭparolo al la afero plej supra en la menso de la Pompadour. Ŝi diversfoje ekrigardis la junulinon, kaŝe, tamen senerare mezurante ŝiajn ĉarmojn. „Simila al kerubo kun tipo de vizaĝo simila al holanda kaĥelo“ estis la interna konkludo de la Pompadour; „escepte de la okuloj! — jes, ili estas eksterordinaraj“, tion ŝi devis konfesi. Io en ili devigas, ke oni danku al Dio por ĉiu peko evitita! Tiaj okuloj kaj tia voĉo! La markizino kvazaŭ levetis la ŝultrojn — jen ĉarmoj sufiĉaj por kapti ĉiun viron!

Sed super tiu subprofundo de kalkulado la konversacio fluis afable antaŭen. La markizino parolis al Destine pri la larĝa amplekso de muzika komponado, laŭdante la operojn kaj precipe la teoriojn kaj superprogresajn ideojn de Gluck, kiu je tiu tempo estis en sia zenito.

„Kun li la granda opero, kiel ni nomas ĝin, fariĝas la krono de l' komponista arto! Ĝi estas vivo adaptita al muziko! tragedio akordigita en harmonion! emocio matriigita en sono!“

Destine aŭskultis kun larĝokula miro kaj plezuro. Ŝi volus kanti tian muzikon.

„Neeble, dum vi estas enkaĝigita en tiu monaĥinejo — vi kompatinda birdeto de paradizo, kantanta preĝojn kaj laŭdon!“

La markizino ludeme pinĉetis ŝian vangon. „Mi estas certa, ke neniu iam aŭdis vian kantadon, escepte monaĥinoj kaj pastroj ĝis tiu tago, kiam mi okaze vagis en la kapelon de Sankta Cyr! Ĉu jes?“

La demando estis lerte intencita, por eligi la nomon de l' grafo de Vrie — kaj tion ĝi faris. Destine estis fiero, ke ŝi povis diri, ke unufoje ŝi kantis por grafo.

Estis domaĝe malŝpari tiom da arto, kie la dezirita respondo estis havebla nur por peto, sed estis la naturo de la Pompadour, apliki la arton teatran al ĉiu okazo.

Post pluaj demandoj, Destine rakontis pri la okazintaĵo en la arbaro; ŝi rakontis, kiel oportuna estis la alveno de la nekonatulo, pri lia helpo, la rajdo ĝis la monaĥinejo kaj lia foriro, kaj ke li ne diris sian nomon.

Ĉion tion ĉi la markizino interpretis kiel nuran prologon al profunda kaj ekscita romano. Ŝi nepre intencis, ricevi pluajn sciigojn, sed subtenis manieron tute indiferentan.

„Kredu min!“ ŝi ekkriis gaje, leviĝante kaj irante al la klavicimbalo. „La afero estas taŭga temo por opero:

„La virgulino de Sankta Cyr,

Kaj la gaja kavalir’!“

aŭ io simila.“ Tiam kun ŝajna seriozeco ŝi montris al Destine, kiel fari operon el la rakonto.

„Unue ni havas la muzikon de la arbaro, en la orkestro fluo de serena, paca harmonio, super kiu la direktisto svingas sian taktobastonon kaj de ie fiŝkaptas kelkfojan melodion.“

Kelkaj gestoj en la aero servis ĉi tie kiel ilustraĵo.

„Tiam sekvas via malferma solo, en la formo de valso, ĉar vi estis feliĉa kaj facilkora ĝis nun. Ĉiam rememoru, ke en granda opero ni havas vivon adaptitan al muziko: ĉiu rido — arpeĝo*), ĉiu ĝemeto — portamento*), ĉiu larmo — tono. Korpan doloron oni ilustras per akra disonanco aŭ malakordo.“ Madame Pompadour frapis la pikantan „malpliigitan sepan“ sur la klavojn.

„Tio rakontas pri via kaptita piedo. La latunaj muzikiloj ekkriegas krakegantan akordon, la violonoj kvazaŭ elsegas malgajan temon, sed subite ni aŭdas ion tre malsimilan — la sugestion de kortega danco, la dancon de pavoj, eble, aŭ la majestan minueton; ĉi tio anoncas la environ de sinjoro, la nekonata kavaliro!“

Kun rideto kaj mangesto kaj ankaŭ kun helpo de la muziko, ŝi kvazaŭ pentris la scenon, kaj ĝi ŝajnis al Destine simila al vivo.

Madame Pompadour daŭrigis: „Post la liberigo de la kaptita heroĭno oni aŭdas novan noton, sed en malsama kleo. La muziko milde ŝanĝiĝas. Murmuranta melodio plenigas la aeron, nova vorto estas kantata — Amo!“

Ŝi parolis la vorton malrapide, karese, samtempe kaŝe observante la vizaĝon de Destine, kvankam ŝi ŝajnigis ne rimarki la subitan ruĝiĝon, kiu flamis en ŝian vizaĝon.

„Post la amdueto nia heroo estas mistere forvokita kaj foriras ne dirinte sian nomon. — Jen! la unua akto finiĝas. Ĝi estas gaja, ĉu ne?“

*) Muzikaj fakesprimoj.

La markizino ludis galopantan temon, kvazaŭ pentrante la foriron de la heroo. Post momento ŝi kuraĝe rekomencis. „Kaj nun la dua akto. Kie tiu devus esti? En la ĝardeno de la monaĥinejo, eble, en plena lunlumo? — aŭ — ĉu en la kapelo?“

Atako akra kaj certa, bone planita kaj zorge celita, sed la sango eltirita ne havis la koloron, kiun la markizino atendis. Destine ĝoja, ke fine ŝi povas klarigi, respondis avide:

„Ho, Madame, mi neniam vidis la grafon de Vrie post lia foriro. — Tion mi tute forgesis diri al vi.“

Madame Pompadour sin turnis abrupte, kun mallarĝigantaj okuloj, dum ŝi rigardis la junulinon kaj per glaciega tono demandis:

„Se vi ne vidis lin post lia foriro kaj li ne diris sian nomon, kiel vi scias, ke li estas la grafo de Vrie?“

Por respondi, Destine kviete eltiris el la kolo de sia robo etan bluan rubandon, al kiu estis alfiksitaj ŝia karega memoraĵo.

„Vidu, Madame — jen lia poŝtuko! Li ĝin ligis, kie la dornoj vundis mian manradikon, kaj mi forgesis redoni ĝin.“

La markizino ekkomprenis la tutan aferon! Rapida je rekono de siaj propraj eraroj, la Pompadour ŝanĝis sian humoron de severa malfido ĝis impulsa afekcio. Afabla kaj malavara, kiam oni ne tuŝis ŝiajn proprajn interesojn, la markizino subite sin turnis al ridetoj kaj gajaj vortoj, kun la deziro kompensi por la antaŭa maljusteco.

Ŝi stariĝis kaj ekprenis la vizaĝon de Destine inter siaj du manoj, rigardis profunde dum momento en ŝiajn okulojn kaj tiam diris:

„Ĉu vi scias, kion mi faros kun vi, mia karulino? Mi ŝatas vin kaj ankaŭ vian voĉon — mi faros vin mian protektatinon.“

„Ho, Madame!“ rava miro aperis sur la vizaĝo de Destine.

„Jes, kaj vi restos en Bellevue.“

Mankis al Destine vortoj por esprimi siajn dankecon kaj ĝojon.

„Kaj vi studos la muzikon ĉe Rameau!“

Destine kisis la manon de la markizino kun impulsa fervoro.

„Kaj vi kantos ĉiujn operojn!“ Madame Pompadour ĝojis, observante la efekton de siaj vortoj, la pliiĝantan koloron, la evidentan plezuregon en la esprimo de la juna vizaĝo, kiu similis la brilegon de printempa mateno.

„Kaj vi apartenos al mia kortego kaj fariĝos unu el miaj korteganinoj!“

„Sankta Patrino! — tio estas tro mirinda!“

Madame Pompadour kisis la junulinon sur ambaŭ vangojn, frapetis ŝian manon afable kaj vaste pritraktis kun plua entuziasmo la vivon en palaco.

La belulino de Bellevue estis treege kontenta, farinte kaj faronte bonfarojn.

LA POMPADOUR FRAKASAS VAZON

Tiun saman posttagmezon nekonatulo vizitis la markizino. Li ne diris sian nomon al la lakeo ĉe la pordo, sed anstataŭe li sendis al ŝi ringon.

Tuj oni lin enlasis, kvankam la markizino ĵus antaŭe diris al Gourbellon, ke ŝi akceptos neniun post la foriro de la vizitantoj.

La novevenanto portis longan mantelon, grizan barbon kaj okulvitrojn. Kiam li pasis tra la antaŭĉambro, la sinjoroj atendantaj rimarkis lian imponan sintenadon kaj lian elastan paŝon. Ili konsultis inter si pri lia identeco, ke li tiel facile gajnis la rajton de aliro; ili konjektis lin fremdulo, sekreta sendito de Aŭstrujo, ĉar oni diris, ke de tempo al tempo komunikaĵoj pasis inter la Pompadour kaj Marie Thérèse.

Ili demandis la servanton de la fremdulo, sed sen rezulto. Unu ekrigardo en la buduaron, se tio estus estinta ebla, estus pruvinta, ke iliaj konjektoj estis tute malpravaj.

Ĉi tie, kun fermitaj pordoj post li, la vizitanto impulse dejetis la mantelon kaj aliveston, kuregis antaŭen kaj surgenuiĝis antaŭ la markizino, kisis kaj rekisis ŝiajn manojn, dum li rave ekkriis:

„Fine! fine mi estas kun vi! Markizino! — diru al mi, ke vi ĝojas — nur iomete ĝojas vidante min!“

Estis pli multe da malpacienco ol ardo en la respondo, kiun li ricevis:

„Kompreneble mi estas ĝoja — ĝoja, ke vi ankoraŭ vivas! Ĉu vi komprenas, ke estas nur miraklo, ke oni ne rekonis vin kaj enkarcerigis vin en la *Bastille!* Kio povis logi vin al tia freneza ago?“

„Vi — vi estis la allogilo; vi, ĉiam vi“, li murmuris, ankoraŭ ame karesante ŝiajn manojn.

„Sed vi endanĝerigis min kiel ankaŭ vin. Estis via devo konsideri min, kiam vi eniris tian danĝeran entreprenon.“

„Mi konsideris nenion alian; mi ne povis forlasi vin, ĉu vi ne komprenas?“ li petegis.

„Jes, jes, kompreneble, sed la risko estis tro granda. Kaj vi ankaŭ endanĝerigas nin ambaŭ. Kiel vi kuraĝis veni ĉi tien? Tio estas frenezeco.“

„Markizino, ne riproĉu min; mi nepre devis vidi vin — mi ne povis vivi, ne vidante vin.“

„Sed letero de ekzilo ne estas malgravajo. Estis via devo, obei la ordonon de la reĝo. Tamen donu al mi pluajn sciigojn pri la afero“, ŝi daŭrigis malpli severe. „Kiel vi trovis tiun mirindan anstataŭulon, kies aspekto trompis ĉiun — sed ne min?“

„En miaj ĉevalejoj en Vrieonne“, Romain respondis trankvile kaj kun milda tono en la voĉo, dum li pensis pri Pierre kaj la terura prezo, pagita por ĉi tiu vizito al la markizino. Li rimarkis, kiel malsimila ĉio estas al tio, kion li atendis. Li ne povis kompreni klare la staton, en kiu li sin trovis, sed malprecize li komprenis, ke ŝiaj vortoj ne estis la vortoj, kiujn li esperis; li neniam imagis, ke ŝi riproĉos lin. Li sentis sin kvazaŭ en konfuzo inkubo, tra kiu penetris la tonoj de ŝia voĉo, strange malvarmaj.

„En Vrieonne! Kiel mirinde! — ke stalknabo tiel perfekte similis sian mastron!“

Estis mallonga paŭzo, tiam ŝi aldonis: „Vi enterigis lin, mi supozas, ĉe Montmartre! Mi aŭdis la funebran sekvantaron.“

„Jes“, Romain respondis malgaje.

„Kaj ĉu tio estas efektive fakto“, la markizino persistis malkredeme, „ke li kuŝas nun flanke de via patro?“

Al ĉi tiu demando Romain respondis kun impulsa malkaŝemeco: „Mi ne nur diras, ke tio estas vera, sed, ke ĝi estas eble justa ironio de la sorto, ĉar mi opinias — jes — mi kredas — ke li havas la rajton.“

„Sed se oni rekonos vin — la servistoj. Dio mia! Mi ne kuraĝas, eĉ pensi, kio povus rezulti je la plej malgranda suspekto! Sed“ — ŝi aldonis pli milde, dum ŝi rimarkis la esprimon de disreviĝo sur lia vizaĝo — „mi ne intencas riproĉi vin!“

Li staris antaŭ ŝi kun dignoplena sintenado, dum ŝi rigardis al lia bela personeco kaj pensis pri la troriskema kuraĝo, kiu igis lin, ŝin viziti. Ŝia ofendiĝo moliĝis ĝis admirado. Memoro ankaŭ diris al ŝi, ke ŝi estas grandparte kulpa pro lia malsaĝa ago. Do ŝia tono fariĝis preskaŭ milda, kiam ŝi aldonis:

„Mi estas tre maltrankvila pri vi, Romain, kaj mi — ho ve! — komprenas vian danĝeron.“

Je tio lia tuta feliĉeco revenis. „Nenia danĝero plenigas min per teruro, krom la danĝero de disiĝo de vi! Venu kun mi markizino — Antoinette!“

Li alproksimiĝis, tiam en mallaŭtaj, rapidaj tonoj venis vortoj kvazaŭ el fajro:

„Vi estas mia mondo! Ĉu vi scias, kiel granda estas mia amo al vi? Vivo estas ĥaoso kaj soleco sen vi! Mi vin amas same, kiel la unua viro amis la unuan

virinon! Mi vidas kaj aŭdas nur vin. Viaj okuloj bruligas mian animon! Viaj vortoj tranĉas en mian koron. Mi surgenuiĝas antaŭ vi, kiel en sanktejo. Vin mi amas sindone. Ĉu vi aŭdas min? Mi vin amas furioze. Mi ne povas vivi sen vi! Venu kun mi, Antoinette — venu kun mi!“

Lia voĉo tremis pro emocio. „Ni lasu ĉi tiun danĝeran kortegon, ĉi tiun palacon de danĝero. Ni nin kaŝos kontraŭ ĉiuj okuloj, eĉ la longvidaj okuloj kaj scio de la reĝo mem.“

La koro de Madame Pompadour estis tuŝita pro la intenseco de liaj vortoj. Ŝi permesis sin, pensi pri la ebla ĝojo de vivo kun tia amanto. Bezonus nenian penon ŝiaparte reteni lian amon kaj admiron. Kiel laca ŝi multfoje fariĝis pro sia peno, reteno la rigardon de la reĝo. La penso eligis ĝemeton, sed ĝi ankaŭ revokis ŝin al ekzistantaj faktoj.

Tre prudenta kaj decida estis ŝia respondo.

„Ne, ne, estas neeble! pensu pri la multaj, kiuj dependas de mi, pri mia sekvantaro, mia familio, miaj protektatoj. La reĝo indulgas ilin ĉiujn nur pro mi. Ha! la malbenoj de miaj malamikoj estas preskaŭ neelporteblaj; tiuj de miaj amikoj estus eĉ pli teruraj. Ne — ne, Romain! estas sufiĉe, ke vi gardu vin kontraŭ nunaj danĝeroj; ne serĉu pli grandajn pro mi!“

Ŝi ne eldiris la pluan penson, kiu eniris ŝian cerbon: la perspektivo de perdo de pompo, potenco kaj palacoj nun je ŝia dispono. Aŭdiĝis decidema firmeco en ŝia tono, dum ŝi rifuzis. Ĉi tion Romain rimarkis kaj sentis ŝian facilan indiferentecon al siaj planoj. Li estis tro multe sub la sorĉo de ŝia personeco, por sufiĉe rimarki la kalkulantan malmolecon de ŝia naturo, aŭ tute kompreni,

kian ludilon ŝi faris el li, sed la malvarmon de ŝiaj vortoj li sentis. Lia koro kvazaŭ ĉesis bati; li ne parolis.

Kiel kompenso la markizino gracie, impulseme metis siajn du manojn sur liajn ŝultrojn kaj rigardis en liajn okulojn kun penega mildeco. Kvankam ŝi forĵetis lin de si, ŝi ankoraŭ deziris reteni lian amon — lian — kaj ankaŭ la amon de ĉiu alia viro — firme, sindone kaj ĉiam. La ĉambro estis mallumeta pro la alproksimiĝanta krepusko, sed Romain povis vidi ŝiajn esprimoplenajn okulojn kaj ensorĉan rideton, dum ŝi staris kun siaj manoj sur liaj ŝultroj.

Subite ŝi sin fortiris, kaj li ankaŭ ekforsaltis de ŝi pro timo, ĉar Gourbellon rapide eniris la ĉambron sen-ceremonie.

„La reĝo, Madame, postulas tujan intervjuon!“

Per freneza gesto la markizino atentigis la grafon de Vrie pri la balkono, sed antaŭ ol li povis atingi la fenestron, kiu kondukis al la dezirita kaŝejo, la reĝo eniris.

„La vizito de Via Reĝa Moŝto estas neatendita honoro“, Madame Pompadour riskis diri kun nervozaj tonoj, apenaŭ kaŝante sian agitadon. Ŝi ne povis diveni la kialon por lia neanoncita vizito. Teruraj konjektoj eniris ŝian cerbon. Ŝia teruro dum momento estis iom modifita de la fakto, ke de Vrie estis bonŝance staranta en la profunda ombro de la fenestra drapiraĵo kaj ne estis rimarkita.

Ĉar ŝia naturo kaj edukado fortigis ŝin por urĝaj bezonoj, ŝi direktis ĉiun energion al la venko de ĉi tiu malfeliĉa okazaĵo. Post kiam ŝi sidigis la reĝon kun lia dorso al la fenestro, tra kiu nun eniris la lasta lumo de tiu okazoplena tago, ŝi ordonis al Gourbellon, ke li ne alportu kandelojn, ĝis ŝi vokos.

„La brilego de Via Reĝa Moŝto donas sufiĉe da brileco“, ŝi diris, sed ĉi tiu flatado estis perdita, ĉar li ŝajnis

profunde en penso. Li eĉ ne vidis la mantelon de la sinjoro kaj lian ceteran aliveston, kiuj kuŝis sur la planko.

„Ĉu la humoro de Via Reĝa Moŝto estas melankolia aŭ gaja?“ ŝi riskis diri, plene decidite ne permesi unu momenton da silento.

„Melankolia!“ estis la lakona respondo. „Nin ĝenis dum tuta horo la babilado de du nudkapaj prezidantoj kaj de unu pastro.“

„Pri la parlamento, mi supozas — aŭ ĉu estis tiu prusa princetaĉo Frederiko? — oni devus ekstermini aŭ unu aŭ la alian.“

Madame Pompadour piedbatis la tapiŝon kaj moviĝis tien kaj reen senpacience; la susuro de ŝiaj falbaloj sugestis la malordigantajn plumojn de agitita birdo.

Ŝi parolis rapide, ekscitite, kaj neniam mankis al ŝi vortoj, por denunci aŭ moki sian plej malproksiman kaj eminentan malamikon, Frederikon de Prusujo; tiamaniere ŝi sukcese amuzis la reĝon tiel, ke li ne rimarkis la sonon de la ŝtelaj piedoj de l' grafo de Vrie en lia peno atingi la balkonon.

Sed subite, ŝajne sen kialo, la reĝo rigardis ĉirkaŭen — pro ĉielo! — la tuta firmamento konspiris en tiu katastrofo, ĉar je tiu momento la plenluno, eligante el nuboj, brilis blanka kaj klara sur la balkonon, tuŝante per molaj nuancoj de lumo la rektan, rigidan dorson, kaj larĝajn ŝultrojn de iu — kiu vidis la rapidan falon de sia stelo.

Louis eksaltis de sia sidejo en pasio de kolerego, samtempe eligante sian glavon.

„Sankta koro! viro en via ĉambro, kiam la reĝo vin vizitas! Viaj ofendoj, Madame, ne estas de malgranda amplekso!“

Li ekiris antaŭen, renversante seĝon, tenante sian glavon preta, por trapiki la uzurpulon kiel hundon.

Madame Pompadour, senpova deteni la koleregon de la reĝo, rigardis liajn movojn en mortpala angoro, dum la forkuranto sur la balkono, sciante, ke li estas perdita, turnis al ili la vizaĝon. Tro lojala kortegano, por eltiri sian propran glavon kontraŭ la reĝo, li staris senmova, neŝanceliĝanta, dum li atendis la mortigan atakon de la reĝo.

Subite la voĉo de Madame Pompadour elsonis kun stranga streĉeco! „Haltu! Via Reĝa Moŝto!“

Ŝi ekkaptis la brakon de la reĝo kaj montris kun teruro al la senmova figuro ĉe la fenestro. Tremiga teruro trapenetris ĉiun moduladon de ŝia voĉo, dum ŝi mallaŭte elĝemis la vortojn:

„Rigardu! Tio estas la mortinta grafo de Vrie!“

Louis levis la okulojn al la pala vizaĝo de la lunlumigita figuro sur la balkono. Tiam la glavo defalis de lia mano kaj li vidis la formon kaj trajtojn de la ekzilito, kiun li vidis kiel mortintan kaj malvarman en la arbaro de Sta. Germain. Sendube jen estis la sama korpo, sur kiun la impulsema Pompadour ĵetis la enhavon de sia pokalo!

Senfortigita je la vido, la superstiĉa reĝo instinkte sin krucesignis. Sed Madame Pompadour sciis tre bone, ke ĉi tiu efika klimakso ne povas daŭri longe. Ŝi faris unu paŝon malantaŭen kaj per sia piedo renversis altan rompeblan vazon, kiu staris apud la klavicimbalo. Kiel ajn antikva kaj vulgara la artifiko, bruo estas tamen bruo, kaj homaj nervoj estas tiel fortaj, ke surprizata homo instinkte rigardas ĉirkaŭen. La reĝo tuj turnis la kapon por certigi pri la kaŭzo de la laŭta krako. Kiam li denove rigardis al la fenestro, la fantomo jam estis malaperinta.

Sed ne estis malfacile por Madame Pompadour, nun cedi sin al elverŝo de histeria plorado.

„Tio okazis, ĉar mi mokis lian kadavron. Mia Dio! nur pensu — ke dum mia tuta vivo tio sekvos kaj fantomos min!“

Ŝi ŝajnis nekonsolebla, sed la reĝo staris apud ŝi kaj cedis sin al profunda meditado.

„Ĉu vi estas certa, ke neniu povis esti sur la balkono?“

Nova teruro atakis ŝin, dum ŝi ekscite respondis:

„Ne, ne, neeble! Mi estis ĉi tie de tagmezo.“

Sen atento al ŝiaj vortoj, Lia Reĝa Moŝto marŝis ĝis la fenestro.

„Permesu, ke unue mi ordonu lumilojn“, ŝi rapide diris kun preterespera deziro lin deteni, sed la reĝo persistis.

Madame Pompadour nur povis rigardadi en muta senpoveco, konvinkite, ke ŝi jam ludis sian lastan ludkarton. Ŝian vizaĝon ŝi kovris per la manoj kaj penis refortigi sin kontraŭ la terura momento, kiam la reĝo nepre malkovros la grafon de Vrie.

Ŝi aŭdis la reĝon, kiam li elpaŝis sur la balkonon. Kelke da momentoj de necerteco sekvis, kaj tiam mano ripozis sur ŝia ŝultro. Ŝi rigardis supren kaj vidis la reĝon, kiu trankvile anoncis:

„Estas neniu tie. Estas treege strange.“

Kaŝi ŝian miregon kaj malŝarĝon postulis ŝian tutan aktoran kapablon.

„Ni diru nenion pri ĉi tiu afero“, ŝi poste proponis kun ŝajna pripensado, „aŭ eble Via Reĝa Moŝto preferas rakonti la rakonton!“

„Ja — ne“, li respondis. „Mi estas pli ol volonta, kaŝi la aventuron, havante nenian deziron, iniciati diskuton pri fantomoj.“

La trankvileco de tiu respondo ne estis tute kontentiga por la markizino. La teruro de la reĝo tro subite trankviliĝis; tio sugestis nuancon de dubo. Ŝi nepre devas pligrandigi lian kredon. Kun konvinka ekstremo, ŝi ekkriis:

„Kia konsternega sperto! Kio estus okazinta al mi sen la konsola apudesto de Via Reĝa Moŝto?“ Ŝia maniero estis tiu de nerva senfortiĝo. „Mi dubas, ĉu mi dormos dum semajno!“

„Viaj nervoj estas trostreĉitaj kaj bezonas ripozon; ni tial forlasas vin.“ Louis sin turnis al la pordo.

„Sed, via reĝa moŝto!“ estis tratremiga petego en ŝiaj tonoj, „vi ne foriras de mi en kolero?“

„Tute ne“, la reĝo senprokraste respondis. „Vi estas la plej bona el ĉiuj amikoj de Louis; la sola, kiu neniam min enuigas. Ja vere! vi provizas novajn distraĵojn ĉiun fojon, kiam mi vin vizitas! Se mi ne sciус, ke vi evitas la ripetadon de viaj efektoj, mi eble tremus reaperi ĉi tie. La sperto de hodiaŭ bone ŝanĝis la tendencon de miaj pensoj, sed mi ne deziras ĝui duan vizitadon!“

Ĉu ĉio tio ĉi estas sincera? aŭ ĉu liaj vortoj enhavis nuancon de sarkasmo? La Favoratino maltrankviliĝis.

„Mi petegas, Via Reĝa Moŝto, ne faru ŝercon el tia stranga temo. Sed la afero estas pli malbonsigna al mi ol al vi. Ĝi tremigas min. Ĉu vi ne kompatas la kompatindan Pompadour?“

„Vi havas niajn plej bonajn pensojn kaj kompaton.“ Estis afableco en la tonoj de Louis, sed lia maniero, kiam li adiaŭis ŝin kaj poste eliris, montris mediteman humoron.

LA FANTOMO ĜEMAS EN LA ĜARDENO

Tuj post la foriro de la reĝo Madame Pompadour rapidis al la fatala balkono kaj trovis ĝin vakanta, kiel li estis dirinta. Ŝi rigardis malsupren, vidis la grandan distancon, tra kiu Romain devis fali, kaj ekstremis. Kiel li povis fari la salton sen danĝero por membroj kaj eĉ vivo?

Ŝi rigardis en la ĝardenon, al la malhele konturita bosko kaj statuoj, vidante neniun moviĝantan figuron. Ŝi ne povis kompreni, kiel li povis forkuri nevidite.

Ŝi forturniĝis, sed haltis subite kaj ree rigardis malsupren. Jen ŝi vidis sternitan figuron, preskaŭ kaŝitan de ombroj.

„Li estas tie — kaj vundita! Dio mia! Kion fari?“ ŝi flustris al si.

Simile al subita mallumeco, la sento de granda danĝero falis sur ŝin. Supozu, ke la servistoj trovus lin sub ŝia fenestro! Ŝi povis fidi eĉ ne al unu el ili! Aŭ se li mortus?

Rapide kaj sovaĝe tiuj pensoj plenigis ŝian cerbon. Ŝi kuregis tra la ĉambro, ekkaptis malhelan mantelon, eniris apudan ĉambron, rapidis malsupren sur la ŝtuparo por la servistoj kaj kuris en la ĝardenon. Neniu ŝin vidis. Estis nur paŝo ĝis la loko, kie kuŝis Romain senpova pro rompita kruro. Li aŭdis ŝiajn paŝojn kaj

levis sin ĝis sida pozo, dum ŝi alproksimiĝis. Ŝi surgeniĝis apud li kaj demandis ekscite:

„Ĉu vi estas grave vundita?“

„Nur osto aŭ du estas rompitaĵ.“

„Sankta ĉielo! — Kion ni devas fari?“

„Lemoyne estas apude, li helpos nin.“

„Lemoyne! kiel li trovis vin?“

„Li maltrankviliĝis pri mi kaj serĉante venis ĉi tien.“

„Ĉu li estis en la kasteleto?“

„Jes, en la antaŭĉambro, atendante.“

„Kie li estas nun?“

„Li foriris por trovi ne garditan elirejon el la bieno.“

„Estas nenia!“

„Nenia? do li devos levi min super la murojn.“

„Neeble! vi devos transiri la riveron.“

„Sankta Patrino! do li devos porti min tra la pordoj.“

„Neniam!“ La markizino leviĝis kun esprimo de decido.

„La gvardianoj proponus helpon, farus demandojn, malkovrus kio ajn restas de via maskiĝado, la reĝo aŭdus pri la afero. — — Ne, estas neeble!“

Je tiu momento Lemoyne revenis. Vidante lin, Madame Pompadour diris sen plua hezito. „Estas nur unu rimedo. Levu la grafon sur viajn ŝultrojn — zorge — bone! — Nun sekvu min!“

La doloro senkonsciigis la grafon de Vrie. Kiam li rekonsciigis, li sin trovis kuŝanta sur kanapo en ĉambro de strangaj proporcioj. Ĝi estis triangula; anstataŭ fenestroj troviĝis kvadrataj aperturoj sub la plafono. Ĉi tiuj, li poste sciigis, kondukis diagonale ĝis la tegmento, tiel enlasante aeron kaj iom da lumo. La ĉambro estis meblita simile al armilejo kun ŝildoj kaj diversaj armiloj pendigitaj sur la malhelaj kverkaj muroj, kaj riglitaj kofroj staris ĉi tie kaj tie sur la tegola planko. Sur-

amasigita apud la kameno, kiu aspektis kvazaŭ neniam uzita, troviĝis brulaĵo kaj silikskatolo. Kelkaj multekostaj tapiŝetoj kaŝis la nudecon de la krudaj brikoj kaj donis al la ĉambro ian aspekton de komforto.

Estis polvo sur ĉio kaj la ĉambro entute komunikis senton de silentemo kaj malbonvolo, simile al homo, kiu deziras resti trankvila. Ŝajnis ekzisti neniu pordo.

Ĵus post kiam Romain faris ĉi tiun eltrovon, unu el la paneloj malfermiĝis internen kaj Lemoyne envenis portante pelvon da akvo.

„Ha, vi rekonsciĝis!“ li ekkriis ĝoje. „Mi estis maltrankvila pri vi.“

„Kie mi estas?“ Romain demandis.

Lemoyne levetis la ŝultrojn. „Ne demandu tion nun, estas pli grava laboro antaŭ vi.“

Sperto, kiun Lemoyne havigis al si kiel soldato, instruis lin iom pri ĥirurgio. Rapidante denove tra la svinganta panelo, li baldaŭ revenis kun lintolaĵo, el kiu li faris bandaĝojn. Zorge Lemoyne komencis alĝustigi la rompitan kruron.

La kompatinda grafo ne plu pensis pri sia ĉirkaŭaĵo pro la doloro de la operacio, kiu, kvankam iom mallerte farita, fine tamen estis elfarita.

Post la bandaĝado de la kruro Lemoyne ekbruligis fajron kaj boligis akvon en fera kaldroneto, kiu pendis en la kameno.

La kruro de l' grafo de Vrie estis ja rompita, sed ne lia vervo. Tion montris liaj vortoj.

„Pro ĉielo — kie mi estas? Ne pensu, ke mi estas tiel malforta, ke mi ne povas paroli! Kia ĉambro estas ĉi tiu, kiel vi nomas ĝin?“

„Ĝi estas privata apartamento en Bellevue.“ Aŭdiĝis nuanco de humoro en la emfazo de la vorto „privata“,

kiel Lemoyne parolis ĝin. Lia animstato estis preskaŭ gaja, tiel feliĉa li estis, trovinte ĉi tiun rifuĝejon post sia freneza maltrankvilo pro la akcidento de Romain.

„Kaj kiel ni atingis ĝin?“

Kun ĉagrena trankvileco Lemoyne esploris la kaldroneton, antaŭ ol li respondis, tiam li respondis detale:

„Mi vin portis sur mia dorso, la markizino nin kondukis, laŭ mirinde teda vojo, mi certigas al vi, ĉirkaŭ angulojn, tra muroj, super fendegojn, tra kavernoj, supren kaj malsupren laŭ ŝtuparoj, en tunelojn, kaj fine, sekvante ŝin, ni venis ĉi tien. Mi timis, ke mi faletus je ĉiu paŝo.“

„Ĉu vi supozas, ke ni estas sub tero aŭ en iu tur-ego?“ persistis Romain.

„Por diri la veron, kara grafo, mi ne scias la kom-
plikecon de ĝia arkitekturo. Ĝi estas sekreta ĉambro,
intencita por rifuĝo en okazo de politika bezonego. Vi
kaj mi solaj scias pri ĝia ekzisto, krom la markizino
kaj la reĝo mem.“

„La reĝo scias —“ Romain preskaŭ eksaltis de la kanapo, sed rapide malleviĝis pro doloro.

„Ne timu“, recertigis Lemoyne. „La markizino diris,
ke Lia Reĝa Moŝto havas nenian okazon por veni ĉi tien,
kaj se li farus tion, li bezonus ŝin por lin gvidi, ĉar la
enirejo estas komplika kaj li sendube forgesis, kiel veni
aŭ kiel elveni.“

Lemoyne ree paŭzis, por rigardi en la kaldroneton,
kie multaj avidaj vezikoj estis konsumantaj sin en efemera
barakto, por atingi la supron kaj resti tie.

„Jen estas konjako por vi“, Lemoyne anoncis. „Tio
fortigos vin, ĝis la markizino revizitos vin. Morgaŭ mi
enŝteliĝos kun nutraĵoj, kaj ni restos ĉi tie, ĝis vi povos
marŝi.“

Romain silente prenis la proponitan glason; tiam,

antaŭ ol liaj lipoj tuŝis ĝin, sufoka sento de danko plenigis liajn okulojn per larmoj. Li ne parolis, sed lia ekrigardo al Lemoyne esprimis lian grandan afekcion kaj profundan ŝatadon pro tio, ke li restis tiel fidela, kaj ke li ne riproĉis al li lian senpripensan agon.

Lemoyne penis malpliigi ĉi tiun streĉecon de sento kaj gaje diris:

„Mi opinias, ke vi vivos bone ĉi tie. Kaj, por viro supoze mortinta kaj vaganta tien kaj reen kiel fantomo, vi ĝuas multe da materiaj komfortoj.“

Ĉ A P I T R O * X I

LA NIMBO DE LA POMPADOUR

Kelkaj horoj de soleco, por mediti pri la danĝeraj okaz-
aĵoj de la posttagmezo, estus ĉiela donaco al Madame
Pompadour, sed tiel multaj estis ŝiaj interesoj, ke eĉ
la plej dramaj kaj timigaj situacioj ne ŝajnis tre rimark-
indaj.

Tiun saman vesperon ŝi respondis al dudek urĝaj
leteroj. La sekvintan matenon, dum ŝi faris sian tualeton,
ŝi aŭskultis al la petoj de vico da petantoj, kiuj atendis
en la antaŭsalono pro aŭdienco; unu petegis la liberigon
de malliberulo nun en la *Bastille*, alia deziris promocion
en la armeo, kaj alia petis donacon por helpi la sufer-
antojn pro la gravega tertremo en Lisbono.

Inter la atendantaj petantoj troviĝis eminentaj jezuitoj,
malprudentaj en sia entrudo tien, kie ili estis plej mal-
bonvenaj, sed fervoraj en siaj penoj, konvinki ŝin, ke
ŝi devas influ la reĝon, por ke li estu malpli severa
kontraŭ la societo.

Monsieur de Machault, ŝia plej lojala amiko — li far-
iĝis tia, ĉar ŝi persiste lin promociis — estis en ŝia
buduaro dum la tuta mateno kaj ŝin helpis je ŝiaj decidoj
kaj en ŝiaj diskutoj. Li subtenis ĉiujn ŝiajn planojn kon-
traŭ ŝia arĥimalamiko, la ĉefministro d' Argenson.

Ne malpli grava, ol Machault mem, estis ankaŭ alia
persono en la buduaro, eleganteta, bone parfumita, multe
juvelita eta viro, nome Sinjoro Dagé; efektive li estis friz-

isto por ŝia moŝto kaj por ĉiu alia granda sinjorino, kiu povis havigi al si lian servadon.

Ĉi tiu rimarkinda, grava persono, kiu veturis en sia orumita kaleŝego kaj kiu faris tian arton el sia profesio, ke granda volumo pri la temo estis eldonita, fariĝis tiel aŭtokrata, ke Madame Pompadour mem opiniis, ke li faras al ŝi komplezon, frizetante ŝiajn harojn. Liaj afekt-aĵoj, gracio kaj delikateco de tuŝo, dum li laboris, estis granda parto de lia arto. Lia manipulado de la harfasketoj de Madame Pompadour, dum ŝi pozis robita en pala atlaso, kun siaj piedoj en pantofloj sur kuseno, kiu similis ŝian robon, formis bildon, kiu faris eĉ ŝiajn tualetajn akceptojn famaj. Neniam sub la manoj de Dagé ŝiaj haroj aspektis senordaj, ĉiu interŝekvanta parto de la aranĝado estis artista.

Dum li lerte uzis la varmegajn frizilojn, metante buklojn kaj pufaĵojn en ilia konvena ordo, Madame Pompadour akceptis vizitantojn, unu post la alia, kaj ankaŭ forsendis ilin, ĝis nur Machault, D-ro Quesnay kaj kelkaj aliaj intimaj amikoj restis.

La kuracisto, senzorge esploranta libron, kiun li prenis de tablo, subite diris, rilate al nenio:

„Mi ofte demandis min, kiu estas la plej granda verkisto, kiun la mondo iam konis, sed mi neniam trovis kontentigan respondon.“

„Tion mi povas diri al vi senprokraste“, ekparolis la markizino de el sia pozicio ĉe la tablo. „La plej granda verkisto, kiun la mondo iam konis, estis tiu plej pia el la katolikoj, Cornelius Jansen, la famekonata episkopo de Ypres.“

Eĉ Madame du Hausset partoprenis la ridon, kiu sekvis ĉi tiun tributon al la patro de la Jansenismo. Sed Madame Pompadour rapide aldonis:

„Ne ridu; mi estas tute serioza. Cornelius Jansen verkis unu libron, kiun, pri tio oni ĝenerale konsentas, neniu iam tralegis, kaj tamen, pro ĉi tiu unu libro, la tuta mondo estas profunde skuita de diskutadoj dum la lastaj cent jaroj kun la rezultato, ke hodiaŭ ĉiu katoliko, kiu ne estas jezuito, proklamas sin Jansenisto! Kiu alia viro iam akiris tian daŭran famon per la verkado de nur unu libro, kiun neniu povis legi? KREDU MIN! KIAM MI VEKIGAS EN LA NOKTO, MI RIDAS LAŬTE JE LA PENSO PRI TIU MIRINDA VERKISTO Cornelius Jansen!“

Kun la mieno de homo, kiu pruvis sian pretendon kaj ĝuas triumfon, Madame Pompadour ree sin turnis al sia spegulo kaj observadis la manipuladon de Dagé.

Sed la abato de Bernis faris uzon de la okazo, mal-konsenti kun la markizino, kiu ĉiam fariĝis tiel elokventa pri iu ajn temo rilate al la jezuitoj, ke ŝiaj plej bonaj amikoj sentis deziron instigi ŝin daŭrigi, kvankam sciante bone, ke malestimigaj diraĵoj pri ĉi tiu potenca societo estas preskaŭ tiel danĝeraj, se hazarde aŭdataj, kiel malestimigaj vortoj pri la reĝo. Madame Pompadour estis tre saĝa pri multaj aferoj, sed ŝia singardo mankis je unu rilato; ŝi metis nenian haltigilon sur sian langon, kiam ŝi estis senĝena en sia propra buduaro — fatala virina malforteco, kiu ruinigis pli ol unu altrangan sinjorinon antaŭe — kaj poste.

„Estas ankoraŭ diferenco de la opinioj“, de Bernis diris, „koncerne la demandon, ĉu la libro estas legita de iu ajn aŭ ne. Miaflanke, malgraŭ ĉiuj asertoj kontraŭaj, mi ne povas kredi, ke Papo Innocento X. estas kondamninta tion, kion li ne estas leginta.“

„Sensencaĵo, kompreneble li ne legis ĝin“, insistis la markizino. „Verki ĝin mortigis Jansen! — tri volumoj delikate manskribitaj en latina lingvo pri la temo de

Libera Graco! *Sanctissima!* „Legi ĝin ankaŭ mortigus ĉiun!“

„Nu, la Papo mortis!“ protestis de Bernis bonhumore. Sed Madame Pompadour fariĝis serioza.

„Jes, la kompatinda viro, li mortis pro akuzanta konscienco, ĉar li fidis al la aserto de la jezuitoj anstataŭ scii por si mem, kion li kondamnis.“

„Sed la Papo Innocento kondamnis la libron pro ĝiaj kvin herezaj frazoj, kaj ĉi tiujn, vi scias, oni montris al li“, obstine persistis de Bernis⁸.

Madame Pompadour sin turnis al li kun vigleco. „Sinjoro Abato, vi bezonas konverton!“ kaj ŝi komencis informi lin; Dagé dume lerte sekvis ĉiun ŝian movon kun la frizilo, kiun li manipulis kiel sorĉisto la vergon.

„Nun aŭskultu al mi. Unue, ĉi tiu libro kun sia pezega enhavo kaj titolo ‚Aŭgustinus‘ incitis la jezuitojn, ĉar ĝi kuraĝis kontraŭstari la instruojn de ilia propra respektinda verkisto Molina. Tiu fakto estas klara, ĉu ne?“ kaj ŝi kvazaŭ substrekis tiun detalon per unu fingro, fariĝante pli energia, dum ŝi daŭrigis:

„Do niaj estimataj amikoj, la jezuitoj, cedis al la Papo kvin frazojn, kiuj, ili pretendas, estas elprenitaj el la ofenda libro. Kaj jen, nia Papo estis tiel treege naiva, ke li ne rimarkis la ellason de paĝoj aŭ ĉapitroj, per kiuj li estus povinta identigi la frazojn kun la libro. Ĉu vi komprenas?“

De Bernis obeeme balancis la kapon, kaj la markizino daŭrigis: „Bone! Do lia sankta moŝto kondamnis la famajn kvin frazojn kaj per tio la tutan libron. Tiam la tumulto komenciĝis. Amikoj de la mortinta episkopo asertis, ke li estis tro pia katoliko, por verki ion herezan, kaj ili absolute neis, ke la frazoj troviĝas en la libro. Komprenoble la afero ne estis pruvebla, ĉar, kiel mi

diris, neniu povis legi la libron! Ho, — oni penis legi ĝin! Louis XIV. dungis eminentan klerulon, kiu tralegu la masivan volumon, por serĉi tiujn kvin herezajn frazojn, kaj oni bone scias, ke li eliĝis el la barakto kun la dubesenca raporto, ke, se la kvin proponoj estas en la libro, ili estas enigme kaŝitaj. Ĉu ĉi tio maltrankviligis la jezuitojn? Ne, tute ne! Ili serene respondis, ke dubi la ekziston de la herezaj artikoloj signifas dubi la Papon, kiu kondamnis ilin! Tiel staras la demando. La batalo dependas de la demando pri Papa senerareco; la jezuitoj por ĝi, la jansenanoj kontraŭ ĝi.“

La energio de Madame Pompadour konstante pliiĝis, manoj kaj ŝultroj donis emfazon al ŝiaj vortoj:

„Kaj kia estas la klimakso — la ĉefŝtono — de tiu monumenta disputo? La pastraro de Parizo — ĉiuj jezuitoj — kunmetas siajn perukojn kaj elpensas dekreton, kiu servas ekskomuniki, kvazaŭ brulmarki, kiel herezulon, ekzili, detrui ĉiun pastron kaj instruiston, kiu rifuzas ĵuri — kion? — ĵuri, ke li kredas, ke tiuj famaj frazoj troviĝas en la libro de Jansen!“

Madame Pompadour ekscite frapis per la piedo kaj forŝovis la piedkusenon.

„Dio mia! Eŝcepte pro siaj tragedioj la rakonto pri la kverelo inter jezuitoj kaj jansenanoj estus sufiĉe komika, por devigi la diojn ridi!“

„Sed certe vi ne kulpigas la jezuitojn pro ĉiuj tragedioj de la fama disputo?“ sugestis de Bernis, por daŭrigi la konversacion, se pro neniu alia kialo.

„Kulpigas ilin! Kompreneble mi kulpigas ilin! Mi kulpigas ilin pro ĉio, kio maltrankviligas Francujon hodiaŭ. La jansena-jezuita malpacado ne estas plu religia diskutado; ĝi estas politika milito. La jezuitoj estas senskrupula societo de hipokrituloj, kiu pro siaj

malhonestaj kaj sekretaj metodoj havigas al si la tutan riĉaĵon kaj potencon de Francujo. Ili disvastiĝas super la terglobo kiel pesto.“

Madame Pompadour tiel tute forgesis la friziston Dagé, ke ŝi stariĝis dum sia denunco kaj marŝis tien kaj reen. La eta viro atendis pacience kaj, kiam ŝi residiĝis, li daŭrigis sian laboron, kvazaŭ nenio okazis.

Ĉiuj estis observantaj la markizinin kun vigla admira intereso; ĉiuj krom Gourbellon, kiu ankoraŭ restis ĉe la pordo, simila al vaksa figuro, kaj ŝajne havis nek okulojn nek orelojn por la sceno antaŭ li. Sed ŝajnoj estas ofte trompantaj. Okazis, ke el ĉiuj, kiuj estis en la ĉambro, neniu aŭdis tiel multe, kiel la servisto, kies devo ŝajne estis aŭdi nenion.

Post mallonga paŭzo Madame Pompadour daŭrigis: „Oni diras, ke mi malamas la jezuitojn, ĉar ili rifuzas al mi komunio. Kia stultaĵo! Kontraŭe, ili rifuzas al mi la sakramenton pro mia malamo! Mi ekstermus la tutan societeton, se mi havus la aŭtoritaton. Mi forpelus ilin el Francujo simile al putraĵo de malantaŭa pordo! Mi esperas, Dagé, ke vi ne estas jezuito?“ ŝi subite diris al la frizisto.

„Mi ne bezonas esti, Madame, ĉar mi akiras sufiĉe da mono per mia propra profesio.“

Ĉi tiun spritaĵon oni ricevis kun rido, kiu malstreĉis la tonon de Madame Pompadour, dum ŝi daŭrigis:

„Oni diras al mi, ke mi estas maldiskreta, parolante tiel malkaŝe; ke la jezuitoj pro venĝo eble mortigos min. Sed mi estas certa, ke tio neniam okazos, ĉar en tia okazo, mi fariĝus martiro! kaj la reĝo, pro amanta memorado efektivigus miajn dezirojn pri ili pli severe, ol li nun plenumas ilin. Ho ne, la jezuitoj neniam martirigos min, ĉar tiam mi fariĝus sanktulino! ĉu ne? Ĉar ĉiuj

martiroj estas sanktuloj. Ili nomus min Sankta Jeanne Antoinette! Mi opinias, ke mi aspektus alloga en eta niĉo kun kandeloj antaŭ mi! Ho, Dagé, bonvolu aranĝi miajn harojn en nimbo!“

Tro granda gajeco ne estis neordinara humoro de la Pompadour, se ŝi havis ĉirkaŭ si tiujn, kiuj povis ĝui ŝiajn efektojn. Je la amuzo de tiuj en la ĉambro, la fama Dagé agis laŭ ŝia ordono kaj tuj enmetis iujn pufojn sub ŝiajn antaŭajn harojn, kiujn li tiris malferme malantaŭen de ŝiaj tempioj.

„Jen, Madame, la nimbo!“ La plena pufo el pale flavaj haroj, konturante ŝian vizaĝon, efektive faris la efekton, kiun ŝi deziris. Ĉiuj ridis kaj aplaudis, asertante, ke ŝi taŭgas por nimbo kiel reĝo por krono. Kaj verdire, la stilo estis tiel belega, ke ŝi ordonis al Dagé, ke li lasu ĝin.

Kiam la tualeteto finiĝis, venis la poŝto de Parizo kun ĉagreniga amaso da plendoj, atakoj, kalumnioj kaj maldecaj poemoj. Post horo de atento al la poŝtaĵoj sekvis longa konsultado kun sinjoro Colin, ŝia sekretario, pri la preparoj por festo, kiun ŝi planis por la 18-a de la monato.

DU LUMOJ EN BELLEVUE

Je la unua horo tiun posttagmezon la bluora kaleŝego atendis por elveturi kun la markizino ĝis Versailles, kie Ŝia Reĝina Moŝto je tiu horo manĝis sola, kvankam kun pompo. Dume vizitantoj venis, montrante sian respekton, kaj pasante, por malserenigi ŝian digeston.

Estas historia fakto, ke Madame Pompadour neniam ĉesis, prezenti sin unufoje ĉiusemajne antaŭ la reĝino. Estante martiro pro la etiketo kaj la ordonoj de la reĝo, la reĝino ĉiam akceptis la markizinin kun ekstera ĝentileco.

Hodiaŭ, post ŝia foriro el la apartamento de Ŝia Reĝina Moŝto, la markizino petis aŭdiencon ĉe la reĝo; ŝi deziris scii, kiom la sceno dum la antaŭa posttagmezo reagis sur lin, aŭ ĉu ĝi havis ian efekton, sed mirigis ŝin ekscii, ke la reĝo foriris al Parizo por kunvenigi la parlamenton ĉe si*)! Madame Pompadour preskaŭ ne povis kompreni, kion tio signifas! Tia afero ne okazis dum la pasintaj dudek jaroj! Ŝajnis neimageble, ke Louis propramove prenis sur sin tian aŭtokratan paŝon. Se ŝi antaŭe estus sciinta . . . Ŝi ne povis kompreni, kial Machault ne ŝin informis tiun matenon.

La alvoko al la parlamento, ŝi nun eltrovis, estis elsendita nur hieraŭ. Ĉi tio klarigis la senceremonian

*) En la „*Lit de Justice*“.

aperon de Louis en Bellevue. Li estis veninta, por ŝin konsulti. Je dua penso ŝi ĝojis, ke Machault ne arogis al si, doni la informon; ŝi tute ne volis, ke li sciu, ke la reĝo mem ne sciigis ŝin.

Parlamentu kunveno! Dio mia! kio sekvos? Ŝi bone sciis, ke la reĝo estas impresebla per la influo de tiu, kiu ajn okaze estas apud li. Ŝi pensis pri d' Argenson nun ĉe lia flanko kaj la sennombraj flustradoj pri ŝi mem, kiujn tiu potenculo certe kribrus en la orelojn de la reĝo kune kun la parlamentaj raportoj. Ŝi tremis pro timo, ke la posta gusto de la hieraŭa afero en ŝia buduaro lasis la reĝon en humoro, por kredi ĉion malfavoran, kion li aŭdas pri ŝi.

Sen plua prokrasto ŝi decidis rapide iri al Parizo. Tial ŝi forrapidegis al Bellevue, donis ordonojn, kaj baldaŭ malgranda sekvantaro estis elektita, por akompani la markizino al la ĉefurbo. Ŝi ordonis al Madame du Hausset, ke ŝi restu en Bellevue, por esti kun Destine kaj agi kiel mentoro al ŝi.

Tiam Madame Pompadour, nerimarkite, iris al la kaŝejo, kiu ŝirmis la grafon Romain de Vrie. Troviĝis en ŝia buduaro sekreta panelo, kiu, kiam ĝi estis malfermita, kondukis laŭ mallarĝa pasejo ĝis mallonga ŝtuparo, kiu subiris rekte al la kaŝita apartamento.

Ĉe la bazo de la eta ŝtuparo Lemoyne ŝin renkontis. Aŭdinte ŝin alproksimiĝi, li malfermis la svingan kvaŝaŭan pordon, por ke ŝi povu eniri, sed ŝi hezitis kaj demande ekrigardis trans la ĉambron al la kanapo, sur kiu kuŝis Romain.

„Ĉu li ripozis komforte?“

„Jes, nun, Madame, ĉar mi donis al li narkotilon.“

Dum li parolis, li ne povis ne rimarki la belegecon kaj riĉan vestaĵon de la markizino. La malbrilaj kaj

severaj ĉirkaŭaĵoj de la eta ĉambro igis ŝin ŝajni kiel vizitanto el alia mondo. Ŝi evidente volis rapidi kaj subite sin turnis al Lemoyne kun la decidigaj vortoj:

„Venu kun mi!“

Li sekvis ŝin al la buduaro, kie, rapide ferminte malantaŭ si la panelon, ŝi komencis instrui Lemoyne, kiel agi dum ŝia foresto.

„Vi devos esti tre singardema pri ĉiuj viaj faroj. Mi nomos vin Gardanto de mia apartamento ĉi tie, por ke vi povu iri kaj foriri per la sekreta panelo sendanĝere. Kio ajn okazos, permesu neniun scii, ke ekzistas kaŝita ĉambro. Mi konsilas, ke vi havu tiel malmulte da konversacio kun la ceteraj el mia domanaro kiel eble. Mi jam sendis ilin en la korton malsupre, tien ni iros nun, kaj mi prezentos vin kaj anoncos, ke vi estas la Gardanto de mia buduaro.“

Dum la markizino parolis, ŝi rapide surmetis siajn gantojn; tiam ŝi gestis al Lemoyne, ke li helpu ŝin surmeti ŝian mantelon, kiu estis sternita sur seĝo tute preta.

„Vi devos aĉeti ĉion, kion vi bezonas, en Meudon“, ŝi daŭrigis, „kaj diru al via mastro, ke mi revenos post unu aŭ du tagoj, ke la reĝo kunvokis la parlamenton ĉe si. Kaj ankaŭ diru al li, ke li povos resti sendanĝere, kie li estas, ĉar la reĝo suspektas nenion. Nun mi estas preta.“

Granda grupo da uniformitaj servistoj jam kolektiĝis en la korto, kie Madame Pompadour baldaŭ aperis, grandioza en ermenoj, preta ekiri al Parizo.

Ĉe ŝia flanko staris Lemoyne, kiun ŝi gravmiene prezentis kiel „Gardanton de la buduaro“, dignoplena ofico, tiel nedezirata de ĝia okupanto, kiel ĝi estis dezirata de aliaj tuj, kiam ili aŭdis pri ĝia kreo.

La rigardantoj riverencis al la impona kaleŝego kaj

sekvantaro, dum ili iris tra la pordego. Ili rigardegis la foriron per sopiraj okuloj, ĉar vizito al Parizo estis ĉiam okazaĵo de bonvena distraĵo.

En Bellevue nur du lumigiloj estis videblaj je meznokto, krom la lanterno de la gardisto en la kasteleto; unu brilis el eta fenestro en la kvartalo de la servistoj, kie sidis viro, skribante longan leteron en ĉifroj. La esprimoj de la verkanto estis klaraj kaj decidigaj, ankaŭ precizaj. Li estis parte senvestita, lia ĉemizo disbutonumita, super sia koro li portis la markon de du klaraj literoj, neforigeble stampitaj sur la karno — „I. L.“ — la gravencaj komencaj literoj de Ignatius Loyola. La mondo ĝenerale konis lin kiel Gourbellon, fida servisto al la markizino, kiu neniam suspektigis, ke li estas pli fidela servisto al la jezuitoj. Li apartenis al tiu mistera kvina klaso de la societo, kiu portis nenian distingvan vestaĵon kaj ne anoncis sian aliĝon al tiu societo. Klerulo, leginta kaj vojaĝinta multe, riĉa, li fordonis ĉion, tempon, monon, eĉ identecon, al tiu vasta, preskaŭ senlima, fervore laboranta Societo de Jesuo; pie neniiganta sin kaj obea al siaj ĵurpromesoj, li bone esprimis la idealojn de la Societo de Loyola.

La letero nun sub lia plumo estis skribita al lia Superulo kaj enhavis zorgan raporton pri la vortoj, kiujn Madame Pompadour estis parolinta tiun saman matenon ĉe sia tualeto: „Fidela kaj vera priskribo de la opinioj kaj intencoj pri nia societo, kiujn havas tiu skandala kaj malvirta virino de malnobla povo“. Sub ĉi tiuj vortoj la letero portis la signon de la ĉifra marko.

Dum Gourbellon laboris je sia letero, iu alia en alia parto de la kasteleto estis simile okupata. Kvankam ŝi estis sola kaj en negliĝo, ĉi tiu skribantino aspektis nek ekscitita nek malserena, sed montris anstataŭe okazan

rideton. Destine estis skribanta al sia amikino Adrienne, ĉe Sankta Cyr.

Sciiginte ŝin pri sia mirinda bonŝanco, fariĝinte protektatino de Madame Pompadour, ŝi daŭrigis:

„Mi tre deziras, ke vi povus vidi ĉi tiun ĉambbron; la plafono estas tiel alta, kiel nia kapelo, kaj la kamenbreto estas preskaŭ tiel granda, kiel nia altaro. Oni bruligas kandelojn sur ĝi nun, kaj horloĝo ĵus batis la meznoktan horon. Mi ne intencas ofte resti tiel malfrue el mia lito, tamen mi ja deziras scii la sentadon de malfruaj horoj sen averto kaj bruligi multe da kandeloj. Madame du Hausset diris, ke al ĉiu ĉambro estas asignataj dudek kandeloj ĉiutage, kaj tiujn, kiujn mi ne uzas, mi povas vendi.

Ĉi tiu ĉambro estis la buduaro de la filino de Madame Pompadour. Ŝi estas mortinta, kaj la markizino neniam ĉesis priplori sian perdon. Ŝia nomo estis la ‚princino Alexandrine‘. Mi iom similas ŝin, almenaŭ tiel diras Madame du Hausset, kaj jen estas, kial la markizino favoras min kaj metis la ĉambbron de sia filino je mia dispono.

Mi surpriziĝis eksciante, ke Madame Pompadour iam havis filinon, kaj mi demandis: ‚Kie estas Monsieur de Pompadour?‘ Tiu demando malkovris ion pri la markizino, kio tre ŝokis min.

Ho, Adrienne! mi eltrovis multon pri la manieroj de la mondo kaj la interna vivo ĉe Versailles, de kiam mi venis ĉi tien. Tiu eltrovo malĝojigis kaj maltrankviligis min. Mi preskaŭ kredas, ke mi devus sciigi Fratinon Therese, sed mi unue konfidis al vi kaj poste bonvolu doni al mi vian opinion.

Responde al mia demando pri la edzo de Madame Pompadour, Madame du Hausset klarigis al mi, ke

lia nomo ne estas Pompadour, sed d' Etiolles, kaj ke li ne loĝas kun ŝi. Ŝi estas eksedziniĝinta!

Imagu mian surprizon kaj konfuzon ankaŭ, ĉar senintence mi eltrovis malfeliĉan kaj hontindan aferon en ŝia vivo.

Sed kvankam mi skribas ĉi tion al vi, kara Adrienne, mi esperas, ke vi ne pensos tro malbone pri la markizino. Ŝi estas bonkora kaj ĝentila, kaj ĉiu ŝajnas ŝati ŝin, malgraŭ la ombro, kiu pendas super ŝia vivo. Ĉiuj el la nobluloj ŝin vizitas. Estas apartamento rezervata por la kronprinco kaj la kronprincino, kaj ankaŭ eĉ por la reĝo. Madame du Hausset montris ilin al mi hodiaŭ posttagmeze.

La markizino iris al Parizo. Vi devus esti vidinta la procesion de kaleŝegoj! — ses el ili! kaj la flankrajdantojn kaj postveturigistojn, kaj ĉevalojn kun orbroditaj ornamaĵoj! Tio estis simila al bildo en ferakonto, sed la plej bela parto de la tuta afero estis la markizino, kiam ŝi sidis en sia mirinda kaleŝego kun siaj belaj, delikataj trajtoj, konturitaj de la karmezinaj kusenoj. Ŝi min pensigis pri kamea gemo en ora skatoleto.

Ŝi revenos post du aŭ tri tagoj, ĉar okazos granda festo je la 18-a. Madame du Hausset diris, ke mi povos rigardi de unu el la alkovoj. La reĝo ankaŭ ĉeestos, do vi povos diri al Fanchon kaj la aliaj, ke mi efektive vidos Lian Reĝan Moŝton — de malproksime!

Mi volus, ke vi kaj Fratino Therese povus esti ĉi tie kun mi. Mi sentus min pli feliĉa kaj pli ĉehejme. Mi ne hezitas konfesi, ke mi ĝis nun ne kutimiĝis al vivo en palaco, ĉar la grandiozeco estas tro subiganta pro komforto. Mi scias, ke mi

neniam, neniam povos venki mian timon antaŭ la servistoj; ili estas tiel grandiozaj kaj silentaj, oni povus imagi, ke ili estas faritaj el vakso, kaj do — konfidence — mi sentas, ke mi estas senvalora, kaj mi estas certa, ke mi estas tre soleca en ĉi tiu granda ĉambro. La lignaĵo ofte kraketas nokte, tio timigas min. Mi rigardas sub la liton post miaj preĝoj kaj tiam ensaltas rapide!

Mi forgesis klarigi pri la brodaĵo, kiun vi promesis fini por mi. La borderaĵo devas esti ellaborata el orfadeno; sed eble Fratino Therese povos fari la desegnon. Bonvolu doni al ŝi miajn komplimentojn kaj mian fidelan amon. Ankaŭ diru al ŝi, ke troviĝas kapelo en la kasteleto kaj la abato de Bernis faras meson ĉiudimanĉe.

Dio mia! la horloĝo de princino Alexandrine batas la unuan horon.

Nu — mi opinias, ke mi diris al vi ĉion pri miaj loĝado kaj sentadoj ĉi tie, do nun, kara Adrienne, mi finas. Bonvolu ne forgesi akvumi miajn narcisojn.

Mi ameme ĉirkaŭpremas vin
via vin amanta

Destine.“

Dum ŝi zorge faldis la leteron kaj ĝin sigelis per la parfumita sigelvakso, kiun ŝi trovis sur la eta skribtablo, Destine estis konscia, ke ŝi ne diris ĉion al Adrienne. Ŝi ne malkaŝis la plej supran sentadon, la supertonon, kiu restas sur ŝiaj emocioj; la doloron, la miron, brulantan ĝojon, ke ŝi estas inter la vivantaj memoroj de la grafo de Vrie.

Ŝi aŭdis lian nomon parolita, ŝi mem parolis pri li, ĉeestis kun liaj amikoj, kaj ŝi estis kvazaŭ unu el ili.

Ŝi sentis la veran atmosferon de lia apudesto. Kvankam ŝi sciis, ke li estas mortinta, li ŝajnis esti proksima.

Mediteme ŝi estingis la kandelojn; unu post la alia ĉiu eta flamo kliniĝis kaj cedis al ŝia spiro. Dum momento estis mallumo, tiam malrapide la sorĉo de mil steloj envenis en la ĉambron kaj allogis ŝin al la fenestro. Tie estis vidaĵo por silentigi la emociojn. Destine sentis sian spiriton forflugi en la brilegecon de la nokto — la larĝan, bluan gloron de la ĉielo. Ŝi pensis pri li: kie li estas, inter ĉiuj tiuj kirliĝantaj mondoj? Ŝi imagis sin for de la kasteleto, inter ili vaganta, serĉanta lin, serĉanta senĉese, frapanta ĉe la pordo de ĉiu stelo.

Destine ekhaltigis sian pensadon; ŝia vizaĝo estis ruĝiĝanta pro la maltimaj pensoj. Ŝi malfermis la fenestron, por enspiri la malvarman aeron, kaj rigardis avide, demandante, al la ombroplena bosko en la stelumaj ĝardenoj, la songemaj statuoj kaj malprecizaj vojetoj.

Tiam ree ŝi levis la okulojn al la safira arkaĵo supre; ŝia koro kaj animo eletendiĝis kun unu granda pulsobato de sopiro.

Sed venis nenia sono sur la kvieton, nenia tremanta folio por konfuzi la sentojn, — estis nenia signo de respondanta spirito.

Kaj tamen aferoj okazas strange. Je tiu sama horo en la nekonata ĉambro, kie Romain de Vrie kuŝis kaŝita, li vekigis kun ekstremo.

„Lemoyne! ĉu vi parolis?“

Lemoyne, de sia lito sur la planko, respondis dormeme:

„Ne, — kial?“

„Mi pensis, ke iu vokis min. Mi nepre songis.“

KIAM MADAME POMPADOUR IRIS
AL PARIZO

La sekvantaro de Madame Pompadour konsistis el proksimume kvindek personoj kaj enhavis ĉian servanton el aro de nobelaj sinjorinoj kaj sinjoroj, kiuj seryis ŝin en la salono, ĝis la torĉoportistoj kaj kvar negraj portistoj de ŝia portseĝo.

Inter tiuj, kiuj estis lasitaj en la kasteleto, kiam la markizino rapide iris al Parizo, estis du junuloj, Neveu kaj Treon, kiuj ĉagreniĝis pro la ofendo, kiu, laŭ ilia opinio, estis farita al ili, kiam ili estis devigataj servi laŭ la ordonoj de novulo kun nova titolo.

Je la tago post ŝia foriro, ili, por konsoli sin, eniris en unu el la subaj ĉambroj de la kasteleto kaj tie ludis kartojn, drinkis treege kaj faris vetojn kun diboĉeco tipa de la dekoka jarcento. Fine ili komencis diskuti per iom raŭkaj voĉoj pri la novulo Lemoyne.

„Li estas tre mistera en sia sinteno, ĉi tiu nove instalita granda mogolo, ĉiam rapidante, kiam ajn oni lin renkontas, neniam parolante, krom por diri ‚bonan tagon‘, kaj forglitante mistere — —.“

Treon, nigrokula, alta, maldika kaj araneaja, finis sian frazon kun leveto de la ŝultroj kaj englutegis alian glason da vino.

Neveu, silkvoĉa persono, kiu portis nigran veluron,

meklinan*) punton kaj bukedon da violoj, daŭrigis la temon kun iom da graveco.

„Liá ofico, ŝajnas al mi, estas pli mistera ol lia sinteno. Mi ne hezitas konfesi al vi, ke la afero jam vekis mian scivolemon tiel, ke hodiaŭ matene mi kaŝe eniris la buduaron je tempo, kiam mi estis certa, ke li estas for.“ La parolanto sin klinis trans la tablon konfidence kaj palpebrumis sciante, dum li aldonis:

„Ne estas grave, kiel mi eniris! Tie mi estis, serĉante en la skribtablo de la markizino, kiam, subite aŭdante bruon post mi, mi min turnis ĉirkaŭen kaj je mia mirego tie staris tiu infera ‚Gardanto de la Buduaro‘, kapklinante ĝentile kiel la diablo kaj demandante, ĉu estas io, kion li povus fari, por min helpi. Mi deziris sufoki lin. Li ne estus povinta ekaperi pli subite, eĉ leviĝinte tra la planko.“

La veluraj tonoj de Neveu agaciĝis, ĝis ili sugestis ŝiratan tolon. Malamo brilis en liaj okuloj kaj antaŭanoncis viperan decidon, liberigi la kasteleton de Bellevue de tiu malpeze paŝanta sfinkso, kiu eltrovis lin en la buduaro kaj certe babiladus la malutilan rakonton al la Pompadour.

Treon, ŝajne multe impresita per la rakonto, balancis la kapon saĝe kaj mallaŭtigis la voĉon, dum li respondis kun ebria peno je seriozeco:

„Mi diras al vi, ke la agoj de Providenco estas facile kompreneblaj kompare kun la agoj de la Pompadour. Ĉu vi scias mian opinion? Mi suspektas, ke ĉi tiu ‚Gardanto de la Buduaro‘ estas servanto de la nuna amanto de nia sinjorino.“ Treon paŭzis, por malplenigi sian glason, kaj tiam kantetis kun ebrieta frivoleco kaj absurda ritmo:

„Sed kiu li estas, aŭ kio li estas,

Enigmo tio estas, klarigi mi ne povas.“

*) Punto, fabrikata en Mecheln (urbo en Belgujo).

Neveu nerve rigardis ĉirkaŭen. „Parolu gardeme! Nuntempe oni nepre devas teni la langon pli firme ol sian glavon.“

Ĉi tiu saĝa diro estis ŝajne ilustrata kaj konfirmata per la eniro de Lemoyne mem, kiu ĵus revenis de Meudon, kien li iris por aĉeti necesajojn. Estis lia intenco saluti, dum li pasis, kaj rapide iri tra la apartamento, sed Neveu tuj profitante la okazon, haltigis lin post flustrado al Treon: „Dek luidoroj kontraŭ unu, ke li ne kuniĝos kun ni!“

„Bona Monsieur Lemoyne, ni sopiris vidi vin.“

„Viaj sopiroj ne estas altaj, Messieurs!“ diris Lemoyne, kun egala tono de ĝentileco, „sed nun, post kiam mi kontentigis ilin, bonvolu permesi al mi, iri mian vojon.“

Dume Treon rimarkis malgrandan elstaron en la mantelo de Lemoyne.

„Unue permesu min“, petis la rimarkema Treon kun intenco malica, dum li ludante eltenis sian glavon. „Via mantelo ne sidas bone“, je tio li lerte flanken tiris la mantelon kaj malkaŝis sub la brako de Lemoyne botelon da vino.

„Ho, pardonu al mi mian ludemecon“, Treon gaje aldonis kun ebria mokado. „Miaj moroj estas taŭgaj nur por sinjoroj; tiu klaso neniam kaŝas vinon — ili dividas ĝin.“

„Sapristi!*) — ili dividas ĝin inter siaj egaluloj!“ akre respondis Lemoyne. „Ankaŭ mi, kiam ajn mi renkontas ilin; al tiuj malpli rafinitaj mi cedas ĝin!“ kaj kun tio li ĵetis la botelon al Treon, kiu lerte kaptis ĝin kaj enmanigis ĝin al sia kunulo, bruege ekkriante:

„Vere! — li preskaŭ elverŝis ĝin. Estus pli bone, mi opinias, elverŝi malbonan sangon!“

*) Franca interjekcia vorto.

Tuj lia glavo ekbrilis en la aero preta por puŝo. Lemoyne ekprenis sian glavon el ĝia ingo kaj staris ĉe gardo, dirante, dum li tion faris:

„Vi estas riskema, Monsieur, batali kontraŭ malebria viro.“

Treon, kun la malsaĝeco de cerbo instigita de vino, gaje respondis:

„Vi estas prava; malebria viro estas egala al du, kiuj jam malplenigis siajn pokalojn. Vi igis min senti mian danĝeron kaj, por esti justa, estas klare, ke mia amiko nepre helpos min defendi. Ĉu ne, Monsieur Neveu?“

Neveu, ĝojega pro la espero de tia rapida venĝo al sia malamiko, respondis avide:

„Sendube! du ŝtaloj, kiuj ŝanceliĝas kontraŭ unu, kiu estas certa — perfekte justa ludo! alie estus absoluta mortigo.“

„Bona logiko, amiko Neveu! — bona logiko! Venu, mia bona Monsieur Lemoyne. Duelo triangula. La solaj sekundantoj, kiujn ni havas, estas la sekundoj, kiujn ni elspezas, dum ni batalas.“

Ridante laŭte pro sia vortludo, sen plua prokrasto Treon atakis Lemoyne, kaj Neveu tuj sekvis lin.

Iliaj glavoj estis neniel tiel ŝanceliĝantaj, kiel ili ŝajnis, kaj Lemoyne baldaŭ komprenis, ke estas decida malamikeco, ne nur en la atako, sed en la du paroj de okuloj, kiuj ekbrilis tien kaj reen antaŭ li, dum li penis deturni la puŝojn, kiuj venis en freneziganta rapideco de ambaŭ glavoj.

Lemoyne estis batalanta, ne nur por savi sian propran vivon, sed por la vivo de sia mastro. Li nepre devis venki, aŭ almenaŭ defendi sin, ĝis la alveno de helpo. Sed neniu eniris la ĉambron, por haltigi la neegalan batalon.

La du brilantaj ŝtaloj antaŭ li ŝajnis duobliĝi kiel la radioj de rado; ili briletis en la ĉirkaŭa mallumeco simile al strioj de luma fulmo, ĝis subite li sentis, ke unu forka ekbrilo falis sur lin. Tiam muĝis en liaj oreloj la bruego de mil tondroj, dum malkompata forto ŝajne jetis lin tra la malplenaĵo de senlima spaco.

Vidante, ke lia viktimo falis, Neveu alvokis helpon. La gvardianoj el la koridoroj rapide amasiĝis en demandanta kaj ekscita grupo ĉirkaŭ la mortanta viro.

Dum kelke da momentoj liaj lipoj moviĝis, sed ili ne povis aŭdi, kion li diris, kaj neniu iam sciiĝis, ke kun sia lasta spiro li estis pensanta pri sia mastro kaj peteganta, ke ili sendu pro la reveno de la markizino.

La du sinjoroj je tiu tempo iom malebriiĝis kaj povis klarigi la aferon inteligente: Treon kaj Lemoyne kverelis; Lemoyne jetis vinbotelon al Treon, kaj tiam oni eltiris glavojn. Treon, kvankam sub la influo de vino, venkis en la neegala batalo.

„Kaj jen ĉio!“ Neveu aldonis kun leveto de la ŝultroj.

Neniu proponis, sendi la novaĵon al Madame Pompadour. Estus malsaĝaĵo, ĝeni ŝin pro kverelo en unu el la ĉambroj de la kasteleto. Tia maltrankviliĝo ofte okazis antaŭe kun egale tragediaj rezultatoj. Oni povus alvoki ŝin al Bellevue seson da fojoj ĉiujare, se oni alvokus ŝin pro ĉiu duelo, kiu okazas ĉe ŝia bieno.

Nesciante, de kie li venis aŭ kiuj estas liaj amikoj, ili enterigis lin kun konvena respekto en aparta loko apud Meudon. Lia alveno al la kasteleto estis vualita en mistero, kaj egale nerimarkata estis lia eliro.

La Gardanto de la buduaro forpasis neabsolvita, neplorata, nekonata. Tiuj, kiuj avidis lian titolon, rapide senigis lin de ĝi; li fariĝis gardanto de eta ĉambro ses futojn sub la supraĵo de la tero.

„MI, LA REĜO, PAROLIS“

La parlamento estis ĉio, kion pompo kaj oro povis fari el ĝi. Rango, deveno, posedaĵo estis kalkulitaj kaj tabeligitaj kun la precizeco de mezurilo; ĉiu titolo estis en sia loko, ĉiu nuanco de distingo estis evidenta de la plej altaj ĝis la plej malaltaj rangoj.

Sur la trotuaroj de la stratoj la vulgaraĵoj staris en amasoj, kun sciemaj okuloj, levetante la ŝultrojn, dum supre en la fenestroj kaj balkonoj troviĝis tiuj, kiuj rigardis malsupren sur la kanajlaron — rigardis malsupren en pli ol unu senco. Ĉiuj atendis la alvenon de la reĝa sekvantaro. La gvardianoj ĉe la pordoj de la parlamenta konstruaĵo portis siajn uniformojn kun mieno iom supera rilate al la soldatoj sur la stratoj. Interne de la koridoroj la ĉefaj pedeloj, karmezine vestitaj, moviĝis kun dorsoj rigidaj, dum ili plenumis siajn devojn. Preter ili, ĝuste interne de la tronejo, troviĝis la heroldoj, en rozkoloraj kaj blujaj vestoj, kun longaj ŝtrumpoj, altaj kalkanoj, entrancitaj jakoj kaj belaj plumoj, portante orblazonitajn purpurajn standardojn. Tiam, laŭlonge de la marmoraj muroj, sekvis vico post vico de parlamentanoj, ĉiu el ili eminentulo — neniu el la malaltgradaj anoj; ĉar tio estus bezoninta spacon por naŭ miloj da homoj, se oni estus enlasinta la tutan membraron.

La parlamento de Francujo enhavis ne nur tiujn homojn, kiuj faris la leĝojn, sed ankaŭ tiujn, kiuj devigis, ke oni obeu ilin, — la tutan leĝan administraron de la nacio. Sed

en tia parlamenta kunveno paradis nur Superaj Komisarioj, la plej Eminentaj Skribistoj, Solenaj Sekretarioj, la Altrangaj Oficiroj de la Departemento de Kontistoj, la Mastroj de Petoj, la Unuaj Registristoj, la Ĉefaj Konsilistoj, la Ĝeneralaj Advokatoj, la Honoraj Juĝistoj — ĉi tiuj lastaj en roboj el ruĝa veluro kaj ermeno — dekkvin el ili. Aliaj oficistoj en multampleksaj roboj el nigra veluro, orgarnitaj, troviĝis ankaŭ en la procesio — pli multe ol cent el ili — dum atlaso, damasko, kaj tafto helpis dignigi multe da kurbŝultraj miopaj advokatoj de la leĝo.

Vicigite pli alte sur estrado, kiu kondukis al la trono, troviĝis ankoraŭ pli multe da ora koloro, juveloj, altranguloj. Jen estis princoj de la familio reĝa; la Urbestro de Parizo, en arĝente brodita purpuro kaj portanta masivan blankan bastonon; la Marŝaloj de Francujo; la Kapitanoj de la Korpogardistoj de la reĝo, rigidaj en brilegaj kirasoj, kaj la Prezidantoj de la Parlamento, kun blankaj perukoj kaj luksaj vestaĵoj el atlaso.

Sed ĉio de tiu grandiozeco paliĝis en komparo kun la brilegeco de la reĝo mem.

Louis, anoncita de siaj trumpetistoj kaj akompanata de siaj brilegaj korpogardistoj, siaj trenajportistoj kaj sia ministraro, eniris tra la privata portalo de la reĝo.

„*Vive le Roi!*“*) kriegis la popolamaso, ekstere kaj la multnombro interne.

Inter kriegoj — „*Longe vivu la reĝo!*“ — sonegaj klarionoj kaj ondantaj oriflamoj, Louis suriris sian baldakenitan tronon. Lia sintenado estis vere reĝeca, altkapa, ignoraj okuloj, impona estaĵo. Tie, super ĉiuj aliaj, kun la ermenaj roboj drapiritaj ĉirkaŭ li, Louis staris antaŭ sia parlamento, ekzilita, sola, memfida, neatingebla.

Kaj ĉi tio estas konvena, kiam ajn reĝo kunvokas sian

*) *Vivu la reĝo.*

parlamenton, asertas sian dian rajton, fari proklamon, kiun neniu el liaj aŭdantoj aprobas, sed ĉiuj nepre devos obei. Ĉiu malkonsentanta voĉo devis resti silenta, kiam la Suvereno de Francujo de sia trono, ĉe sia parlamenta kunveno, legas sian ultimaton kaj finas kun la majestaj vortoj: „Tiaj estas miaj ordonoj! — Mi, la Reĝo, parolis!“

Ree la standardoj flirtis, sonoris la trumpetoj kaj Louis faris sian reĝan eliron. Sed nun aŭdiĝis neniam kriegoj de „*Vive la Roi!*“ Eĉ preter la pordoj la homoj rapide kaptis la senton de la parlamento, kaj la kaleŝego de Louis pasis laŭ la stratoj inter vicoj de silentaj rigardantoj. Li bone sciis, ke, malantaŭ lia dorso kaj preter lia aŭdado, la popolamaso ekscitite diskutadas.

Dirite de pordo al pordo, la novaĵo ruliĝis tra la stratoj, amasiĝante kiel piedbatita pilko la malpuraĵon de malaprobo.

„La reĝo ordonis al la parlamento, ke ĝi restu silenta pri ĉiuj aferoj rilate al religio!“

Inter la popolamaso ĉi tiu dekreto instigis zumantan eksciton, kiel vergo enŝovata en abelejon. Agititaj amasoj svarmis tra la avenuoj kaj plenigis la kafejojn. Argumentoj ekkomencis ĉe ĉiu angulo; la aero vibradis kun la zumado de vortoj.

„*Sacré dieu!**) — la roma eklezio havas la tagon.“

„La parlamento estas blindigita, langoligita kaj mankatenita!“

Estis la malnova jezuito-jansenista kverelo koncentrigita ĝis milito inter la eklezio kaj la parlamento, ĉar la eklezio estis tute regata de jezuitoj kaj la parlamento de jansenanoj sen escepto. Inter ili, la reĝo, simile al turmentita patro, estis devigata, bati unu kaj poste la alian. Ĝoje li senrajtigus ambaŭ, se li kuraĝus; sed reĝo sen parlamento

*) Franca interjekcio, vorto malbena.

por subteni lin kaj eklezio por pardoni lin, ĵetus malgrasan ombron, dum li marŝas.

„Dio mia! la kompatinda reĝo!“ ekkriis unu bulvardulo al sia najbaro ĉe tablo en kafejo. „Li bezonas la eklezion por savi sian animon, kaj la parlamenton por savi sian reĝolandon! Li timas ofendi aŭ unu aŭ la alian, kaj tamen li devas decidi inter ili!“

La parolinto levetis la ŝultrojn, ektuŝis vinglason al siaj lipoj kaj aldonis:

„Ĉi tiu jansen-jezuita afero estas bolanta poto de disputo. Louis opinias, ke hodiaŭ li surfiksas kovrilon, kiu protektos lin kontraŭ la brulanta vaporo, sed estas mia diveno, ke li ankoraŭ estos devigata, blovi sur la fingrojn kaj dancadi, ĉar la miksaĵo fariĝos tro varmega.“

Dum konversacio tia daŭriĝis tra tuta Parizo, Louis, naŭzita pro la devoj de la tago, serĉis distraĵon laŭ siaj propraj deziroj kaj inklinoj, kaj ankaŭ laŭ la deziroj de Lebel, sia servisto.

Ĉi tiu servisto, formetinte la bluan ŝultrorubandon de la reĝo kaj aliajn insignojn de lia rango, envolvis la reĝon per nigra mantelo, kaj tiam la du, ne rekonataj, aŭ almenaŭ ne haltigitaj, faris sian vojon el la Louvre, tra eta pordo en la veturilpordo, kaj tiam laŭ vojo konata nur de Lebel, kiu aranĝis ĉiujn sekretajn petolaĵojn de Louis.

Estis Lebel, kiu portis komunikaĵojn tien kaj reen inter Louis kaj inkognitaj sinjorinoj. Al Lebel, nur Lebel, la reĝo povis konfidi kiel al perulo rilate al siaj malhonestaj amintrigoj.

Lebel, la „Silentulo“, sciis pli multe pri la inklinoj kaj amuzaĵoj de la reĝo Louis ol la historio povus iam malkaŝi. „Lebel“ estis nomo, per kiu oni povus jongli, vera Mefistofelo, kies famo nun iras flankon ĉe flanko kun la homo, kiun li servis.

Ĉ A P I T R O * X V

LA KRONO PIKAS LA REĜAN KAPON

La reĝa parlamenta kunveno okazis je la 13-a tago de la monato, kaj la rezultato estis decide bedaŭrinda. Ĉi tiu fakto, kune kun lia lastatempa travivaĵo ĉe Bellevue, evidente plifortigis la kredemecon de la reĝo rilate al signoj kaj aŭguroj⁹.

La sekvintan matenon, antaŭ ol Lia Moŝto ellitiĝis, li ricevis la miregigan novaĵon, ke la plimulto de la membraro en ok ĉambroj de la parlamento sendis leterojn de rezigno¹⁰.

Louis XV-a leviĝis en sia lito ĝis sida pozo kaj diris: „Ho! — la diablo!“ Kiam la unua sinjoro de la reĝa dormoĉambro pasigis al Lia Moŝto lian reĝan ĉemizon, li ree malbenis, sed pli emfaze. Kiam la mastro de la vestaro donis al la sinjoro Intendanto la reĝajn botojn, kiu siavice, pasigis ilin al la ĉefa valetto, Louis ĵuris pro ĉiu sanktulo, ke ĉiu nedankema stultulo de la parlamento nepre devos esti ekzilata. Kiam la botoj estis surtiritaj, li piedbatis la plankon kaj ree ĵuris venĝon.

Neniam antaŭe lia parlamento tiel malkaŝe lin spitis. Li, — reĝo! — estis kontraŭstarata de sia propra parlamento. Tia traktado estis malnobla indignindaĵo metita sur la sanktecon de reĝeco.

Louis nek revenis al Versailles tiun tagon, nek la proksiman, nek la Pompadour. Je tiu tempo ŝi multe konsolis la reĝon.

Ŝi malaprobis la edikton, kiun Louis ĵus proklamis, — ĉar ŝi malamis ĉian ajn deklaron, kiu iel favoris la jezuitojn — ŝi sciis, ke la supereco de la reĝo nepre devas esti konservata. Ne interesis ŝin, ĉu la papo povas erari aŭ ne, sed la dian rajton de la reĝo ŝi ĉiam vigle asertis. Oni nepre devos opinii lin die prava, prava koncerne la direktadon de lia parlamento, kaj — ankaŭ — prava koncerne lian subtenon de lia Pompadour!

Do, Louis, kun ŝia subtenanta voĉo ĉe sia orelo, subskribis ordonon de vivekzilo por ĉiu ribelanta membro.

Estis tiam, ke la plej inteligentaj viroj de la nacio, prezidantoj, juĝistoj kaj advokatoj, sin turnis al la Pompadour, amasiĝis ĉe ŝia palaco en la Faubourg Saint Honoré, atendis en la koridoroj, petegis aŭdiencon, sendis komunikaĵojn, sendis florojn, sendis donacojn, longajn petskribojn, seriozajn leterojn; ĉiu kun la espero, ke ŝi influos la reĝon, modifi la punon, al kiu li ilin kondamnis. Louis estis neatingebla. Sed la Reĝa Favoratino eble estus atingebla, ne sen ceremonio, tamen kun multaj riverencoj kaj la uzo de plaĉaj vortoj.

Ŝi akceptis ilin kun timiganta fieregeco; kiam ŝi parolis, ŝi akre denunciis ilin kun vortoj plenaj de indigno, ĉar ili kuraĝis spiti la reĝon.

Ŝi jam studadis la aferon kaj povis defendi la Suverenon per trafaj argumentoj. Louis pli ol unu fojon fidis al ŝi, kiel kvazaŭa buŝo por si mem. Li estis saĝa, farante tiel nun.

Ŝiaj tonoj elsonoris kun brulanta malestimego:

„Kiu vi estas, Messieurs de la parlamento, ke vi kuraĝas kontraŭstari vian reĝon? Viaj antaŭuloj sub Louis XIV-a ne arogis al si, rezigni post la reĝa parlamento kunveno en la jaro 1673, kvankam tiu okazintaĵo estis pli rigora ol la nuna. Ĉu vi opinias vin de

supera intelekto en komparo kun la membroj de antaŭaj parlamentoj? Mi opinias, ke, se vi rememoros la nomojn de tiuj, kiuj tenis viajn oficojn de la jaro 1673 ĝis 1715, vi konfesos, ke Francujo neniam havis pli eminentajn aŭ pli kompetentajn magistratojn. Aŭ ĉu eble vi opinias, ke Lia Reĝa Moŝto, Louis XV-a, estas ne tiel granda reĝo, kiel lia avo?“

La malestimo en la sono de ŝia voĉo, la kurbo de ŝiaj lipoj havis velkigan efekton.

„Mi certigas al vi, Messieurs, via peto pro indulgo estas vana. Lia Reĝa Moŝto neniam revokos la ekzilitajn membrojn. Ĝojigas lin, vidi sian parlamenton purigata de ĝia malbona elemento“ kaj tiel plu.

Post kvar tagoj de la tumulto, ŝi petegis la reĝon, ke li reiru al Versailles.

„Vi nur lacigas vin ĉi tie sen rezulto. Lasu la aferojn resti, kiel ili estas dum tempospaco. Serĉu distrajon morgaŭ en la ekscito de la ĉasado kaj vespere alkonduku Vian Reĝan personon al Bellevue, kie, mi promesas vin, la festo, kiun mi projektas, donos al vi iom da plezuro.“

Ĉ A P I T R O * X V I

ANIMO ESPLORAS SIN

Kiel prosperis Romain de Vrie dum ĉi tiu tempo, enkarcerigite en la koro de palaco?

Kvin tagoj de malsatado kaj malespero havis rimarkblan psikologian efekton. Ĉi tiu kortegano kaj amanto, juna, impulsema, aristokrata, kvazaŭ ricevis nekutiman sakramenton dum sia soleca komunikado kun si. Ĉe tiu kvazaŭa komunio la soleco mem agis kiel la pastro, kiu prezentis al li la pokalon de rememorado. Liaj memoroj estis maldolĉaj, kiel acidiganta vino; kaj similaj al feĉoj en fundo de pokalo estis la amaraj rememoroj pri lia memama, senanima antaŭa ekzistado.

Kun pliiĝanta miro, dubo kaj timego, li vidis strangajn viziojn en tiu soleca ĉambro. Kiam la unua fajro estingiĝis kaj la lumo de la flagretanta kandelo formortis, Romain sin okupis per konjektoj intermiksitaj kun esperoj kaj miro. Restaĵoj de lia matenmanĝo estis atingeblaj sur la tablo, kaj per puŝado kontraŭ la muro li povis movi sian kanapon sufiĉe, por meti manon sur la akvobotelon.

Fine la certeco de ia katastrofo al Lemoyne eniris lian cerbon, kaj multe da demandoj venis en lian menson.

Romain senpacience atendis.

Dufoje tagmezo anoncis sin per timema rapido de lumo sur la muro, sed neniu venis. Nenia soneto enrompis en la netolereblan silentecon de tiu ŝlosita ĉambro. Li

estis lasita tie, por morti same kiel rato en truo, senpova moviĝi de sia kanapo, enfermita en ĉambro, pri kies ekzisto mem oni ne sciis; la teruro de la tuta afero kelkfoje devigis lin, frapi kaj bati en furioza frenezo kontraŭ la muro ĉe sia flanko. Sed nenia sono penetris la timigan silenton.

Fine la silento ŝajne komencis paroli. El la ombrecaj anguloj minaca estaĵo ŝajnis malvolvi sin; la Spirito de la Ĉambro, timiga kaj silentema, kvazaŭ aperis, por aldoni teruron al liaj pensoj.

La malhelaj ŝildoj kaj armilaro sur la muroj havis terurojn proprajn. Interne de kasko kun viziero super la fajrejo li imagis, vidi mortintan vizaĝon rikane rigardantan al li.

Sed tiuj eksteraj fantomoj estis nenio kompare kun tiuj en li mem. Fantomoj de honto, memriproĉo kaj pekoj longe forgesitaj komencis formiĝi en lia menso. La malsaĝeco de lia amo al la Pompadour fariĝis ridaĉanta demono, kiu ŝiris kaj mordis lian koron. „Ho, kiel malalten, kiel malalten mi falis!“ Delira ridado skuis lian korpon, dum li pensis pri sia pasinta blinda kaj stulta adorado.

Fine li vidis ĉion, kvazaŭ libro kuŝas malfermita antaŭ li. Ŝi tute ne amis lin; ŝi — kiu povis mallaŭdi kaj riproĉi lin, kiam ŝi pensis pri okazebla al si mem danĝero, post kiam li oferis rangon, nomon, amikojn, ĉion krom vivo mem, por esti apud ŝi — ŝi, kiu lasis lin sen vorto de adiaŭ — por sekvi la reĝon al Parizo!

La amo de Romain ŝanĝiĝis en malamon; lia cerbo en implikaĵon de serpentoj.

Kristo! li povus ĵuri, ke tiu kasko moviĝis! Li levis sin ĝis sida pozo por rigardi, sed baldaŭ falis reen pro laciĝo.

Inter doloro kaj malsato la tempo malrapide forpasis; ĉiu minuto estis kvazaŭ terura tago, ĉiu horo ŝajnis eterneco.

La sekvintan tagon li estis pli malforta. Li havis malpli multe da forto por furiozi; malsatego povas sufoki koleregon.

Li vidis aliajn viziojn: li vidis sin, kiel li estis dum siaj knabojaroj, vestita per la ornamaĵo de paĝio, pudrita, parfumita kaj frizita. Li vidis sin avida al reĝa favoro, riverencanta, kaŭranta, surgenuanta. Bah! — la memoro naŭzis lin. Li turnis al la muro la vizaĝon. La ĉambro estis malluma, sed en lia animo stranga, klara lumo leviĝis. Ĝi montris al li, kiel granda estis lia egoismo, obstina, aplomba, memfida — dandon — kanajlon; li rememoris, kiel li kondukis kompatindan Pierre en la vojon de morto. Sanktoj en Ĉielo! kiel multe li malamamis sin kaj abomenis la vivon, kiun li ĝis tiam vivis! Kortega grandiozeco vidiĝis kiel parada mokado; li vidis ĝian vanecon kaj absurdecon.

Tiam liaj pensoj konfuziĝis; li ne povis sennodigi ilin. Li kredis, ke li songas kaj terura inkubo venis al li. Li kriegis, liaj kriegoj estis englutataj de la monstra silento.

Tiam li aŭskultis kun freneza teruro — li imagis, ke li aŭdas mokan voĉon de interne de tiu fera kasko!

Li senkonsciigis, tiam baldaŭ rekonsciigis, sed nur renovigis la rondon de angorigantaj pensoj. En liaj pli trankvilaj momentoj li penis preĝi; li komprenis, ke morto estas proksima. Li pensis pri la mistero de la estonteco. Ĉu estas Dio en ĉielo? Ĉu ekzistas ĉielo? — Ho! — Ĉiopova potenculo! Ĉu estas eble infero? Li ĝemis, li spasme ploris, li kuntiregis la manojn kaj dentojn, disŝiris sian vestaron, taŭzis siajn harojn kaj tordiĝis en angoro de timego pro sia animo. Lia tuta vivo estis

peko, kiel li vidis ĝin en tiuj horoj. La penso pri Pierre — la viktimo de obstino kaj malsaĝeco — lin sentigis, ke li estas mortiginto. Li ĝemis per malfortiĝanta voĉo, kaj dum deliraj momentoj babiladis disajn vortojn el la Pater Noster:

„— *debita nostra, — libera nos a malo.*“*)

Ree venis klaraj momentoj, kiam li malprecize sentis, ke ne gravas, ĉu li vekigis en ĉi tiu mondo aŭ en la sekvonta. Malamo ne plu loĝis en lia koro; li forgesis, kiel senti malamikecon. Iafoje li travivis deliran ekzaltecon. Tiam, subite, grandega malespero denove ruliĝadis super li kvazaŭ ĥaoso.

En la intermitaj momentoj de konscieco, kiuj grade venis malpli oftaj, li pripensis la tutan aferon — li esploris la kaŭzon de sia nuna kompatinda stato; li opiniis, ke la reĝo planis ĉi tiun turmentan morton por li; estis la reĝa plezuro, ke li pereu en la palaco de la Pompadour. Li ne dubis, ke iu retenis Lemoyne.

Tiel Romain rezonis, ĝis denove deliro komplete forkiriligis lin de la dentegoj de memriproĉo.

*) — niajn ŝuldojn, — liberigu nin de la malbono.

Ĉ A P I T R O * X V I I

FESTO EN BELLEVUE

Multaj festoj okazis ĉe Bellevue en la dek jaroj, dum kiuj tiu kasteleto estis fama; ĉiuj festoj estis malsimilaj. La genieco de la Pompadour faris surprizon por ĉiu. La plezuro de la reĝo estis la celo de ĉiuj ŝiaj fantazioj. La temperamento de Louis XV-a povis esti gajigata nur per surprizegaj okazaĵoj. Se li sciis antaŭe, kio okazos, lia supersateco tute senigis la aferon de intereso. Estis necese surprizi lin. Alie li sentis sin enuigata. Louis havis veran pasion por io neordinara kaj surprizega ĉe siaj amuzoj.

Tial je la vespero de la 18-a la gastoj, kiuj deiris de siaj bruaj laŭmondaj kaleŝegoj ĉe la granda enirejo al la kasteleto, brilega pro flamaj torĉoj kaj miloj da kandeloj, ne sciis la surprizon, kiu atendis ilin.

„Sed ni estas certaj, ke ni renkontos spriton kaj saĝecon, belecon kaj nobelecon“, diris la grafo Kaunitz, la fame konata aŭstra ambasadoro, dum li malsupreniris la larĝan ŝtuparon, kie staris vico da livreuloj. Li diris tion al samlandano ĉe sia flanko, kiu ne konis Bellevue kaj la kutimojn de ĝia posedanto.

La grafo Kaunitz kaj lia sekvantaro formis notindan grupon. La aŭstra ambasadoro estis fama pro sia zorgeme elektita vestaro, ankaŭ pro sia eleganta sintenado kaj brilega intelekto. Butonoj, ornamitaj de diamantoj, oraj agrafoj kaj pezaj rusaj zibeloj, ornamis la belegan

siringokoloran atlasan kostumon, kiun li portis tiun nokton. Lia kunulo, princo de Hungarujo, portis pelerinon el tигра felo kun ora franĝo kaj oraj ŝnuroj. Ĉiuj okuloj ilin rigardis, dum ili kuniĝis kun la brilega grupo, kiu staris en la ĉefa salono, atendente ĝis la Pompadour eniros.

„Kiu estas la malgranda viro kun la aŭstra pavo?“ demandis Madame de Mirapoix, mezavoĉe, la Dukinon de Grammont, kiu je tiu momento kaŝe rigardis la pendmanieron de sia *Watteau*-a plektajo. Ne atendente respondon, Madame de Mirapoix daŭrigis paroli pri la grafo Kaunitz.

„Ĉu vi scias“, ŝi diris, „mi aŭdis, ke por pudrigi siajn harojn, li kuras tien kaj reen en sia ĉambro, dum kvar valetoj ŝprucetigas pudron en la aeron el pufbuloj?“

Post momento ĉiuj okuloj turniĝis al la ceremonia eniro de la Granda Markizino.

„Dio mia! ŝi ja estas brila hodiaŭ nokte! tute en trembrilanta blanko!“ — Madame de Mirapoix diris al sia amikino la dukino: „Madame de Coislin devus ja diri bonan nokton kaj iri hejmen en tiu karmezina kostumo.“

Madame de Coislin estis unu el la multaj beletaj virinoj, kiujn la malamikoj de Madame Pompadour — notinde la ĉefministro — pli kuraĝigis, kiam ajn ŝi penis anstataŭi la regantan Favoratinon.

La dukino de Grammont konfidence anoncis sian opinion, ke la afero inter la reĝo kaj la Coislin iris sufiĉe, por esti serioza.

„Ne kredu tion“, estis la tuja respondo. „La markizino ne havas kaŭzon por tremi. Ŝi faris bone, invitante sian rivalinon. Rigardu ilin nun flankon ĉe flanko; la Pompadour — perlo! la Coislin — karbunklo!“

Fanfaro de trumpetoj anoncis la alvenon de la reĝo.

„Lia Reĝa Moŝto ŝajnas enuigata en la komenco!“
diris la nesubpremebla de Mirapoix — tiun ĉi fojon al
pastro de Bernis.

„Fidu al la markizino, por dispeli tiun nubon.“

Kaj jam la unua ekrigardo de Louis al la Pompadour
montris surprizon kaj admiron. Li marŝis ĉe ŝia flanko
al la granda manĝoĉambro kaj tute malatentis Madame
de Coislin, kiam li preterpasis.

En la grandioza manĝoĉambro surprizo atendis. Ŝajne
solida amaso da rozoj, miriadoj da ili de ĉiu nuanco,
kovris la murojn, kaj la aero estis peza pro delikata
bonodoro. Tia rozlaŭbo en vintro kaŭzis la plej grandan
miregon.

„Kian magiaĵon havas ŝi, por alvoki sudan Italujon
al Bellevue?“

„Festo de floroj en Decembro!“

„Songo de somermeza nokto!“

La reĝo eletendis la manon, por deŝiri unu el la
floroj, kaj kiam li tuŝis ĝin, Madame Pompadour ekkriis:
„Jen! la malplej delikata tuŝo de Via Reĝa Moŝto faris
la floron senperea!“

Tio ja ŝajne estis vera, ĉar tiu floro kaj ĉiu alia estis
el porcelano de Sèvres; ĉiu el ili estis artaĵo.

Kiam oni komprenis la grandegan malŝparegemon de
la elmonro, la vastegecon de la ellaboraĵo, ĉar ĝi estis
nova elfaraĵo en ceramiko, krioj de ekscitita miro kaj
admiro eksonis de ĉiuj flankoj de la salonego. La kutima
sindetenco de kortegaj funkcioj rompiĝis. Mirego flugis
tra la glaciitan kruston de kortega etiketo; formaleco
cedis al viveco.

La festo de Madame Pompadour estis granda sukceso.

La reĝo proponis toston: „Dank’ al viaj penoj, Ma-

dame, la famo de Sèvres estas nun superega. Mi trinkas pro — la Princino Porcelano!“

La aŭstra ambasadoro klarigis al sia amiko: „Oni diras, ke la Pompadour eksperimentas en la laboratorioj kaj faris pli ol unu eltrovaĵon valoran por Sèvres. Ŝi estas mirinda virino; per unu mano ŝi estas formanta traktaton, per la alia ŝi formas vazon!“

Sed inter la multe parolita laŭdo de la Pompadour sin kaŝis pensoj tute malsimilaj. La ĉefministro, ĉiam invitita, kvankam ĉiam malamata, grumblis mezavoĉe:

„Porcelana princino — en domo el vitro!“

Li preskaŭ povis aŭdi la krakegon, kiu venus, se la kanajlaro komencus ĵeti ŝtonojn. La penso pri ŝia malŝparo kvazaŭ bolis en lia sango. Li sciis tro multe pri la stato de la nacia trezorejo, por rigardi serene tiajn malriĉigantajn elspezojn.

„La livilizaĝa hirudo!“ Li submurmuris fluon da mal-laŭdegaj epitetoj inter siaj dentoj.

Oni proponis aliajn tostojn kaj graciaj trinketis, dum okulo renkontis okulon kaj glaso tuŝis glason. Ridado kaj ŝerco miksiĝis kun la sono de plaŭdantaj fontanoj, la tonoj de violono, violonĉelo, harpo kaj fluto.

Poste oni malfermis la pordojn de la muzikĉambro, kaj tie la granda orgeno, ĵus kompletigita, estis ludata la unuan fojon. La aŭskultantoj, en graciaj grupoj sur atlaskovritaj divanoj apud ili kaj malantaŭ ili, dum la reĝo sidis sur la plej impona sidejo, apartigita por li, formis bildon de impresa eleganteco. Plumecaj ventumiloj malvigle svingiĝis, dum la okuloj de belulinoj ekrigardis supren al admirantaj kavaliroj. La poluritaj plankoj rebrilis altkalkanajn pantoflojn kaj bukajn ŝuojn, kaj speguloj duobligis la miksaĵon da brokataj silkoj, pudritaj haroj kaj brilegaj juveloj.

Madame de Pompadour sidis apud la reĝo — vera „maldekstremana“ reĝino. Tiu estis triumfa horo por la Favoratino. Ŝi sentis sian povon kaj sciis, ke ŝi superbrilis sian ruĝerobitan rivalinon same, kiel lilio superbrilas peonion. Ŝi sciis ankaŭ, ke ŝi ja ensorĉis la reĝon.

Tamen la Pompadour subsentis antaŭtimon, kiu maltrankviligis ŝin, kaj kiun ŝi ne povis forpeli, sennoman antaŭsenton, kiun ŝi ne povis klarigi al si, ĝis subite ŝi komprenis ĝian kaŭzon. Tiu estis Romain de Vrie! Ŝi absolute forgesis lian ekzistadon ĝis nun! Ŝi revenis tre malfrue de Parizo, ŝi apenaŭ havis sufiĉe da tempo, por sin vesti antaŭ la horo de la vespera festo. Stranga antaŭaverto de malbono ŝvebis super ŝi; verŝajne pro nenia alia kialo ol la konscio, ke la reĝo kaj Romain estas je tiu momento, provizore, sub la sama tegmento. Ŝi bedaŭris, ke ŝi ne vidis Lemoyne por instigi lin, ke li estu gardema; ŝi sopiris al la fino de la festo.

Estis post noktomezo, kiam la reĝo anoncis, ke li foriros. Akompanata de sia brila eskorto — la Mastro de Ceremonioj kun sia ora stango puŝanta antaŭen, kriante: „Spaco por la reĝo!“ — Louis faris imponan eliron. Li moviĝis malrapide antaŭen, kapklinante iomete al la vico da korteguloj ĉe ambaŭ flankoj, parolis vorton ĉi tie kaj tie; signo de eminenteco, kiun ĉiuj deziris.

Apud la ĉefa enirejo de la kasteleto la reĝo subite haltis kaj forsendis preskaŭ ĉiujn el sia sekvantaro, klarigante, ke li ankoraŭ havas gravan aferon por diskuti kun la markizino.

Oni ordonis, ke liaj du kavaliroj atendu lin en unu el la antaŭĉambroj.

Ĉ A P I T R O * X V I I I

LA MUROJ HAVAS LANGOJN

Louis eniris per malgranda, privata ŝtuparo al la bu-
duaro de Madame Pompadour. Sidigante sin komforte, li
ĝuis la sentadon, ke li estas absolute sola. Tra la
fenestroj venis sonoj de forirantaj gastoj, la klakado de
enbuŝaĵoj de la moviĝemaj ĉevaloj, la fermado de kaleŝaj
pordoj, la kriegoj de antaŭrajdantoj kaj la kurado de
torĉoportistoj.

Louis trankvile rimarkis la familiarajn meblaĵojn, tiel
bonguste aranĝitajn, ke ili ĉiam interesis lin. Sur la
muroj troviĝis la plej novaj pentraĵoj de David kaj Boucher,
kaj intermiksitaj vidiĝis gravuraĵoj, kiujn la markizino
mem gravuris kaj presis. Ŝi estis lerta je la arto. De-
segnaĵoj ŝiaj kuŝis sur la skribtablo, kiu estis farita el
mozaika palisandro kaj eburo kun arĝentaj garnaĵoj.

Sur tablo apud la reĝo staris la grandfama, juvele
enkadrigita miniaturo de Marie Thérèse, kiun tiu reĝino
donacis al la Pompadour, antaŭ ol oni subskribis la
aŭstran traktaton de interligo. Apud ĉi tiu ŝategata
memoraĵo estis la eta bareliefo, kiun skulptis la markizino
sur oniksa ŝtono, emblema desegnaĵo ŝia propra, in-
spirita de la interligo. La reĝo esploris ĝin detale,
mense laŭdante kaj la artaĵon kaj la farintinon. Tiam
io igis lin ekrigardi ĉirkaŭ la ĉambron kun embarasa
esprimo. Li leviĝis de sia seĝo — malantaŭen puŝis ĝin
— tiam residiĝis.

Post kelka tempo li ree sentis instigon, leviĝi kaj aŭskulti; li marŝis la longon de la ĉambro kaj returnen.

Tiam li malfermis la fenestron kaj elrigardis sur la balkonon, same kiel li faris je alia okazo antaŭ kelke da tagoj. Revenante al sia seĝo, li sin klinis kaj rigardis sub la tablon — plej nereĝa ago!

Sed ĉi tiu stranga agado ĉesis, kiam la pordo malfermiĝis kaj Madame Pompadour eniris, sekvate de Madame du Hausset, kiu ricevis en siajn brakojn la ventumilon, gantojn, braceletojn kaj parfumujojn, kiujn la markizino rapide alĵetis al ŝi, kun flueto da vortoj kaj ordonoj, ĝis subite la gastigantino ekvidis sian vizitanton.

La lasta persono sur la terglobo, kiun Madame Pompadour deziris vidi en sia buduaro je tiu momento, estis Louis XV-a de Francujo!

Sed jen li estis, komforte sidanta, kaj ŝajne nenio urĝa alvokis lin. Ŝi mense cedis sin al eble longa konsultado kaj alprenis korecon, kiun ŝi ne sentis.

„Ni trovas nin neatendite honorata — — —“, ŝi komencis.

(Estas notinde, ke, kune kun la reĝa purpuro, Madame Pompadour antaŭ longe alproprigis al si la reĝan pluralon.)

„Ĉu Via Reĝa Moŝto atendis longe?“

„Dum la lasta duonhoru mi servis ĉi tie kiel Gardanto de via buduaro.“

Estis iom surprize, aŭdi la reĝon fari uzon de nomo, kiu dum la tuta vespero estis pli aŭ malpli en la menso de Madame Pompadour. Ŝi ekrigardis supren surprizite, sed ŝi rekuraĝiĝis, kiam la reĝo aldonis:

„Kian rekompencu mi ricevos por la ofico?“

„Nenian, Via Reĝa Moŝto“, ŝi respondis facile, „ĉar Bellevue jam havas tian oficiron! ĉu ne, du Hausset?“

Tiu sinjorino subite aspektis tiel serioza, ke la markizino senkonscia almetis alian „ĉu ne?“ al sia demando, je kio Madame du Hausset decidis, diri faktojn.

„Sed li estas mortinta, Madame. — Ĉu neniu informis vin?“

„Mortinta? kiu estas mortinta?“ Madame Pompadour akre demandis.

„La novulo, Madame, la Gardanto de la buduaro, oni mortigis lin; okazis kverelo je kartludo.“

„Kiam okazis tiu afero?“ Madame Pompadour parolis per tonoj bone regataj, sed ŝia vizaĝo paliĝis videble kaj montris ŝian agitadon.

Madame du Hausset ne povis rememori — „hieraŭ estis mardo, — ni havis la dekoraciistojn je lundo; ho, jes, nun mi rememoras; ĝi okazis je la tago, post kiam Madame iris al Parizo“.

Kvin tagojn! Madame Pompadour ekstremis. Ŝi pensis pri de Vrie kaj lia mizera stato.

Tiam ŝi pensis pri si mem. Ŝi sentis sin kvazaŭ en retaĵo, ĉirkaŭvolvita de danĝero. Blindiganta timo bildigis la grafon kaj la reĝon kune; al ŝia konfuzita cerbo ilia renkontiĝo ŝajnis proksimega. Ŝi estus bonvenanta ter-tremon — revolucion — kion ajn — por forsendi la reĝon for de Bellevue je tiu momento.

Sed kontraŭema sorto regis alie. Madame du Hausset subite fariĝis komunikema, fiera, ke ŝi donis novaĵon al tiaj majestaj personoj.

„Ĉu vi scias“, ŝi komencis, per ŝia ĉiam serena monatono, „ke — stranga afero — depost lia morto, en ĉi tiu parto de la kasteleto, ni aŭdis strangajn frapojn kaj sonojn kvazaŭ la loko estas fantome vizitata!“

„Kio! alia fantomo!“ la reĝo eksaltis de ekscito. „Mi

mem aŭdis la sonojn antaŭ nelonge; ili treege maltrankviligis min.“

Madame Pompadour ekkaptis streĉite la malantaŭon de la seĝo, kontraŭ kiu ŝi apogis sin. Tiam, regante sin, ŝi penis aperi senĝena, malgravigi la aferon, sed Louis interrompis ŝin.

„Ni aŭskultu; eble ni povos aŭdi la sonojn denove.“

Estis vere la horo por fantomaj vizitoj. Dum ili aŭskultis, ĉio estis silenta en la kasteleto. La nokto estis malluma kaj la iluminacioj estingitaj; eĉ en la buduaro la kandeloj estis preskaŭ forbrulitaj. Nenia sono interrompis la silenton.

Post kelkaj momentoj de senfrukta necerteco, la reĝo demandis Madame du Hausset, ĉu oni aŭdis la frapadon dum la tago same kiel dum la nokto.

„Ni aŭdis ĝin hodiaŭ matene, Via Reĝa Moŝto“, ŝi respondis per obtuzaj tonoj, „sed aŭskultu! — aŭskultu!“

Madame Pompadour levis la kapon; la reĝo ankaŭ haltigis la spiron, ĉar je tiu momento, malproksime sed klare, ili aŭdis frapetadon ĉe la muro; kadavra sono, kvazaŭ la ostaj fingroartikoj de morto mem frapas pro enlaso. La efekto estis terurega, timiga, fantoma; tamen ŝarĝita de nedifinebla homa petego, kiu trapikis la koron.

Madame Pompadour dum momento tute forgesis singardon:

„Li estas enterigita viva!“

„Ne, Madame, li estas mortinta, mi certigas al vi, kaj enterigita iom malproksime de ĉi tie.“

La senĝenaj tonoj de Madame du Hausset ekpensis la markizanon pri la danĝeraj vortoj, kiujn ŝi ĵus diris.

„Jes, kompreneble“, ŝi rapide konsentis, — ŝi ĝoje ĉirkaŭprenus la bonan du Hausset pro ŝia ĝustatempa respondo! — „sed ĉi tiu okazaĵo — tiel eksterordinara

— en mia propra kasteleto — —.“ Firma decido subite sonis en ŝia tono. „Mi nepre devas esplori, kaj tuj, Via Reĝa Moŝto. Kun via permeso — — —.“

Tiu estis hazarda kaj vana peno; Louis restis senmova. Eble li eĉ ne aŭdis ŝiajn vortojn; li estis pensanta.

„Mi volus scii“, lia voĉo sonis imprese, „mi opinias, ke eble tiu povus esti denove la fantomo de la grafo de Vrie?“

Li apenaŭ sciis la signifon de siaj propraj vortoj; ilin sugestis serio da pensoj, ne ankoraŭ formitaj en lia menso. Sed kugloj pafataj en la aeron povas hazarde trafi la viron, kiu sin kaŝis inter la branĉoj de arbo. La tro streĉitaj nervoj kaj la maltrankviligita konscienco de Madame Pompadour igis ŝin aŭdi en la vortoj de la reĝo nur la plej profundan sarkasmon. Ŝi timis, ke li scias pli, ol li ŝajnis, kaj ke pro tiu vera kialo li elektis la nunan intervjuon. La tero tremis sub ŝiaj piedoj.

„Kiu informis vin? kion vi scias? ne kulpigu min. — Mi iam klarigos ĉion, mi promesas, sed ne nun — ne hodiaŭ nokte.“

Ŝi duobligis vortojn por havi sufiĉe da tempo, elpensi ian miton, per kiu ŝi povus savi sin. Ŝiaj tonoj estis rapidigitaj kaj montris ŝian intensan timegon.

Madame du Hausset, vidante la minacan ciklonon, diskrete foriris.

Louis nun plene instigita de suspekto pro la vortoj kaj maniero de la markizino, kaj konvinkita, ke nenio supernatura apartenis al la mistera frapetado, subite parolis severe:

„Tuj klarigu al mi, Madame, la Reĝo ordonas!“

Neniam antaŭe li tiel alparolis ŝin, sed, verdire, lia tono komunikis al ŝi subitan trankvilecon kaj komprenadon. La du staris dum momento vizaĝon kontraŭ

vizaĝo. Louis XV-a de Francujo kaj la ordonema Markizino de Pompadour. Ambaŭ subite fariĝis kontraŭuloj, subite firme decidaj.

Ŝia respondo venis per tonoj klaraj kaj sen tremo; ŝi zorge pripensis siajn vortojn.

„Tio estas la grafo de Vrie.“

„La grafo de Vrie! Konfuziteco, mirego kaj kolero evidentigis en la voĉo de la reĝo, sed la vizaĝo de la markizino ne paliĝis. Nenia signo de maltrankvilo videbliĝis, kiam ŝi aldonis:

„Jes, la grafo Romain de Vrie; li ne estas mortinta.“

„Morto kaj kondamno! ĉu vi intencas diri al mi, ke tiu viro ankoraŭ vivas?“

„Jes.“

„Sed ĉu mi ne vidis lin kiel mortintan en la arbarego de Sta. Germain?“

„Ne — ne la grafon de Vrie.“

„Mil tondroj! Mi ja lin vidis?“

„Alian viron, kiu treege similis lin.“

„Alian viron!“ Louis paŭzis en sia suspekto kaj, anstataŭ malbeni plu, li subite fariĝis pensema kaj mediteme marŝis tien kaj reen en la buduaro.

Revenante al la markizino, li parolis kun tuta ĝentileco, dum li montris sur seĝon.

„Bonvolu sidiĝi, Madame. Ni sidu senĝenaj, dum vi kun via kutima afableco amuzos min per bona rakonto — amrakonto sendube!“

Madame Pompadour sidigis sin laŭ lia peto. Ŝi tenis sin kun mortsimila trankvileco, kiu preskaŭ konfuzis la reĝon, dum ŝi ripetis liajn vortojn, milde kaj senĝene.

Ŝi rigardis al li sentime kaj parolis malrapide. Ŝia decido postulis plej zorgan uzon de vortoj. Ŝi devis nepre ne faleti en sia rakonto.

La reĝo instigis ŝin daŭrigi:

„Do — komencu. Foje inter la diversaj amantoj de Madame de Pompadour estis unu Romain de Vrie; fama kanajlo, hipokritulo, ekzilito. Jen estas via ekkomenco. Daŭrigu, Madame.“

Kun nenia nuanco de ofendiĝo ŝi respondis decideme: „Vi eraras, Via Reĝa Moŝto; li amas alian.“

La reĝo ridetis kaj faris malaprobajn gestojn.

„Mi estas malpli interesata, Madame, en ĉi tiuj asertoj, ol en klarigo pri la reveno al vivo de ĉi tiu nobla sinjoro! Cetere, kompreneble estus klare al ĉiu ajn, ke vi faris diversajn penegojn, lin savi nur, ĉar li amas alian!“

„Via Reĝa Moŝto volas esti sarkasma, tamen viaj vortoj prave klarigas mian situacion. Mi penis savi la grafon de Vrie pro nenia alia kialo, ol ĉar mi kompatis la virinon, kiun li amas, kaj ankaŭ, ĉar la eksciteco de lia aventuro estis iom alloga al mi.“

Madame Pompadour tiam klarigis, kiel Romain uzis anstataŭulon, kies subita morto okazigis ĉiujn ĉi terurajn kaj ne antaŭe viditajn rezultojn.

„Vi vidas, Via Reĝa Moŝto, mi ne povis ne admiri la kuragon de viro, riskanta tiel multe, por resti proksime de la virino, kiun li amas.“

La reĝo kapoklinis serioze. „Mia denaska veremeco konfesigas min, ke nur unu virino en tuta Francujo povus devigi viron tiom ami ŝin. Vere mi ne povas kulpigi la bravan grafon, aŭ eĉ miri pri la senzorgeco, kiun li montris, permesante al mi eltrovi lin en via buduaro!“

Madame Pompadour ekstremis de timo, sed rapide trankviliĝis kaj milde diris:

„En mia buduaro, jes; sed ne por vidi min. Li amas

mian novan protektatinon, Destine de Vârel, la junan kantantaron de Sankta Cyr, kiun vi aŭdis demandi pri li tiun tagon, kiam ni revenis de la ĉasado.“

Surprizita Louis sendube estis, sed ne konvinkita. Li frapetis per la fingroj sur la tablo kaj kapojesis senpacience:

„Jes — mi rememoras.“

„Mi petas, Via Reĝa Moŝto, kreu al mi, mi parolas tute vere, kiam mi certigas al vi, ke mia juna protektatino estis en mia buduaro tiun tagon, antaŭ ol oni anoncis Vian Reĝan Moŝton.“

Ĉi tiu ĉarma oazo de vero en la sekega etendaĵo de fikcio, tra kiu ŝi tiel dolore faris sian vojon, multe refortigis kaj kuraĝigis la markizinin. La nudaj branĉoj de ŝia rakonto ekkreskigis freŝajn florojn de fantazio.

Destine jam konfidis al mi, kaj kiam la grafo sin turnis al mi, estis nur nature, ke mia kompato vekigis, kvankam mi lin riproĉis severe, ĉar li evitis vian ordonon de ekzilo. Nun, Via Reĝa Moŝto, mi humile petegas, ke vi pardonu, kian ajn trompadon mi ŝajne faris; kaj nun, ĉar vi scias ĉion, permesu, ke mi petu, ke vi liberigu de via malplezuro, ne nur min mem, sed ankaŭ la grafon de Vrie.“

Madame Pompadour sciis, ke en petantaj humoroj ŝi estas plej alloga kaj preskaŭ nekontraŭstarebla. Do ŝi daŭrigis sian petegon kun kuraĝo kaj konfido.

„Kiam vi komprenas lian nunan pozicion, mi estas certa, Via Reĝa Moŝto, ke vi nepre sentos kompaton. Li estas vundita, malsana kaj senpova. Mi lasis lin zorgata de la Gardanto de la buduaro. Neniu alia sciis, ke li estas en la kasteleto.“

„Ha — mi komencas kompreni“, la reĝo ŝin inter-

rompis. Lia voĉo estis severa. Li ripetis siajn vortojn malrapide.

„Mi komencas kompreni — vian agitado. Mi vidas ankaŭ, kion vi intencis, dirante, ke li estas enterigita viva!“

Louis paŭzis momenton mediteme, tiam li daŭrigis, ĉiam observante la markizinin:

„La misteraj frapetadoj estas ankaŭ klarigitaj; la malfeliĉa grafo estas frapinta pro helpo.“

La Pompadour mute kapojesis, sed parolis neniun vorton por influi lin. Louis rekomencis sian monologon:

„Kaj nun vi atendas, ke mi kredos, ke Monsieur la grafo de Vrie elportis ĉiujn malfeliĉaĵojn pro sia granda amo al juna protektatino via!“

Digna silento je la parto de la markizino estis la sola respondo, kiun li ricevis. Ŝiaj okuloj rigardis en liajn sen tremo.

Estis alia mallonga paŭzo, kaj tiam Louis anoncis ĝentile: „Via rakonto estis tre plaĉa, sed mi devas diri, ke mankas la necesa pruvo.“

Madame Pompadour estis preta por ĉi tio. Ŝi tuj alprenis mienon de ofendita virto kaj sen vorto brue sonoris la sonorileton sur la skribtablo. Madame du Hausset senprokraste aperis.

„Venigu Mademoiselle de Vârel al mi tuj,“ estis la malhumila ordono, laŭ kiu la korteganino iris senprokraste por plenumi.

Madame Pompadour tiam sin turnis al la reĝo kun impona ŝajnigo de virta kolerego.

„La suspekto de Via Reĝa Moŝto estas preskaŭ preter tolerado. Estas mia malfeliĉo, esti amanta reĝon; neniuj alia viro kuraĝus, tiel min trakti.“

Ŝi estis paŝanta tien kaj reen kun belega furiozo. Sed estis io grandioza ankaŭ en la kolero de la reĝo. Li

kvazaŭ subite malŝtopis la plej maldolĉan boteleton de sia kolerego; ĝia enhavo dum la pasinta horo acidigis kaj bolis en lia cerbo, ĝis fine ĝi superŝaŭmis.

„Kia estas mia suspekto kompare kun viaj agoj? Vi helpas kondamniton viron forkuri de via balkono. Vi faras min, Louis de Bourbon, Reĝon de Francujo, ridinda al liaj okuloj, ĉar kriante: „Hu! jen estas fantomo!“ vi volis timigi min, kvazaŭ mi estus infano!“

La reĝo batis la tablon tiel furioze, ke la miniaturo de Marie Thérèse renversiĝis.

„*Mordieu!* Madame postulos multe da afableco viaparte, igante min forgesi tion!“

La Pompadour, anstataŭ respondi, ĵetis sin sur la divanon kaj ploris tre malfalsajn larmojn. La reĝo estis viŝanta sian frunton por malvarmetigi la varmon de sia kolero, kaj oni ne estus povinta diri pri la rezulto de tiu sceno de larmoj, se Madame du Hausset je tiu momento ne estus reveninta kun Destine — tiel mirigita junulino, kiel oni iam vekis el profunda dormo. Ŝi ne havis sufiĉe da tempo por aranĝi siajn harojn, kiuj estis en ĉarma malordo de fluantaj bukloj. Ŝia robo estis rapide surmetita kaj, sen la zorge krucigita koltuko, montris, kiel ŝajnis al Destine, malmodestan malkovron de l' gorĝo kaj brusto. Ŝi estis dezirinta kuregi al sia ĉambro kaj rebonigi tiun forlason. Sed Madame du Hausset estis malkonsentinta.

Trovante sin ĉe la reĝo, la junulino fariĝis beleta bildo de ruĝiganta modesteco. Ŝia aspekto multe helpis pacigi lin, sed la Pompadour ankoraŭ ne estis ludinta sian plej bonan karton. Kun konvinka aplombo ŝi sin turnis al sia protektatino.

„Mi ĵus diris al la reĝo vian beletan rakonton pri la grafo de Vrie. Mi volas, ke vi montru al Lia Reĝa Moŝto

la puntan poŝtukon, kiu estas tiel kara al vi kiel memoraĵo.“

Obeante kun konfuzo, Destine eltiris el sia korseto la etan memoraĵon, kiun ŝi malligis de la blua rubando kaj mute donis al la reĝo, kiu, silente rimarkinte la broditan nomon, respekte redonis ĝin, dum Madame Pompadour en triumfa ripozo lasis al la eta pantomimo elfari sian laboron.

Ŝi palpe serĉadis sian vojon tra longa, malluma tunelo, sed fine ŝi atingis malfermon. La reĝo montris per sia mieno, ke li ne plu povis malkredi ŝian rakonton.

Ŝia ĝojo estis iom tro evidenta.

„Via Reĝa Moŝto, mi estas certa, ne plu prokrastos permeson, ke mi helpu mian malfeliĉan malliberulon.“ Per gesto ŝi estis forsendonta Destine kaj Madame du Hausset. Sed la reĝo rapide parolis; lia diraĵo falis kvazaŭ ŝtonego sur ŝian vojon:

„Certe, sendu Mademoiselle de Vârel al li tuj.“

Destine, kiu estis ĵus forlasonta la ĉambron, turniĝis aŭdante sian nomon, kaj Madame Pompadour, laŭkutime, kiam ŝi estis embarasita, parolis tre rapide kaj plenigis la aeron de nervoza viveco.

„Sed mi ankoraŭ ne sciigis ŝin pri lia malsano, ŝi estos tre maltrankvila. Kaj ĉiaokaze estos necese, ke mi iru kun ŝi, ĉar ŝi estas nova en la kasteleto kaj ne scias la vojon. Se Via Reĝa Moŝto permesos min —.“

La streĉado de ĉi tiu tuta intervjuo tiel lacigis la nervojn de Madame Pompadour, ke ŝi blinde serĉis ian rimedon por ĝin fini.

Sed Louis ankoraŭ estis persista.

„Sendu vian korteganinon!“

„Sed ŝi ankaŭ —“ la Pompadour sin haltigis, sed Louis finis la frazon por ŝi:

„— ne scias la vojon. Ĉu mi ne prave konjektis?“
Nova kolero flamis en lia vizaĝo, kiam, ne atendante respondon, li ekkriis fortege:

„Estas, kiel mi konjektis; la sekreta ĉambro, sankta ĝis nun por mia scio sola estas senkompate malkaŝita.“

Ĉi tiu freŝa eltrovo de ofendego al reĝeco duoble indignigis lin. Ree li marŝis tien kaj reen kaj parolis rapide:

„Ho jes, certe, ni informu vian korteganinon, Madame du Hausset kaj la tutan mondon pri tiu sekreta ĉambro!“
Li mem donis ekbruligitan kandelon al tiu sinjorino kaj tiam iris rekte al la kaŝita panelo.

Iru malsupren, laŭ ĉi tiu pasejo, Madame, ĝis vi renkontas alian panelon, kiu malfermiĝas same kiel ĉi tiu. Tiam sekvu etan ŝtuparon, kiu kondukas rekte al la kaŝita ĉambro, la sankta, sekreta ĉambro de Bellevue, rezervita por la uzo de la franca reĝo en gravega ŝtata urĝeco.“

Li ridis moke je sia propra sarkasmo.

Madame Pompadour rapide metis kandelon en la manon de Destine, multe gestante al ŝi kaj Madame du Hausset, ke ili iru antaŭen senprokraste.

La korteganino estis sufiĉe bone informita pri la celo kaj la loko, kiun ŝi serĉis, ĉar per zorga aŭskultado ekster la pordo, ŝi ĵus aŭdis preskaŭ ĉion de la viveca sceno, kiu ĵus okazis en la buduaro. Sed Destine ne sciis, kial ŝi iru tra la panelita pasejo de Bellevue je tiu malfrua horo de la nokto. Kvankam ŝi ne komprenis, ŝi sekvis sen timo.

Post ilia foriro, Madame Pompadour staris apatie apogante sin kontraŭ la muro, kun brako ankoraŭ elstreĉita, kiel ĝi estis, kiam ŝi fermis la panelon. La reĝo jam residiĝis kaj kun ŝajna priokupiĝo remetis la

aŭstran miniaturon. Lia kolero estis ankoraŭ evidenta. Ĝi centriĝis nun sur la markizino, kiel ŝi bone sciis, kaj kun tiu konscio videbliĝis antaŭ ŝi vizio de la bela Madame de Coislin, instalata en ŝia loko.

Momenta kapturriĝo atakis la markizino. Tiam mal-espero ŝajnis klarigi ŝiajn pensojn. Ŝi komprenis ĉion, vidis ĉion klare kaj sciis, ke Louis neniam pardonos ŝin, vidis sin senigita de ĉio, kion ŝi ŝatis: povo, nomo, famo, amikoj, riĉaĵo, sano, pozicio kaj beleco. Ŝi vidis Madame de Coislin ĝuanta la respektigon de ĉiuj diplomatistoj de Eŭropo. Ŝi vidis la triumfon de la ĉefministro kaj la ĝojon de siaj malamikoj. La fino jam venis! Ŝiaj tagoj de gloro finiĝis! Louis neniam pardonos aŭ forgesus.

Poste ŝi komencis paroli kaj ŝiaj vortoj venis malrapide, kvazaŭ estis malfacile por ŝi elparoli. Ŝia brako falis ĉe sia flanko, kaj krom tio ŝi ne moviĝis.

„Mi komprenas nun, kiel multege mi ofendis.“ Pro la tono de ŝia voĉo Louis rigardis supren; ĝi estis tiel malsama, tiel treege stranga. Ĝi estis mallaŭta, sed tiel vibranta, ke ĉio en la ĉambro ŝajnis respondi al ĝia sono. Ĝi montris profundan sentadon tute novan kaj neatenditan. Estis seriozeco kaj sentemeco en tiuj neniam antaŭe aŭditaj tonoj, kiuj havis tratremigan efekton sur la reĝon. Ili penetris profunde en lian koron. Mirigite Louis aŭskultis. La parolmaniero de la markizino ŝajnis tute fremda. Li apenaŭ povis forpeli la impreson, ke iu alia alparolis lin, aŭ pli ĝuste, parolis al si.

„Ne venis en mian cerbon ĝis nun la ofendego al Lia Reĝa Moŝto — sed nun mi komprenas. Tio, kion mi faris estas nepardonebla.“

La korlacaj vortoj daŭriĝis kaj ĉiam sonis tiu mirinda voĉo. Louis fikse rigardis la parolantino kun pli kaj

pli multe da intereso. Ŝia aspekto ankaŭ ŝajne ŝanĝiĝis. Neniam antaŭe ŝi tiel staris; ŝia kapo iomete kliniĝis flanken, kaj ŝiaj ŝultroj iom malleviĝis. Li povis vidi la konturon de ŝia klavikolo. Neniam antaŭe li rimarkis, kiel gracila ŝi estas kaj kiel delikata. Ŝi estis pala pro la ekscito de la pasinta horo; ŝia haŭto estis tiel blanka, kiel la atlaso de ŝia robo, kies pezaj faldoj volviĝis ĉirkaŭ ŝiaj piedoj, sugestante piedestalon kaj aldonante al la statusimila efekto de ŝia pozo. Ŝi estis delikate, ravege bela.

Louis ne povis kompreni. Li apenaŭ povis rekoni en ĉi tiu gracia, malĝoja, dolĉa figuro la superegan markizinin; ĉiam brilega, reĝa kaj grandioza.

Kien foriris ŝia voĉo ordona, ŝiaj kutimaj spritaj vortoj? „Ĉio estas perdita!“ ŝi diris al si mallaŭte, ree kaj ree. „Alexandrine for — Louis for —.“

Ĉu ĉi tiu povus esti la mirinda Pompadour?

Louis ne analizis la ŝanĝon, sed fakte, tiu virino, kiun li nun vidis, estis la vera Pompadour, la malfalsa virino, malkaŝita al li la unuan fojon. Ŝi ne plu ludis rolon. Ŝi ne estis pozanta nun, ne parolanta pro efekto.

Sed la manko de peno vere aldonis al ŝi novan ĉarmon; petegan ĉarmon, kiu tratremis la reĝon strange; ĝi ja tuŝis lian koron. Ŝi ŝajnis enkorpiĝo de malesperego idealigita; ŝia animo kvazaŭ staris senvestita de ĉia hipokriteco.

Tuŝite de kompatato kaj amo en ĝia pli alta senco, Louis iris al ŝi kaj delikate prenis ŝian manon.

„Diana!“ — tiu nomo ĉiam ekstremitis ŝin — li sola iam uzis ĝin. Iliaj okuloj malrapide renkontiĝis, kiam li parolis, kaj je tiu momento vero mem rigardis de unu al la alia.

„Diana“, li ripetis, „revenu al Versailles.“

Simila al laca infano kaj apenaŭ komprenante, ŝi demandis:

„Al Versailles?“

„Jes.“

„Kiam?“

„Baldaŭ.“

Ankoraŭ ŝi demandis, kun tiu kvieta, stranga voĉo, kiu tiel tuŝis lin.

„Sed — la publiko?“

(Por kvietigi la publikan opinion, ŝi antaŭ kelkaj monatoj forlasis sian apartamenton ĉe Versailles.)

„Oni diros nenion nun“, Louis anoncis, „ĉar la reĝino konsentis al mia peto, ke vi estu instalata kiel ŝia korteganino. Por diri tion al vi, mi venis al via buduaro hodiaŭ nokte¹¹.“

Korteganino de la reĝino! Longe kaj serioze Madame Pompadour estis sopiranta al tiu pozicio. Fine ĝi estas ŝia propra. Nun ŝi povas alte teni sian kapon antaŭ siaj plej malfavoraj kritikuloj. La reĝino aprobis ŝian loĝadon en la palaco. Ofte Madame Pompadour imagis al si la senliman ĝojon, kiun ŝi sentus, se iam tia novaĵo venus al ŝi. Sed nun ŝi ricevis ĝin kviete. Ŝia malespero estis tro profunda por tuja ŝanĝo.

„Mi venos“, estis ŝia simpla respondo, sed la nebulo en ŝiaj okuloj kaj la tremanta kurbo de ŝiaj lipoj diris al la reĝo pri ŝia dankeco.

G U S T A T E M P E

Post multaj malfacilaĵoj trovante la duan panelon kaj malfermante ĝin, Destine kaj Madame du Hausset fine trovis sian vojon en la kaŝitan ĉambron de Bellevue.

Korŝira vido renkontis ilian rigardon. Kiam la flagranta lumo de la kandeloj malkaŝis tiun palegan viron kun la ŝirita ĉemizo, la distaŭzitaj haroj, la marasma vizaĝo, la duonkreska barbo kaj — plej kompatinda el ĉio — la bandaĝita kruro ankoraŭ firme ligita al la kanapo, Destine retirigis en teruro.

„Kiu li estas?“ ŝi flustris nerve.

„La grafo de Vrie“, rapide respondis Madame du Hausset, dum ŝi metis la kandelon sur la tablon.

Destine ekkaptis ŝian brakon; la junulino tremis tiel multe, ke Madame du Hausset rigardis supren surprizite.

„Ĉu vi diris la grafon de Vrie?“

Destine apenaŭ povis eldiri la vortojn; io ŝajnis fermi ŝian gorĝon.

„Oni diris, ke li estas mortinta!“ ŝi flustris.

„Mi ankaŭ aŭdis tion, sed li ne mortis, ne tute — kompatinda viro“, respondis Madame du Hausset.

Tuj ŝi komencis labori. Ŝi frotis la manojn de la senkonscia viro kaj tenis flarsalojn al liaj naztruoj, ĝis li parte malfermis la okulojn kun la maltrankvila rigardo de vaganta menso. Tiam ŝi ekbruligis fajron, ĉar

la ĉambro estis malvarmega. La malgrasega figuro sur la kanapo estis senmova kaj senkonscia.

„Mi devas venigi D-ron Quesnay“, anoncis Madame du Hausset kaj, forlasante la ĉambron, ŝi iris al la apartamento de la kuracisto en la kasteleto.

Starante tie kun la grafo de Vrie, marasma kaj senpova antaŭ ŝi, Destine fariĝis tiel blanka, kiel li; ŝiaj lipoj tremis, ŝiaj manoj malvarmiĝis, ŝia koro batis. Tiam malrapide ruĝeto de juneco kaj dankemeco enŝteligis sur ŝin; kvietita konscio de granda ĝojo. Ŝi ne moviĝis, ŝi lin observis kun la timo kaj respekto de iu, kiu vidas miraklon. Li vivas. La grafo de Vrie! Vivanta! Ŝi aŭskultis al lia spirado. Ŝiaj okuloj fikse rigardis lian vizaĝon. Malgraŭ lia vilega barbo kaj streĉitaj trajtoj, li estis ankoraŭ al ŝi la belega, ĝentila kavaliro.

Al ŝiaj preĝoj ŝi ricevis respondon. Li ree venis al si. Destine je tiu momento estus povinta fali sur la genuojn kaj kriegi hosanojn, pro tumulta ekstazo de dankemeco; sed la strangeco de la afero konsternis ŝin. Ŝi estis volvata en kirlo de memoroj — la arbarego de Bouviers, la nekonatulo, la kapelo de Sankta Cyr, Bellevue. Dum unu timiganta momento ŝi ŝajnis kapti luman ekvidon de la mistika, nevidata formiĝado de okazaĵoj; la labirinto de l' sorto malkaŝis siajn malrektajn vojojn. Ankaŭ la horo, la nokto, la kaŝita ĉambro, la soleco konfuzis ŝin, same kiel la labirinto de ŝia sonĝo.

Baldaŭ Madame du Hausset revenis kun la kuracisto D-ro Quesnay kaj lia helpanto. Ili trovis la pacienton en timiga stato de deliro kaj febro. Forsendinte la du virinojn al siaj ĉambroj, la kuracisto kaj lia helpanto prizorgis la pacienton dum la nokto.

Ili diligente laboris, tiuj du; ili ellasis sangon kaj vezikigis kaj kataplasmigis kaj bandaĝis la kompatindan de

Vrie, ĝis li fariĝis pli malforta ol antaŭe; sed ĉar ili donis al li trinkaĵon kaj nutraĵon, li vivis malgraŭ la kuracado.

La sekvintan matenon Destine kaj Madame du Hausset ricevis permeson, viziti lin kaj partopreni en la flegado.

Pasis kelke da tagoj de observado kaj necerteco, sed fine la febro cedis; tamen li estis tiel malforta, ke li povis nur rigardi lace al tiuj ĉirkaŭ li, tro senenergia por demandi, kie li estas aŭ eĉ rimarki tiujn, kiuj prizorgis lin. Sed baldaŭ iomete li refortiĝis kaj komencis aspekti kiel antaŭe.

Dum Destine forestis, li kaj Madame du Hausset interparolis, kaj kiam li sciigis pri la morto de Lemoyne, li preskaŭ ree malsaniĝis. Du Hausset ankaŭ informis lin pri la reveno de Madame Pompadour al Versailles, sed tio tute ne interesis lin. La nomo, kiu foje ĉarmis lian oreilon simile al la sonoriloj de l' paradizo, nun fariĝis tiel sensenca, kiel la tintado de sonoriletoj sur la ĉapeto de ŝercisto. La Pompadour estis nun al li, kvazaŭ ŝi neniam ekzistis; ŝi, kiu ĝis nun ŝajnis la plej elstara figuro sur la kanvaso de lia vivo, subite forvelkis. Ŝi ne plu havis lokon en lia koro, nenian lokon en lia vivo, nek eĉ niĉon en liaj pensoj. Kiam oni diris ŝian nomon, li rememoris ŝin, kompreneble, sed tute sen emocio de amo aŭ malamo.

Ĉi tiun ŝanĝon li mem ne povis kompreni, nek li povis analizi tion, kio okazis. Li ne sciis, ke karaktero iam similas la ombbron sur la filmo de fotografisto, nevidebla ĝis la „senluma kamero“ rivelas ĝin. Baptita en la acido de akra, kruela angoro, li eliĝis kiel nova estaĵo. Lia animo kvazaŭ pasis tra la krizalida stadio; en tiu tombosimila silento ĝi kreskis. Iaj travivaĵoj povas blankigi la animon dum ununura nokto.

Romain ne estis konscia pri ĉi tiu nova spirito en si. Li nur sciis, ke li aŭskultis sen emocio, kiam ajn du Hausset parolis pri la Pompadour. Sed ŝi parolis pri aliaj aferoj, kiuj tuŝis lin profunde. Krom la korŝiranta novaĵo pri la morto de Lemojne, estis alia peco de informo, kiu lasis lin profunde meditema, silente malĝoja.

Li apenaŭ parolis al Destine. Ŝi fariĝis strange timema kaj respektema, depost kiam li rigardis ŝin el konsciaj okuloj. Ŝi vidis ĉiam la nimbon de nobeleco ĉirkaŭ li, kaj ne povis venki sentadon de respekta timo; estis kvazaŭ ŝi observis ĉe altaro.

Madame du Hausset diris al li, ke Destine estas protektatino de la markizino. Konfuzis lin en la komenco, vidi ĉi tiun brunokulon knabecan vizaĝon. Ĝi vekis rememoron, kiun li ne povis loki, kaj lokon, kiun li ne povis rememori. Sed unu tagon la naĝantaj teksaĵoj de la vizio unuiĝis. Li abrupte demandis Destine:

„Ĉu vi kantas?“

„Jes“, ŝi modeste respondis. Tiam li komprenis, kial ŝia vizaĝo estas tiel familiara; la kanto en la arbar-ego revenis al li. Sed li diris nenion plu tiun tagon. Li rigardis al ŝi, li tamen observis ŝin sen ŝia scio.

Li ŝatis ŝian beletajn metodojn, meti objektojn en iliajn ĝustajn lokojn, kiam ŝi rektigis la maton sur la tablo, aranĝis la tasojn kaj botelojn en soldatecaj vicoj kaj starigis la akvobotelon, simile al komandanta generalo, precize en la mezo.

Ŝi ne restis kun li longe, horon eble, kiam Madame du Hausset dormetis. Li komencis sopiri al tiu tempo; estis ĝojo, kiam ajn la sinjorino subprem- is oscedon.

Post ŝia foriro, aŭdiĝis malpeza paŝo sur la ŝtuparo, kvieta glitado de la panelo, kaj tiam — sento de hel-eco en la ĉambro.

„*Bonjour, Monsieur*“, ŝi diris, kaj tiam — nenion plu dum eble horo, se li ne bezonis kuracilon, aŭ venis la horo por buljono. Ŝi ĉiam trovis ion, per kio ŝi povis sin okupi, ordigante la ĉambron, metante lignon sur la fajron kaj senpolvigante la kamenbreton. Dum ŝi moviĝis, li rimarkis la flekseblan svingeton de ŝia formo kaj admiris ŝian simplan, brunan, monaĥinejan kostumon, la etan blankan antaŭtukon kaj koltukon. Ŝiaj haroj de la sama nuanco, kiel ŝia robo, estis plektitaj kaj volvitaj ĉirkaŭ ŝia kapo, sed ambaŭflanke kelkaj bukloj eliĝis kaj volviĝis ĉirkaŭ ŝiaj oreloj simile al brunaj algoj, interplektantaj paron da kurbaj rozkoloraj konkoj.

Ŝia senartifikeco refreŝigis lin; ripozigis liajn okulojn, rigardi al ŝiaj nepudritaj haroj, ŝia nepudrita vizaĝo kaj, super ĉio, ŝia naiva rideto. Grade ŝi komencis simboligi por li ĉion, kio mankis en lia ĝisnuna vivo: simpleco, ĉasteco, sincereco, religio, fido, kontenteco.

Iafoje, kiam li estis dorminta, aŭ ŝi tiel opiniis, li ekrigardis supren kaj trovis ŝin apude, prizorgante lin kun meditanta, dolĉa esprimo de profundanima zorgemeco.

Iliaj okuloj renkontiĝis dum momento, tiam ŝiaj kliniĝis, turniĝis timeme for kaj ne rigardis al li denove tiun tagon.

Li ofte bezonis, ke ŝi faru ion por li, pri kio penso ne eniris lian cerbon, kiam du Hausset estis en la ĉambro: glason da akvo, alian litkovrilon aŭ malsaman angulon de la kapkuseno. Iafoje iliaj manoj hazarde tuŝiĝis; estis, kvazaŭ flamo eksaltas de unu al la alia. Tiam li turnis al la muro sian vizaĝon kaj ĝemetis. Li vidis la ruĝeton sur ŝia vango, li sentis la pulsadon de sia propra koro, sed li ne parolis; li nur ĝemetis kaj penis pensi pri aliaj aferoj — pri Lemoyne, Pierre — pri morto.

Sed la sekvinta tago trovis lin observanta denove, ĝis Madame du Hausset oscedos kaj diros, ke ŝi devas foriri.

Unufoje li petis de Destine, ke ŝi kantu; ŝi ĝoje tion faris sen vorto aŭ hezito; ŝi kantis mallaŭte, dolĉe, mediteme — la kanton, kiun ŝi kantis en la arbarego. Ĝi revivigis memorojn kaj memriproĉon; li kvazaŭ revivis ĉion, la tagon, la scenon en la arbarego, siajn pensojn je tiu tempo. Larmoj plenigis liajn okulojn. Kiam ŝi finis la kanton, li diris „dankon!“, sed nenion plu; dum ŝi, kompatinda Destine, malĝojigis, ĉar li ne rekonis la kanton.

Alian tagon Destine, tre kuraĝe, tre simple, penis re-doni al li la poŝtukon, kiun ŝi, kvazaŭ trezoron, konservis tiel longe.

Li rigardis al ĝi, aŭdis ŝian etan klarigan paroladon, tiam subite — ne prenante ĝin — li ekkaptis ambaŭ ŝiajn manojn, kun tenego kvazaŭ el fero kunpremante ilin en siaj propraj. Lia malforteco ŝajne estis for. Li rigardis dum unu longa momento rekte en ŝiajn okulojn, tiam — kvazaŭ instigita de ia doloriga penso, ia kruela neceso — li turnis for la kapon, malstreĉis siajn manojn kaj per tremanta voĉo diris: „Retenu ĝin, kiel rememorigilon de mi.“

Ĉ A P I T R O * X X

LA OMBRO DE LA BASTILLE

Dum la tagoj pasis, la malsanulo resaniĝis rapide en forto, sed ne en gajeco. Destine rimarkis la fakton kun surprizo kaj nuanco de bedaŭro.

Li ne plu penis tuŝi ŝian manon aŭ revivigi la emocion de tiu elektra momento.

Sed tago fine venis, kiam li alparolis ŝin per tonoj, kiuj estis almenaŭ malsimilaj al tiuj antaŭe uzitaj. Ŝajne li havis ion gravan por diri, tamen li parolis tre kviete.

Destine estis okupata, aranĝante florojn en la ĉambro, moviĝante tien kaj reen laŭ sia senbrua maniero; ŝia ĉeesto mem komunikis dolĉan belecon al la malhelaj ĉirkaŭaĵoj.

Li ŝin dankis por la floroj, kiujn ŝi alportis kaj aranĝis en la ĉambroj, kaj tiam diris:

„Mademoiselle, vi estas tro afabla al mi; vi igas mian foriron des pli malfacila.“

„Ĉu tio estos baldaŭ, Monsieur?“ ŝi demandis kun videbla konsterno.

„Pli baldaŭ ol mi deziras. Mi jam estas tro longe gasto de Madame de Pompadour. La reĝo nun deziras, ke mi ludu la rolon de gastiganto.“

„La reĝo — ĉu li estas amiko via?“ lia aŭskultantino demandis scivole.

Romain ridetis enigmoplene.

„Tiel bona amiko, Mademoiselle, ke li ne estus kon-

tenta aŭ feliĉa, se ne li povus havi min en mallonga distanco de si. Liaj gardsoldatoj, kiuj jam atendas min ĉe la pordegoj, donos al mi reĝan eskorton al apartamento, kiun Lia Reĝa Moŝto rezervis por mi. Sed ne pri la reĝo — aŭ mi mem — mi deziras paroli, sed pri vi, Mademoiselle. Vi estas juna kaj strange lokita ĉi tie.“

Li paŭzis dum momento, kvazaŭ mankis al li vortoj, tiam li daŭrigis: „Via ĉeesto ĉi tie treege ĝojigis kaj konsolis min dum mia malfeliĉa loĝado en Bellevue, sed mi esperas, ke vi ne ofendiĝos, Mademoiselle, se mi diras, ke ĝojigus min pli multe, se mi povus pensi pri vi kiel ankoraŭ ĉe Sankta Cyr. Vi estas en tiel netaŭga loko por vi ĉi tie, kiel alaŭdo en nesto de akcipitro.“

Liaj tonoj estis profundaj pro seriozeco kaj forta subfluo de sentado, kiun li penis kaŝi antaŭ ŝi. Ŝi ne devus scii, kiel profunde ŝi emociigis lin. Lia vivo ne plu estis parto de la mondo, li ankaŭ devos forigi sin de ŝia memoro. Ĉi tiu ŝajnis al li deviga afero. La tasko estis severa provo, sed li kuraĝe atakis ĝin.

„En postaj jaroj vi povos kompreni la signifon de miaj vortoj. Mi estas interesata pri vi, same kiel viro povas esti pri infano — ĉar vi estas ne multe pli ol tio.“

Kruela parolado, kaj li sciis, ke ĝi estis kruela, aŭ pli malbona. La peno eldiri ĝin, preskaŭ ĉesigis la pulsadon de lia koro, kaj nun, kiam li vidis la esprimon de doloro, kiu rampis en ŝiajn belegajn okulojn, li mordis la lipojn, por kaŝi antaŭ ŝi la batalon de siaj emocioj.

Dum tempospaco li restis silenta; ŝi preskaŭ opiniis, ke li ne intencis paroli denove. Tiuj estis streĉitaj momentoj; dum lia vizaĝo estis blanka pro emocio, liaj okuloj entrinkis la belecon de ŝiaj trajtoj, kvazaŭ por estingi senfinan soifon.

Subite li parolis per tremantaj, rapidaj tonoj; ĉiu vorto estis sufokanta ekkrio:

„Reiru al Sankta Cyr! Forgesu min! Lasu min fali el via vivado! Neniam pensu pri mi! Detruu la poŝtukon, kiun vi havas! Ne — eĉ ne preĝu por mi! Iru — forgesu min!“

Kun larme malsekaj okuloj, Destine forrapidegis el la ĉambro. La dika, panelita pordo fermiĝis post ŝi, se ĝi ne estus fermiĝinta, ŝi estus povinta aŭdi la pezajn plorĝemojn de forta viro, sola kun malĝojo.

Li amis ŝin; lia tuta korpo tordiĝis pro la sopiro, diri al ŝi la amon, kiu plenigis lian koron. Kiom malpli maldolĉaj estus la krudaj randoj de la venontaj tagoj pro la penso, ke ŝi komprenas pri lia amo, ke ŝi vidos lin en ŝiaj songoj. Sed ĉio tio ĉi ne estis por li. Li ne havis rajton, velkigi ŝian junan vivon per pensoj de senespera amo.

Stranga aliformiĝo — ĉi tiu — en junulo, kiu ĉiam opiniis, ke li havas rajton, proponi kison tiel facile, kiel li levus ventumilon de sinjorino. Se Romain estus pensanta pri la afero, li apenaŭ rekonus sin.

Sed liaj pensoj estis nur pri ŝi, la lumo en ŝiaj okuloj, la travibro en la sono de ŝia voĉo, la ĝojo, la heleco, tio, kio brilis en ŝia vizaĝo, ĉasteco, preĝo, esperpleneco; li ne povis difini aŭ analizi ĝin, sed li sciis, ke ĝi devigis lin ami ŝin — ami ŝin tiel fervore, ke pro ŝi li, rigardante en ŝiajn okulojn, eĉ neis sian amon.

Kuregante al sia ĉambro, kie larmoj kaj kordoloro estis permesataj, Destine renkontis Madame du Hausset.

„Estas malkonvene por korteganino, esti tro rapidema“, la Madame admonis afable. „Kortega etiketo malpermesas rapidon. Sed kial vi ploras?“ ŝi aldonis, vidante larmon kaŝe forviŝatan.

Destine, ĉiam tute verema, konfesis, ke ŝi estas malĝoja, ĉar la grafo de Vrie devos baldaŭ forlasi ilin.

„Li diris, ke la reĝo sendis pro li, kaj oni atendas, ĝis li sufiĉe resaniĝas.“

Je la surprizo de Destine, Madame du Hausset mem estis preskaŭ ploranta.

„Kompatinda viro! Do, li informis vin. Mi ne intencis, sciigi vin. Sed estas nur tro vere; la gardsoldatoj de la reĝo ĉirkaŭas la tutan palacon; estas nenia ŝanco por forkuro. Kompatinda viro! Estas terure. Li suferos multe — tion mi scias — en la Bastille.“

Destine spasme spiris.

„La Bastille! Madame, kion vi diras?“

Madame du Hausset surprizite rigardis al ŝi.

„Mi supozis, ke li klarigis la tutan aferon al vi!“

„Ne pri la Bastille!“ Destine ektremis kaj dum momento kovris al si la vizaĝon per la manoj. „Li diris al mi, ke la reĝo preparis apartamenton por li — ĉu li intencis la Bastille? Patrino de Dio! — — la Bastille!“

En la menso de Destine nenia vorto estis tiel timiga, kiel la „Bastille“. Ŝia propra avo mortis interne de ĝiaj malgajaj muroj, kaj ŝia tuta infaneco estis terurita per la rakontoj, kiujn ŝia patro rakontis al ŝi pri la sufero en tiu fortikaĵo, pri la malrapida morto, kiun ĝi havis por ĉiuj malliberuloj. Ŝi estis tro profunde emociita por plori. Kun sekokula teruro ŝi penis regi siajn pensojn, dum Madame du Hausset donis pluajn sciigojn.

„Jes — jes, li havas nur kvar tagojn, antaŭ ol li devos iri al la Bastille. La reĝo treege ofendiĝis pro li.“

„Kion li faris? Kial estas la reĝo tiel kolerega kontraŭ li? Ĉu vi scias la kialon?“

Madame du Hausset diris la solan vorton „jes“, senripense.

„Do bonvolu diri al mi — mi petegas vin, Madame, ree mi petegas, ke vi diru al mi, kion li faris.“

La petego de Destine estis serioza.

„Sed mi timas, Mademoiselle; tio eble estas ŝtata sekreto.“

„Ho — ĉu perfido estis la kialo?“

„Ne, ne — ne tio! Sed vi nepre devas ne demandi min, karulino mia. Venu kun mi en la buduaron! Vi paliĝas. Mi timas, ke vi svenos.“

Madame du Hausset kondukis ŝin en la buduaron.

„Ho Madame, vi ne intencas: — ke li estas mortiganto!“

„Ne, ne, kompreneble ne! Jen, ripozu sur ĉi tiu divano.“

Destine obeis, sed ŝi estis tute senkonscia pro la persisto de siaj demandoj.

„Ĉu li mem diris al vi, kion li faris?“

„Ho, karulino, ne“, respondis du Hausset. „Mi hazarde aŭdis lin, kiam li eldiris sian decidon al la markizino. Mi sidis en la eta kamero malantaŭ la alkovo.“

Ĉi tiu kamero estis plej ŝatata vizitejo de Madame du Hausset, kiam ajn Pompadour akceptis gravajn gastojn. Neniaj skrupuloj maltrankviligis tiun aŭskultantinon; ŝi rigardis la agon, kiel privilegion, kiu apartenis al ŝia pozicio¹². Sed Destine malatentis la etikon de ŝia opinio pri la konveneco de tiu afero kaj, avida aŭdi pluajn sciigojn, ŝi klinis antaŭen kaj rapide demandis:

„Ĉu tio okazis antaŭ mia alveno en la kasteleto?“

„Ne! li vizitis la markizinin je la sama tago de via alveno.“

„Sed la markizino jam diris al mi, ke li estas mortinta!“

Madame du Hausset ne estis singarda en sia respondo.

„Nu, vi vidas, ĉiu tiel opiniis, eĉ la reĝo mem; li estas furioza nun, ĉar oni trompis lin.“

Dirinte tion, la parolantino malseverigis kaj, responde al plua petego de la junulino, rakontis la tutan rakonton precize, kiel ŝi aŭdis ĝin.

„Kaj pro tio li nepre devas iri al la Bastille! Ho ve, Madame, kia terura sorto!“

Destine tremis, dum ŝi parolis, sed aldiris maltrankvile: „Ĉu ni ne povos fari ion, por lin savi? Ni iru al la markizino; eble ŝi povos helpi lin.“

Madame du Hausset tuj respondis: „Mia kara infano, Madame Pompadour jam spitis la reĝon ĝis la limo, donante ŝirmadon al la grafo en la unua okazo.“

„Ni penu, ĉiuokaze. Eble ŝi povos elpensi ian rimedon. Mi iru al ŝi.“

„Tio estas neebla. Mi ne arogus al mi, aŭ sendi vin, aŭ iri mem al la reĝa palaco, ne vokite tien, kaj plue tia ago estos vana, ĉar ĉiu scias, ke kiam Louis de Francujo diras ‚al la Bastille‘, al la Bastille oni iras.“

Estis momento de silento. Destine fariĝis meditema, sed ŝi diris nenion plu. Madame du Hausset poste stariĝis kaj konsilis al Destine, ke ŝi dormetu.

„Penu forgesi la malfeliĉaĵojn de la juna grafo. Tiaj tragedioj ofte okazas ĉe kortego; vi havos koron sangantan ĉiun tagon en la jaro, se vi kompatas tiajn katastrofojn tro profunde.“

Madame du Hausset forlasis la buduaron kaj Destine iris al sia ĉambro.

Stranga decido brilis sur ŝia vizaĝo. Ŝiaj pensoj fariĝis klaraj kiel la tago. Streĉita esprimo aperis ĉirkaŭ ŝia buŝo. Por la unua fojo ribelo ekfloris en ŝia koro. Ŝi nepre agos, kiel ŝi opinias plej bone, kaj tio sen prokrasto, sen rigardo al Madame du Hausset aŭ iu ajn kortegano.

La plej mildaj naturoj iam montras, sub urĝeco, de-

cidon de karaktero, kiu estas miriga ĉe ili. Tio okazis al Destine. Ŝia spirito estis ĉiam fleksebla per la granda senpersona volo, kiu ĉirkaŭas nin, kaj ŝi estis laŭnature cedema al la fortoj, kiuj formis ŝian vivon. Ŝi posedis la veran spiriton de pasiveco, kiu grade kolektas al si senkonscian baterion de povo, atendante krizan momenton por malkaŝi sian amasigitan energion. Kaj nun, laŭ sia naturo, ŝi cedis sin al la forto, kiu subite posedis ŝin kaj instigis ŝin al agemeco. Ŝi estis kvazaŭ elportita el si pro la konscieco de la danĝero minacanta al la grafo de Vrie.

Ŝi ne haltis por konsideri pri eblecoj aŭ baroj. Sen ia ajn volado pri unu aŭ alia rimedo, ŝi simple moviĝis al sia celo. La ventoj de aŭtuno neniam antaŭenpelis folion pli rapide, ol la instiga povo de ŝia amo kaj kompato nun antaŭenpelis Destine.

Reveninte en sian ĉambron, Destine komencis per nervozaj fingroj aranĝi zorgan tualeton. Ŝi denove surmetis la entrezoritan blankan komunian robon kaj super tiun ŝi ĵetis longan, bluan kapoton.

Ŝi estis malfermonta la pordon por eliri, kiam, subite turniĝanta, ŝi surgenuiĝis kaj, kun intermiksitaj larmoj kaj preĝoj, petegis la benitan virgulinon, ke ŝi savu la grafon de Vrie de la Bastille? — preĝo ne nova al la Patrino de Malĝojoj.

Ĉ A P I T R O * X X I

KONFESO EN ARBARO

Dolĉa, brava vizaĝo rigardis el sub kapoto iomete poste, kiam unu el la ĝendarmoj ĉe la pordego de Bellevue ekkriis:

„Kiu iras tie?“

„Ĉambristino de la markizino“, estis la tuja respondo.

Kiam la ĝendarmo permesis al ŝi trapasi, ŝi ekiris antaŭen, sed subite haltis, turniĝis kaj demandis:

„Bonvolu afable direkti min, kiel mi iru al Versailles?“

„Rekte antaŭen, Mademoiselle, laŭ la vojo tra la arbaro.“

Destine rapidegis laŭ sia vojo, sed ŝiaj pensoj estis pli rapidaj ol ŝiaj piedoj. La demando de la ĝendarmo montris al ŝi, kiel zorge oni gardis Bellevue. Ĉi tio ŝin komprenigis tute detale la kulminacion de kolerego de Louis kontraŭ la grafo.

„Al la Bastille! Al la Bastille!“

Destine sentis ĉiun korpulsadon martelanta tiujn vortojn. Ŝiaj oreloj ŝajnis sonori kun tiuj teruregaj sonoj.

Dum temospaco ŝi daŭrigis laŭ sia vojo, sed fine pro rapida marŝado, mankis al ŝi forto kaj kuraĝo; ŝi ne povis iri plu. Aŭdebla krio eliĝis el ŝiaj lipoj, dum ŝi fale sidiĝis sur la trunkon de falinta arbo laŭ vojflanko, cedante al tumulta paroksismo de plorado. Ŝiaj larmoj ŝprucis la muskokovritan trunkon kaj ŝiaj plorĝemoj rompis la silenton de l' vintro. La falintaj folioj kaj la glacitenita tero kvazaŭ simboligis la glaciigitan

esperon en ŝia koro. Volvante sian kapoton ĉirkaŭ ŝi, ŝi enigis sian vizaĝon en ĝiajn faldojn, kvazaŭ por eviti la ŝarĝon de vintra malĝojo, interne kaj ekstere.

Ŝi estis renkontinta nenian vivantan kreitaĵon dum sia marŝado, ĉar oni ne multe uzis la vojon al Bellevue, kiam ĝia mastrino estis for. Kie Destine sidis plorante, nur susurantaj folioj kaj la svingado de nudaj branĉoj rompis la silenton.

Subite mano estis metata sur ŝian ŝultron, kaj afabla voĉo alparolis ŝin:

„Mia infano, kia malĝojo estas sur vi?“

Destine rigardis supren tra siaj longaj pezaj okulharoj kaj tiam en muta malespero kaptis la bonkoran manon etenditan al ŝi, grandan, blankan manon, belforman kaj bone prizorgitan, kun masiva ringo sur ĝi.

En tiu unu ekrigardo supren Destine rekonis pastron vestitan per la kruda, nigra vestaĵo de la Societo de la Jezuitoj. Ŝi ne jam entrinkis iom de la malamikeco kontraŭ la societo, kiun Madame Pompadour kaj ŝiaj sekvantoj tiel fervore dissemadis; ŝi sciis nur pri la bonfarado de la jezuitoj, iliaj eminentaj instruistoj, ilia sinoferada pieco kaj iliaj mildaj servadoj.

Li havis iom dikan figuron kun dignoplena sintenado — ĉi tiu nekonata arbaramiko kun vizaĝo, kies esprimo de bonvolo kaj seriozeco ŝajne kutimis kaŝi sin malantaŭ masko de rezervemo. Liaj okuloj, afablaj, pensemaj, observemaj, ripozis milde sur la ploranta junulino, kiam li demandis kun serioza zorgemo:

„Ĉu la vivo estas por vi tiel plena de malfeliĉeco, mia infano?“

Unue ŝi ne povis paroli, sed apogis sian varmegan vizaĝon al lia mano, ĝis ŝiaj plorĝemoj fariĝis malpli fortegaj. Inter spiroj ŝi ripetis intermite:

„Li estas ironta al la Bastille! — Li estas ironta al al la Bastille!“

„Kiu estas ironta al la Bastille?“

Aŭdiĝis milda noto de aŭtoritato en la voĉo de la parolanto, agrabla sono de povo sub la bonkora voĉmodulado.

Destine petege rigardis supren kaj trovis tiom da kompatato en la esprimo de la nobla vizaĝo, ke ŝi pleniĝis per fido.

„Ho Patro“, ŝi impulse petis, „eble vi povas lin helpi! Eble vi povas diri al mi, kiel mi povas savi lin. Mi marŝus la tutan vojon ĝis la Sankta Tombo de Nia Sinjoro! Mi preĝus dum kvardek jaroj, kantus „Ave“ tage kaj nokte senĉese ĝis mia morto, se mi povus fari ion — ion por savi lin“.

Ŝi banis liajn manojn per siaj larmoj kaj kunpremis la siajn petegante.

„Jes, jes. Mi diros al vi lian nomon — diros al vi ĉion, ŝi aldiris rapide, rimarkante la demandon ankoraŭ sur lia vizaĝo. Sed ŝi hezitis dum momento, rigardante ĉirkaŭen kun maltrankvila ekrigardo, kvazaŭ timante, ke la arboj mem aŭdas, aŭ ke ŝi agis malprave, ekkriante sian malĝojon.

„Ĉiuj konfesoj estas ĉiam sanktaj al la eklezio“, la pastro certigis al ŝi. „Diru al mi vian rakonton kaj ne timu.“

Liaj vortoj donis al ŝi kuraĝon, plifaciligis la pezon sur ŝia koro, fidi al ĉi tiu seriozvoĉa, amika monaĥo, kiu sidigis sin flanke de ŝi, dum ŝi rakontis al li ĉion pri la estinta sufero kaj estanta danĝero de la grafo de Vrie. Je tiu nomo la monaĥo montris miregon.

„Vi certe ne intencas la Reĝan Enkondukanton de Ambasadoroj, Romain de Vrie, kiu subite mortis antaŭ kelkaj semajnoj?“

Al pluaj sciigoj li aŭskultis atente kaj granda estis lia intereso pri la detaloj de ŝia rakonto. Li ŝajnis bone informita pri kortegaj aferoj kaj komprenis, pli bone ol Destine povis klarigi al li, la plenecon de la granda kolerego de Louis kaj la verŝajnan punon de Romain. Li skuis la kapon malgaje.

„La reĝo, mi timas, estos necedema. Kompatinda infano! Mi volus, ke mi havus la povon pacigi vian malĝojon. Se mi estus reĝo, viaj larmoj tuj sekigus, mi certigas al vi. Mi subskribus la pardonon de l' grafo de Vrie — kaj de multaj aliaj — eĉ se mi devus uzi mian glavon kiel plumon kaj mian sangon kiel inkon.“

Nuanco de maldolĉeco estis aŭdebla en la voĉo de la pastro dum tiuj vortoj.

Destine suprenrigardis al li scivole, sopire, sentis konsolon pro la subita mildeco, kiu sonis en lia sekvinta diraĵo.

„Sed mi ne deziras malkuraĝigi vin. Vizitu la markizino Madama Pompadour, se eble, kvankam mi dubas, ĉu ŝia influo sur la reĝon pri ĉi tiu afero pezos pli ol via propra — eble ne tiom. Sed peno — nepre peno — mi ne povas doni al vi pli bonan konsilon.“

Li leviĝis, dum li parolis. Ŝi preparis daŭrigi sian vojon, volvis la kapoton pli firme ĉirkaŭ si kaj tiam dankis lin pro liaj afablaj vortoj.

„Nur donu al mi vian benon, bona Patro, kaj mi iros laŭ mia vojo pli kuraĝe.“

Ŝi surgenuiĝis antaŭ li, dum super ŝia klinita kapo li silente etendis sian manon. La proksiman momenton li diris „adiaŭ“ kaj turniĝis, por daŭrigi sian vojon.

„Per kia nomo mi povos pensi pri vi?“ Destine subite rememoris demandi.

„Mia nomo estas Patro Bona Espero“, li kviete respondis, kaj tiam ili disiĝis.

Ĉ A M B R O S E N D I O

Post alia horo de vigla marŝado Destine atingis Versailles. Sento de sendanĝereco venis al ŝi, dum ŝi iris laŭ la mallarĝaj, ŝtonetaĵaj stratoj, kun malaltaj domoj el ŝtono, humilaj butikoj kaj seriozaj laborantoj, vestitaj per ĉiutaga vestaĵo. Estis io konsolanta en la simpla honesteco sur la vizaĝoj de tiuj kamparanoj.

Pri sia vojo ŝi demandis nudkapan, larĝŝultran virinon, kiu, jungita kun hundo, estis tiranta malgrandan ĉaron, ŝarĝitan de lignetoj, kaj pleniganta la aeron per fortegaj krioj: „Lignetoj por vendi! Lignetoj por vendi!“ La vendistino de ligno viŝis sian frunton per grandega poŝtuko kaj tiam, ridetante afable, donis la informon en kampara dialekto.

Ĉe angulo, en malfermita pordejo, vendistino de frititaj terpomoj prizorgis varmegan paton sur karbforno. Ĉi tie Destine denove demandis. La virino tuj paŝis eksteren kaj, montrante per sia longa kulerego, klarigis tre detale la plej mallongan vojon, aldonante, por rekuraĝigi la lacan junulinon: „La vojo ne estas longa, vi estos tie en ne pli ol kvar minutoj.“

Destine iris pli malrapide, dum ŝi alproksimiĝis al la fino de sia vojaĝo. Ŝi timis renkonti la reĝajn gvardianojn; la agrablaj, trankvilaj vilaĝanoj estis tiom pli alireblaj.

Alvenante ĉe la per muroj ĉirkaŭigita korto, ŝi timde demandis la gardostaranton, kiu staris ĉe la plej antaŭa

pordego. Li montris al flanka enirejo, tra kiu ŝi povis eniri. Ĉi tie alia gardostaranto fikse rigardis ŝin, malkredema, sed admiranta. Li konis nenian ĉambristinon de ŝia nomo, sed permesis al ŝi enpasi, kaj direktis ŝin laŭ la plej rekta vojo al la apartamento de Madame Pompadour.

Venkinte trian timigan pordiston, Destine sin trovis en la granda palaco de Versailles.

Tie ŝi renkontis la belegajn korpogardistojn en ilia reĝa vestaro el ruĝa veluro kun bluaj subŝtofoj kaj oraj garnajoj. Grupoj da sinjoroj kaj multaj paĝioj senokupe vagis tra la vestibloj.

Destine, duone firmintenca, duone hezitanta, alparolis la plej proksiman paĝion, dirante, ke ŝi venis de Bellevue kaj deziras vidi la markizinin Madame de Pompadour pro grava afero.

Unu el la sinjoroj, kiu staris proksime, aŭdante ŝian peton, venis al ŝi, klinante la kapon kaj ridetante tiamaniere, ke Destine maltrankviliĝis. Sed ŝi baldaŭ forgesis sian embarason pro la sento de malespero, kiu venis al ŝi, kiam ŝi aŭdis la vortojn de la sinjoro:

„Madame de Pompadour forlasis la palacon antaŭ unu horo. Mi ne scias, kiam ŝi revenos. Eble ŝi pasigos la nokton en Croisy.“

Naŭziga sento de la vaneco de ŝia komisio dum momento mutigis la langon de Destine. Ŝi vidis nenion antaŭ si, ol senespere reiri laŭ la teda vojo ĝis Bellevue. Subite ŝi rememoris iujn vortojn de la pastro kaj decidis, fari alian penon. Efektive ŝi estis tiel timigita, kiel spireganta cervo, sed la penso pri la Bastille donis al ŝi forton, por paroli kuraĝe kaj demandi:

„Ĉu la reĝo estas en la palaco? Ĉu mi povos vidi lin?“
La sinjoroj, kiuj aŭdis ŝiajn demandojn, tuj interŝanĝis

strangajn rigardojn. Unu aŭ du el ili ridis mallaŭte. Li, kiu antaŭe parolis al ŝi, klinis la kapon denove kaj respondis mezavoĉe:

„Se vi deziras vidi la reĝon, sekvu min, Mademoiselle, kaj mi kondukos vin al lia apartamento tuj.“

Liaj mallarĝaj okuloj serĉe rigardis ŝin, lia parolmaniero kaj lia sintenado estis tiel malagrablaj kaj eĉ suspektaj, ke Destine sentis fortan deziron, reiri al Bellevue. Sed la ebleco, vidi la reĝon kaj peti al li, estis tro grava por perdi; la pastro estis dirinta, ke ŝiaj vortoj eble povus elfari tiom pri ĉi tiu afero, kiom peto de la Pompadour.

„Ĉu mi povos efektive vidi la reĝon kaj paroli kun li?“ ŝi demandis nekredeme kaj miris, pro kio la sinjoroj ridetis. Unu el ili diris:

„Estas nenia dubo pri tio, se vi sekvos Lebel! Li estas la konfidenca servisto de la reĝo kaj kondukos vin al Lia Reĝa Moŝto tiel rekte, kiel birdo povas flugi.“

Ili ĉiuj ridis, kaj alia voĉo aldonis:

„Nepre sekvu Monsieur Lebel, Mademoiselle, se vi deziras vidi la reĝon.“

Monsieur Lebel dume tute ne ridetis, sed faris geston, ke ŝi venu kun li. Destine estis tiel ĝoja, forirante de la malagrablaj sinjoroj en la vestiblo, ke ŝi sekvis lin sen plua demando.

Li ŝin kondukis preter la granda Ŝtuparo de Ambasadoroj, kies grandiozaj oraj kaj marmoraj kurboj konsternis eĉ Destine, kvankam ŝi jam kutimiĝis al pompo en Bellevue. Laŭ la tuta galerio, tra kiu Lebel kondukis ŝin, staris soldatoj kaj oficiroj de la krono en plena parada uniformo, ĉiam en rigida pozo. Vendistoj de floroj, de tindruoj kaj skribilaroj pasis ilin, ĉiuj proponante komercaĵojn al la preterpasantoj. Unu malĝentila gasto, kiu malgraŭ la gvardianoj kaj seruroj trovis liberan eniron, fajfis laŭvole

ĉirkaŭ anguloj de kolonoj kaj skulptitaj fenestroj, tiu estis la vintra vento, kiu nur ridis je grandiozeco kaj pompo¹³.

Baldaŭ Lebel sin turnis en mallarĝan pasejon, malhele lumigitan. Li tuŝis la brakon de Destine, dum li kondukis ŝin. Lia tro afabla maniero kaj subkompreniga voĉo maltrankviligis ŝin, ŝi ne sciis kial. Li malfermis pordon, avertis ŝin pri ŝtupo kaj tiam enkondukis ŝin en grandan apartamenton.

„Ĉi tiu estas la privata ĉambro de Lia Reĝa Moŝto, Mademoiselle. Restu trankvile ĉi tie, ĝis li venos.“

La ĉambro estis vakanta. Destine unue ĉefe interesigis, observante Lebel, kiu sen vorto eklumigis lampon el skulptita onikso, pendantan de bronza subtenilo sur la muro. Li tiam tiris trans la fenestrojn pezajn damaskajn kurtenojn, pale verdajn kaj orajn.

Destine opiniis, ke estas tro frue por la eklumigo de lampoj, sed supozis, ke estas iu regulo, kiu postulas, ke la palaco estu lumigata je la kvara horo.

Lebel petis, ke ŝi sidiĝu, kaj li movis antaŭen malaltan divanon.

„Ĉu vi estas certa, ke Lia Reĝa Moŝto ne ofendiĝos, se mi atendas lin ĉi tie?“ ŝi kuraĝis demandi.

„Ne timu, Mademoiselle, Lia Reĝa Moŝto havas saman korinklinon kiel vi¹⁴.“

Li paŝis tien kaj ĉi tien proksime de ŝi kaj okulaĉis ŝin, ridetante laŭ maniero, kiu tre maltrankviligis ŝin.

„Vi trovos lin tre afabla“, li daŭrigis, „tre! Mi nun informos lin, ke vi ĉeestas. Ĝis revido, Mademoiselle. Neniu ĝenos vin ĉi tie. Ĝis revido!“

Lasate sola, Destine pripensis sian peton al la reĝo. Ŝi tremetis je la nura penso mem pri la intervjuo kun la reĝo, sed tremegis je la penso pri la sorto, kiu atendis Romain de Vrie, se ŝi malsukcesus, tuŝi la koron de la

reĝo. Ŝi penis, ŝarĝi sian menson de iuj vortoj kaj frazoj, ripetante la formon de sia petego multfoje.

Fine, lacigite pro atendo, ŝi penis distri sin, rigardante sian ĉirkaŭaĵon. Kiel mirinde, esti en la palaco de la reĝo, en lia privata ĉambro! Kia kontrasto inter ĉi tiu luksa apartamento kun ĝia altarkaja plafono, ĝiaj orfreskoj kaj ĝiaj atlasaj muroj, kaj la simplaj, kalkitaj muroj de Sankta Cyr! Ŝi imagis la konsternon de Fratino Thérèse, se ŝi povus vidi tian luksegon. Iel ŝi volis, ke tiu mildvizaĝa monaĥino povus esti kun ŝi je tiu momento. Neniam antaŭe ŝi sentis sin tiel tute sola, kaj stranga sento de senigeco venis super ŝin. Ŝi devigis sian menson, esplori detale ĉiun objekton en la ĉambro. Ŝi primeditis la diversajn pentraĵojn sur la muroj kaj la konservitan kapon de apro, novan ĉastrofeon de la reĝo. Ŝi penis sekvi la malrapide moviĝantajn montrilojn de la granda porcelana horloĝo, zorge ŝi rigardis la liton de la reĝo, starantan en la alkovo, subtenatan sur estrado de kvar oraj ungegoj de leono, tiam ŝi rigardis la divanon, sur kiu ŝi estis sidanta kaj ĝian orŝtofan kovrilon. Ĝi estis desegnita de Watteau.

Certe la reĝo nepre venos baldaŭ, ŝi pensis, sed ankoraŭ neniam sono atingis ŝin. Pli kaj pli timiga fariĝis la sennoma antaŭtimo, rampanta en ŝian animon. La ĉambro estis subprema pro stranga kaj subtila influo, kiun ŝi ne povis kompreni. Ŝi fermis la okulojn, dum momento penante venki sian senbridan imagon; sed malgraŭ ĉio, kion ŝi povis fari, malbonaj formoj kaj malagrablaj voĉoj ŝajnis ŝvebi ĉirkaŭ ŝi en stranga fantazio. Malbonega povo ŝajnis posedi kaj sufoki ŝin; kaj vane ŝi penis sin regi.

Ŝi ekrigardis al malfermita libro, kiu kuŝis sur la tablo apud ŝi, sed ŝi ekvidis surprizegan kaj malkonvenan bildon,

kiu bone plaĉus la reĝon Louis, sed multe ofendis senteman Destine. Ŝi kovris sian vizaĝon per la manoj kaj penis preĝi, sed mankis al ŝi vortoj. Neniam antaŭe ŝi ne povis preĝi. Kia povus esti la signifo? Subite venis al ŝi la penso, ke en ĉi tiu ĉambro Dio ne restadas!

Teruro tia, kian sentas infano, kiam ĝi estas en mallumo, ekkaptis ŝin. Ekprenante sian kapoton, ŝi ĵetis ĝin super siaj ŝultroj kaj ekiris antaŭen kun la intenco, foriri de la palaco. Sed je tiu momento la grandaj pordoj subite malfermiĝis, kaj ŝi vidis antaŭ si — la reĝon!

Instigite de blinda instinkto de timo, Destine retiriĝis, ĝis ŝi trovis sin en la alkovo de fenestro, kie la kurtenoj facile kaŝis ŝin. Ŝi ekkaptis ilin, por subteni sin, tremante pro timo, kaj tiam vidis, ke la reĝo ne estas sola. Nombro da viroj estis kun li, helpante lin, dum li paŝis antaŭen, kun la mano ĉe sia koro kaj sango sur sia velura vesto.

„Sinjoroj, mi estas vundita“, li ripetis kelkajn fojojn.

Paŝoj sonoritis en la koridoro, la sono de voĉoj aŭdiĝis en la ĉambro, ekkrioj kaj demandoj plenigis la aeron en la palaco kaj ekster ĝi. Kriegoj de ekscito levigis de la korto, homoj kuris, homamasoj pligrandiĝis. Kriegoj ŝiris la aeron: „Mortigu la mortiganton!“ „La reĝo estas mortinta!“ „Oni minacas la kronprincon!“ „Perfido!“ „Mortigo!“ „Gardu la pordegojn, pro la nomo de Francujo!“¹⁵

En la litĉambro la konfuzo estis intensa.

„Atentu la kronprincon“, diris la reĝo, kiam oni kuŝigis lin sur la liton, svenantan kun vizaĝo paliĝanta.

Aŭdiĝis nun la voĉoj de virinoj. Korteganoj faris spacon kun granda respekto, la reĝino venis — kompatinda, malbela, pia Marie Lyscinska, kiun la reĝo malatentis sana, sed al kiu li sin turnis malsana.

Rekonsciiĝante, kiam ŝi alproksimiĝis, li etendis la

manon. Ŝi premis liajn fingrojn al siaj lipoj, surgenuante ĉe lia litflanko. Ĥirurgo klinis sin super li, fortranĉante la punkton kaj rubandojn, kiuj kovris la vundon.

Tiel okupata estis ĉiu en la ĉambro, ke Destine, tute ne vidita, sukcese atingis etan pordon proksime. Ŝi estis tro agitita, por zorgi pri singardo, sed la intereso estis tiel centrigita sur la vunditan reĝon, ke neniu aŭdis la sonon de la pordo, kiam ĝi fermiĝis malantaŭ ŝi.

Ĉ A P I T R O * X X I I I

KONFLIKTO DE INTERESOJ ĈE LA PORDO DE L' MORTO

Destine sin trovis ĉe la enirejo al malgranda ŝtuparo, ne sciante, kien ĝi eble kondukus ŝin. Sen povo elekti, ŝi malsupreniris, faletante kelkfoje pro terurita rapido, ĉar la ŝtuparo estis tiel malluma, ke ŝi devis palpi sian vojon.

Ĉe la malsupro de la ŝtuparo ŝi trovis pordon. Ĵus kiam ŝi estis malfermonta ĝin, ŝi aŭdis la sonon de voĉoj ĉe la kontraŭa flanko, kaj mankis al ŝi kuraĝo. Ŝi sidigis sur unu el la ŝtupoj, tute sen povo renkonti alian grupon da nekonatuloj, kiuj eble rigardus kaj grimacus kaj demandus.

Nun ŝi volis, ke ŝi estus atentinta la konsilon de Madame du Hausset. „Versailles estas nenia loko por viziti sen invito!“ Kiel malsaĝa ŝi estis, supozante, ke ŝi povus influi reĝon, ŝanĝi lian decidon! Kaj tamen, eĉ nun, ŝi ne povis imagi al si, ke ŝi vidos la grafon de Vrie fortrenata al la Bastille sen ia peno ŝiaparte, kiel ajn vana, por savi lin. Ne, ŝi neniam estus povinta resti trankvila en Bellevue, farante nenion. Sed se ŝi estus peninta ion alian! se ŝi nur ne estus ĉi tie nun! se nur Madame Pompadour estus estanta ĉeĥejme!

Ĉi tiuj pensoj sin entrudis en ŝian menson pri la reĝo kun sangaj makuloj sur lia vesto. Eble li mortas! Iu mortigis lin! Mortiganto estas en la palaco! Eble

li estas kaŝanta sin same kiel ŝi; eble li estas ie sur la sama malluma ŝtuparo, proksime de la ŝtupo, kie ŝi sidas!

La teruro de tiu penso subite kvietiĝis pro gaja sono, kiu atingis ŝin de la kontraŭa flanko de la pordo. Estis la voĉo de Madame Pompadour. Povis esti nenia eraro pri la sono de tiu voĉo. Ŝajnis, kvazaŭ ŝi ĵus revenis kaj estas tre ekscitita. Aliaj, ankaŭ, estis parolantaj histerie. La aero estis plena de vekriado kaj ekkrioj:

„Dio mia!“ „La reĝo!“ „Mortigita!“

Destine ne plu atendis, sed frapis konfideme sur la eta pordo. La markizino mem malfermis ĝin. Ŝi konsterniĝis je la vido de Destine en tiu loko je tiu horo, ĉar Destine tute hazarde estis eniranta la buduaron de Madame Pompadour per privata ŝtuparo speciale konstruita por la uzo de la reĝo sola¹⁶.

Mortiga silento plenigis la buduaron, dum la markizino reakiris sian spiron. Tiam ŝi ekkriis, kiam Destine eniris:

„Pro la nomo de l' ĉielo, de kie vi venas? Diru al mi, tuj! — Ĉu vi ne povas paroli?“

La ĝenerala mirego kaj severeco de Madame Pompadour preskaŭ paralizis Destine, sed ŝi nur povis diri per tremanta voĉo:

„Mi estis en la ĉambro de la reĝo.“

Je ĉiu alia fojo tia konfeso estus instiginta la plej profundan koleron de Madame Pompadour, sed la atenco al la reĝo jam tiel ŝanĝis ĉion, ke Destine dum momento estis altigita al la pozicio de heroino. Granda estis ŝia mirego pro la ŝanĝo, kiu venis sur Madame Pompadour, kiu nun demandis avide:

„Ĉu vi vidis la reĝon, kiam oni enportis lin?“

„Jes, Madame.“

„Dio mia! Dio mia! ĉu li jam estis senviva?“

„Ho ne, Madame, li estis parolanta.“

„Dankon al Dio!“ ekkriis la markizino, eĉ batante sian bruston pro ekscitiĝo. „Li estis parolanta! Ŝi diris, ke li estis parolanta! Do li nepre ne estas mortinta. Eble li vivos post ĉio. Sed diru al mi — kial vi ne diras al mi — kion li diris? Kaj kiu estis kun li? Kion oni diris? Ĉu oni citis mian nomon? Sidiĝu ĉi tie; kion ili diris?“

Destine opiniis, ke la markizino estas mirinde bonkora, bedaŭrante tiel intense la eblan morton de Lia Reĝa Moŝto. Ŝi ne sciis, ke, se li mortus, la Pompadour falus de sia alta pozicio. Destine ne povis kompreni, kial la markizino mem ne iris al la ĉambro de la vundita reĝo aŭ sendis iun por demandi, se ŝi estis tiel avida, por aŭdi la plej lastan novaĵon. Ŝia nesperta menso ne povis scii, ke la kontraŭaj potenculoj en ŝtataj aferoj ekhavis povon tuj post la atenco kontraŭ la reĝo. Efektive la du viroj, d' Argenson kaj la kronprinco, solaj havis la povon malplenigi la ĉambron tro plenan, por lasi spacon por Madame Pompadour. Sub la cirkonstancoj ŝi akceptis Destine treege afable kaj devigis ŝin rakonti ĉiun detalon, kiun ŝi vidis en la reĝa ĉambro. Pasis longa tempo, antaŭ ol la markizino estis sufiĉe sata, por montri scivolon pri la kialo de la ĉeesto de Destine en la palaco sub tiaj cirkonstancoj.

Sed ĉi tio estis temo de ĉefa koncerno al Destine, kiu tre volis paroli pri la grafo de Vrie kaj lia terura stato kaj ankaŭ klarigi, kiel kaj kial ŝi venis por petegi, ke la reĝo lin savu.

Madame Pompadour dum momento profunde atentis la seriozajn vortojn de Destine, farante kelkajn deman-

dojn pri la tiama stato de la grafo kaj la zorgo, kion li ricevis. Tiam ŝi malkaŝe klarigis, ke estas tute senutile, ke Destine petegu la reĝon, ke li sin deturnu de sia decido. Lia reĝa moŝto estis tiel incitita kontraŭ la grafo, ke estus malprudente, eĉ nomi lin antaŭ li; fakte estis tre kredeble ke, se oni petegus la reĝon, ke li rekonsideru la aferon, li ŝanĝus la dekreton al dekreto de morto. Ŝi mem tre bedaŭris la malfeliĉan sorton de la grafo de Vrie, sed komprenante, ke nenio estas farebla, ŝi jam forigis el sia menso la malagrablan okazajon.

„Malgajaj pensoj maljunigas la homojn. Neniam mi min indulgas je ili“, ŝi anoncis filozofie, „kaj tial mi devigas min, forgesi la grafon de Vrie. Estas plej bone, ke vi faru same, etulino. Mi helpos vin, fari tion, ĉar mi intencas, ke vi restu ĉi tie en Versailles. Mi scias, ke viaj revoj pri ĉi tiu junulo komencis antaŭ kelkaj monatoj.“

Ŝi karesis la vangon de Destine kaj aldonis: „Mi konsilas vin, forgesu la grafon de Vrie. Estos pli bone por vi — kaj tuj.“

„Tion li mem diris al mi“, la junulino konfesis malgaje, sed la tonoj de ŝia voĉo klare montris, ke ŝi ne povas kaj ne intencas forgesi lin. Subite ŝi demandis kun aldonita intenseco:

„Diru al mi, Madame, ĉu estas nenia ebleco, nenia nekonata ŝanco, ke li ankoraŭ eble povos eviti la dekreton de la reĝo? Ĉu neniuj povas fari ion, por lin liberigi?“

„Neniu absolute“, la markizino respondis. „Escepte, kompreneble, se la reĝo mortus. Granda Dio! se tio okazus — — —!“

Madame Pompadour estis denove en profunda malĝojo pro tiu terura ebleco, dum Destine trovis sin deziranta, kun la tuta forto de sia nelojala juna koro, ke okazos baldaŭ granda enterigo en Versailles.

Ĉ A P I T R O * X X I V

LA RADO DE L' SORTO TURNIGAS

La eksciton pro la atenco kontraŭ la reĝo sekvis serioza diplomata situacio, kiu kaŝiĝis sub la aspekto de profunda maltrankvilo pri la reĝo.

La ĝenerala sento de kolero iom kvietigis pro la senprokrasta aresto de la atakanto, viro, kies nomo estis Damiens, kiun la leĝo estis preta puni laŭ maniero sufiĉe barbara, por satigi la plej sangosoifan Royaliston¹⁷.

Post tio, la tuta intereso alcentriĝis al la reĝa litĉambro. Baldaŭ oni konstatis, ke la vundo mem ne estas danĝera, ĉar la armilo estis nur ordinara poŝtranĉilo. Tamen oni timis, ke ia venenaĵo akompanis la baton. La reĝo certe estis malforta. La ekscito ĉirkaŭ li estis, fakte, sufiĉa por kaŭzi malfortecon.

Sekvantoj de la kronprinco urĝe petis la reĝon, ke li preparu sin kontraŭ ĉio, kio ajn eble okazos, per la akcepto de la lasta sakramento; tiun ceremonion oni deziris malpli multe pro timo pri la morto de Lia Reĝa Moŝto, ol pro la deziro forsendi la Pompadour — agon, kiun la roma eklezio postulus kiel pruvon de pento.

Louis komprenis precize, kion oni intencis, ĉar li travivis la saman situacion antaŭe, kiam li estis malsana en Metz. Li ne povis forgesi la preĝojn tiam diritajn, nek la larmojn, la solenajn ceremoniojn, la konfesojn, la rezignojn kaj la finan forsendon de kom-

patinda Châteauroux, la antaŭa Favoratino, kiu tiel akre sentis la humiligon, ke, post kelkaj monatoj, ŝi mortis. Kompatinda Châteauroux! kaj tiam — jen — li ne iris al la ĉielo post tiom da ekscito!

Ĉi tiun fojon la reĝo rifuzis, esti konvinkata tiel facile. Li ne protestis, konfesi siajn pekojn, aŭ eĉ penti; sed plenumi la agon de kompenso postulis konsideron, tio estis, se estus duboj pri lia morto! Li ne sentis sin tiel proksima al la tombo, kiel pensigis la malbonsigna sintenado de la pastro kaj la larmoj de la reĝino.

Kuracisto Quesnay venis de Bellevue kaj diris, ke ŝajne ne estas danĝero; sed oni rimarkis, ke, kiel amiko de la markizino, li estus la lasta konfesi, ke tia katastrofo estas proksima. Ankaŭ ŝiaj amikoj ĉiuj malakceptis ĉi tiun opinion, antaŭvidante ŝian sorton kaj siajn proprajn, se la reĝo fine konsentus, akcepti la lastan sakramenton. Ili tial faris sian eblon, por prokrasti ĝian akcepton. En unu orelo la reĝo aŭdis gajigajn vortojn pri sia stato kaj verŝajna resaniĝo, kaj en la alia orelo la voĉon de sia prenanto de konfeso:

„Ne prokrastu la horon, Via Reĝa Moŝto, evitu danĝeron — por ke via animo ripozu en paco.“

Sed Louis ne volis pensi pri sia animo. Kia domaĝo, ke la pento en Metz ne taŭgus por ĉi tiu fojo ankaŭ; tio estis tiel kompleta! Agrabla sento de pieco ŝtele eniris lin, dum li rememoris la sincerecon de siaj sentoj je tiu tempo. Sed li estis malsana pli longe tiam kaj estis pli malforta ol nun. Tamen, oni ne povas antaŭdiri la estonton; eble la morto estas pli proksima, ol li supozis. Estis malfacile por li decidi. Li ne povis instigi sin, eldiri la fatalajn vortojn. Ne hodiaŭ, eble li faros tion morgaŭ, certe li vivos ĝis morgaŭ, kaj kun

tiu penso Lia Reĝa Moŝto sin turnis sur sian dekstran flankon kaj dormis.

Dum la vespero kaj la nokto la sintenado de la korteganoj vidigis iliajn alternajn sendecidon kaj maltrankvilon. Ili deziris meti sin sur maldanĝeran piedtenon, kiel ajn la morto ĵetus la ĵetkubojn. Se estus estinta ĝenerala supozo pri la certa morto de la reĝo, oni povus nepre aserti, ke neniu homo estus klininta la kapon, por saluti Madame Pompadour, kiam ŝi pasis de sia apartamento al la reĝa kapelo, kie pastro faris meson kaj tonumis preĝojn por la resaniĝo de la reĝo. Ĉar ne estis certe, ke ŝi perdos sian povon, nemultaj riskis, malkaŝe ofendi ŝin; tamen estis nekonsilinde, esti vidata riverancanta antaŭ ŝi, se oni deziris esti en la partio de la kronprinco.

La plej bona solvo de ĉi tiu dilemo estis, ne rekoni ŝin. Se oni ne povis eviti ŝin, senkonscie oni iom malpli klinis la kapon kaj estis strange ŝparema en siaj vortoj. Foje ŝi vidis Monsieur Machault ĉe la fundo de la Granda Ŝtuparo kaj estis alparolonta lin, kiam li pasis antaŭen al la Ĉambrego de Ambasadoroj. „Nepre li ne vidis min“, ŝi diris al si.

La tutan nokton la reĝo ne dormis. Dum la malgajaj horoj pasis, liaj pensoj, ĉiam inklinemaj al melankolio, fariĝis pli kaj pli malĝojaj. La malgajega monotoneco de la pastro apud li konstante preĝanta sian rozarion, la pendanta lampo kun la neklara lumo, simila al duone fermita okulo observanta kaj atendanta lian morton, la piedpintaj paŝoj de pasantaj servistoj, la kelkfoja sonoro de la horloĝo en la korto, kiu tonumis malrapide, kiel mortsonoro — ĉiuj servis, teruregi la reĝan konsciencon.

Louis lace turnis la kapon; lia brako hazarde pendis

trans la rando de la lito, kaj tuj karesa tuŝo travibris lin. Mars, la granda sanghundo, kiu atentis nenium alian mastron, kaŭrinte sub la lito, rapide rampis antaŭen por leki la etenditan manon. Louis ĉiam estis fiero pri la afekcio de ĉi tiu hundo, kiu nur minace bojaĉis al ĉiu alia viro ĉe la kortego. Louis ofte diris: „Mi estas certa, ke Mars amas min pro mi mem, ne ĉar mi estas Reĝo de Francujo¹⁸.“

Larmoj nun malheligis la okulojn de la reĝo Louis, dum li murmuris: „Mia sola amiko en la tuta mondo! — mia sola amiko!“

La sekvintan matenon, Louis kunvenigis siajn ministrojn ĉe sia litflanko kaj anoncis decidon, kiun li faris dum la nokto.

„Mi sentas, ke mi estas pli malforta“, li diris, „kaj kvankam mia stato eble ne estas danĝera, tamen pro la nuna stato de la publikaj aferoj en la parlamento kaj la armeo, mi opinias, ke eble estus ruinige, se la trono en la konsilejo restus vakanta, eĉ dum kelkaj tagoj. Mi tial sentos min malpli maltrankvila, se mi proklamos la kronprincon reĝo, provizore, kun plena povo.“

Kelkaj kontraŭis la proponon, sed la reĝo estis nefleksebla.

„Tiaj estas miaj deziroj, sinjoroj. Mi petas, ke oni venigu la kronprincon.“

Baldaŭ la alveno de la kronprinco estis anoncata. Respekte klinante la kapon ĉe la litflanko, Louis, la kronprinco de Francujo, staris antaŭ Louis, la reĝo. Patro kaj filo estis tiel malsimilaj laŭ aspekto, kiel laŭ temperamento. La kronprinco estis vestita per nigra atlaso, neornamita escepte per la „cordon“ de Sankta Espero, kiu montriĝis sub lia vesto kaj kelkaj aliaj ordenoj modestaj. Li pli similis kamparan sinjoron ol filon de

reĝo. Lia vizaĝo, kun fortaj trajtoj kaj bonkora, iom montris la kavetojn de variolo. Lia figuro estis malalta kaj iom dika. La kronprinco estis tiel pia, kiel lia patro estis estinta diboĉa. Li estis adoranto de la jezuitoj kaj ŝatis, sekrete doni almozojn kaj fari agojn de kompatado kaj simpatio. Ĉiam obeema, malgraŭ sia evidenta malaprobado de la moroj de sia patro, li konservadis la sinceran estimon kaj afekcion de la reĝo.

„Mia filo, mi testamentas al vi regnon treege ĝenatan. Mi esperas, ke vi regos ĝin pli bone, ol mi regis ĝin dum mia vivo.“

La malsana suvereno serioze proklamis ĉi tiujn vortojn, kaj ili pikis ĉiujn korojn ĝis kompatado. Se ĉi tiu kronprinco estus vivinta por regi Francujon, la esperoj de lia patro sendube estus efektiviĝintaj.

Post la necesa ĵuro antaŭ la reĝo kaj ministraro, Louis, la kronprinco, fariĝis la regonto dum la malsano de la reĝo. La ceremonio lasis la malsanulon pli malforta¹⁹.

„Restas ankoraŭ unu rito plenumota“, la pastro milde petis, „kaj tiam, Via Reĝa Moŝto, vi trovos ripozon.“

Tiu momento estis streĉiga kaj senspiriga por ĉiuj. La jezuitoj kaj la kronprinco estis konvinkitaj, ke la bonstato de Francujo dependas de la detronigo de la Pompadour. Jen la konvena okazo. Ĉu Louis konsentos? Ĉiu sekvanto de la Favoratino preĝis fervore, ke li rifuzos.

La reĝo ĝemetis profunde, restis silenta dum longa tempo, tiam, kun evidenta malfacileco, li murmuris kelkajn vortojn tiel mallaŭte, ke neniu escepte de la pastro povis aŭdi ilin.

„Amen!“ estis la profunda respondo. Tiam, starante kun la krucifikso tenata antaŭ li, la jezuito, blanka ĝis la lipoj, per voĉo skuita de emocio impresis anoncis:

„Lia Reĝa Moŝto petas la ĉefministron, ke li forsendu el Versailles la Markizino de Pompadour.“

Ĉio estis travede silenta — la signifo de ĉi tiu forsendo, ĝiaj longe etendantaj rezultoj, vidiĝis antaŭ la grupo da korteganoj, kiel venonta lavango. Ĉiu silente mezuris sian najbaron kun si: „Ĉu la ombro de ŝia pasado falos sur vin — aŭ min?“

Ĉ A P I T R O * X X V

REĜO POVAS ORDONI, VIRINO POVAS MALOBEI

Machault, ĝis nun la plej lojala amiko de la markizino, portis al ŝi la novaĵon — malagrable tasko, ĝoje entreprenata de tiu ventomontrila diplomato, kiu esperis per tio konvinki la kronprincon pri sia lojaleco al la trono kaj pri sia indiferenteco al la sentoj de Madame Pompadour²⁰.

En la akceptejo de ŝia apartamento li rekontis Madame du Hausset, kiu estis veninta de Bellevue kun D-ro Quesnay.

„Kiel fartas la markizino?“ Machault demandis.

„Ŝi estas maltrankvila, Monsieur, kaj tre ĝenata. Ŝi atendis vin ĉiun horon.“

Madame Pompadour duone kuŝis lace en masiva brakseĝo, sed kiam ŝi aŭdis la nomon de sia plej fidinda amiko ŝia spirito revigliĝis.

„Ah, li ne forlasas min; dankon al Dio!“

Levigante, por bonvenigi Machault, ŝi forsendis siajn servistinojn, dum li eniris. La intervjuo daŭris duonon da horo. Monsieur Machault tiam pasis rapide tra la antaŭĉambro, kaj la korteganinoj estis alvokataj al sia estrino, kiun ili trovis en gravega stato. Ŝia vizaĝo estis mortpala, kaj ŝiaj dentoj kunklakis tiel forte, ke, kiam oni metis en ŝian manon pokalon da oranĝakvo, oni

elektis pokalon el argento, pro timo, ke vitro estos rompata.

La abato de Bernis jam alvenis, por esti kun ŝi, kiam ŝin premegis la komunikaĵo de la reĝo. Ŝi estis nun plorĝemanta laŭte kaj kompatinde.

„Mi nepre devas foriri senatende. Oni forsendas min, kvazaŭ mi estas servantino, sendita al la pordo. La decido de la reĝo estas hontindaĵo. Ha, Châteauroux! Châteauroux! Mi pensas nun pri vi; sed via falo ne estis tiel terura kiel mia!“

La kvazaŭ freneza markizino trapaŝegis la ĉambron dum unu momento, kaj dum alia ŝi ĵetis sin sur divanon, tiam ŝi leviĝis kaj apogis sin al la kamenbreto, senatenta al tiuj ĉirkaŭ ŝi.

Kvankam ŝia sufero estis reala kaj ŝi estis grave korfrapita, ŝia dua naturo, ŝia instinkto por ĉio drameca, estis superega eĉ tiam. Ĉiu pozo estis gracia, nenia malakorda tono de voĉo malheligis la tragedion de ŝia malespero.

„Ha, Messieurs“, ŝi poste anoncis, per tono de kvieta malespero, pli kortuŝanta, eble, ol ŝia brua kriego: „vi vidas la falon de stelo — en momento ĉio finiĝas — la ĉielo estas renversita por mi.“

Ŝajnis nun, kvazaŭ ŝi alparolas sin; ŝi sidis kun sia kubuto sur la tablo, kun mano ĉe la vizaĝo.

„Tri monatojn bezonis Châteauroux por morti, tiom da tempo estos nebezona por mia morto, mia falo estas pli granda; Dio mia! tiom pli granda!“

Ree ŝi cedis al konvulsia plorado, kaj tiam sekvis intertempo de histeria danko al tiuj ĉirkaŭ ŝi, ĉar ili ne lasis ŝin sola. Fine ŝi ekpensis, ke ŝi devas pretigi sian pakadon, kaj tiel ordonis:

„Ne perdu tempon, Mesdames — mi preskaŭ forĝesis —

la ordonoj estas, ke Jeanne Antoinette, la Markizino de Pompadour, forlasu la limojn de Versailles tuj kun sia tuta sekvantaro!“

Akre ŝi eldiris tiujn vortojn kaj iom da forto venis kun la sarkasmo.

La tutan posttagmezon estis konfuzo en la apartamento de la eksfavoratino. Ĉiu estis devigata helpi; eĉ Destine havis sian parton da laboro.

Monsieur de Marigny ankaŭ ĉeestis. Aŭdinte pri la forsendo de sia fratino, li senatende venis, por helpi pri la sortimento de libroj kaj dokumentoj kaj, se eble, konsoli ŝin. La markizino ree ekploris, vidante sian fraton, kiu, ŝi bone sciis, devos ankaŭ fali kaj perdi la oficon de Intendanto de Publikaj Aferoj. La unuan fojon dum sia vivo, ŝi ploris sur lia ŝultro kaj sentis iom da protekto pro lia subtenanta brako. Fine ŝi parolis al li:

„François, mia kompatinda frato! terure estas pensi, ke vi ankaŭ devos forlasi vian oficon! Kaj ĉiuj niaj belaj publikaj konstruaĵoj, niaj planoj, ĉio nefinita! Kiel oni kompletigos la *Pont Neuf* kaj *Place Louis Quinze* sen vi? Ho, ili sentos la mankon de vi. François! iam ili scios kaj estimos vian kapablecon.“

Je la vespero Madame Pompadour sufiĉe refortigiĝis, por alpreni iom da sia kutima maniero. Ŝi planis iri el Versailles kun kapo alte tenata kaj tiel impone, kiel dum siaj plej prosperaj tagoj.

„Rapidu“, ŝi kriis al siaj servistinoj. „Vestu min zorge, ĉar mi deziras aspekti kiel eble plej bela. La robo kun la etaj rozoj sur la subjupo, kaj la malalta korsajo sen punto aŭ garnaĵoj. Jes, kaj diamantoj — tiom da ili, kiom mi povas porti!“

Ŝi ridetis bonhumore kaj parolis kun febra vigleco,

dum la servistinoj aranĝis ŝiajn harojn kaj surmetis ŝiajn ŝuetojn.

„Mi sendos du Hausset morgaŭ por fini la pakadon. Jes, metu tiun diademon sur mian kapon, kaj la stelon ankaŭ. Mia lasta vespero ĉi tie nepre estos brilega; la historio devos kroniki, kiel la Pompadour foriris de Versailles! Ĉu vi venigis la kaleŝegon? Ĉu ĝi alvenas? Ha, Monsieur de Bernis, mi tre ĝojas, ke vi estas ĉi tie. Ni eliru kune. Ninette, rapidu — mian poŝtukon. Nun mi estas preta. Malfermu la pordojn! Diru al ĉiuj, ke la Pompadour veturas en liberan naturon pro sia sano. Nun mi iras! Ne, ne tiun! — donu al mi la mantelon el ermeno! Vi forgesas — estas malvarme en Versailles por mi hodiaŭ nokte!“

Ŝi sin turnis al la pordo por foriri, ridetante kaj babilante al de Bernis, por montri al la mondo, kiel stelo brilas, eĉ dum ĝi falas.

Je tiu momento aŭdiĝis ĉe la pordo susuro de silkaj subjuoj kaj ekkrio de surprizo en virina voĉo, dum eniris kun gajaj gestoj kaj multe da levetado de la ŝultroj viveca kaj ĉarma junulino — neniu alia ol Madame de Mirapoix.

„Ho! kio okazis?“ ŝi gaje demandis. „Mi alvenis ĉe la ekstera pordo de via apartamento — neniu estis tie! Mi eniris la antaŭĉambron — neniu min akceptis! Neniu haltigis mian ordoneman progreson ĝis — jen mi estas! Kaj ĉi tie mi vidas eksciton kaj konfuzon! Kio okazis?“

„Ha, ĉu vi ne aŭdis?“ respondis Madame Pompadour, paŝante malantaŭen en la salonon.

„Ne, mi aŭdis nenion.“

„Nu, la novaĵo estas sufiĉe malbona. Mi devas forlasi Versailles senprokraste — la nunan nokton.“

Madame de Mirapoix elspiris mallauĝtan krieton de sur-

prizo, penseme skuante la kapon kaj kuntirante siajn beletajn lipojn. Kiel rezulto de ĉi tiu momenta pensado, ŝi parolis malrapide, sed decide:

„Do, la reĝo ordonis, ke vi foriru! — Ne faru tion!“

„Dio mia!“ ekkriis Madame Pompadour. „Kion vi diras — tio estas ordono“.

La Mirapoix skuis la kapon kun malaproba ĵeto kaj nur ripetis sian konsilon:

„Ne atentu ĝin²¹!“

Surprizite kaj ekscitite pro ĉi tiu kuraĝega sugestio, Madame Pompadour fale sidiĝis en la plej proksiman seĝon.

„Sed kiel mi kuraĝu malobei? Pensu pri la rezulto.“

Tiam la maltima eta virino pli plene klarigis sian ideon pri la afero, ne forgesante multe da gestoj kaj beletaj akcentoj.

„Ho, vi povas zorgi pri ŝajno de foriro; forsendu kelke da skatoloj kaj unu aŭ du el viaj virinoj en via kaleŝego. Disĵetu multe da ordonoj kaj faru bruaĉon pri ĉio, kion vi faras sed — restu ĉi tie! — ne foriru! Kредu mian opinion pri ĉi tiu afero. La reĝo mem ne deziras, ke vi foriru. Oni devigis lin tiel agi, timigis lin, ĝis li kredis, ke li mortos. Ho! mi scias, kiel ili parolis al li — d'Argenson kaj tiu tuta grupo da jezuitoj staris kaj interparolis ĉirkaŭ lia lito pri lia morto! Tion ili deziras. Ili opinias, ke, kiam li estas survoje al ĉielo aŭ ien — kaj kiam vi estos forsendita — notu bone, eĉ kvankam li resaniĝos, li estos sufiĉe indiferenta, por esti facile instigata ne revoki vin, kaj estas iomete da vero en tio! Sed, kontraŭe, se li resaniĝos, kiel mi opinias, kaj trovos vin ankoraŭ ĉi tie — kредu min — li ne bedaŭros!

Madame Pompadour rigardis al sia frato, demande, kaj tiam proponis: „Sed kio, se la reĝo mortus?“

„Ha — ha!“ Tion Mirapoix diris, kiel daŭran ekkriion de malkredo, akompanatan de rapida eklevo de la ŝultroj, kiu estis elokventa ekvalento por la palpebrumo de unu okulo. „Ne ĝenu pri tio! Oni jam ne estus povinta reteni lin en lito tiom longe, se oni ne estus elpensinta tiun timigilon pri veneno. Eĉ tio ne povos daŭri post morgaŭ. Mi certigas al vi, ke nenio povas konvinki min, ke estis ia ajn intenco mortigi la reĝon. Per poŝtranĉilo — pensu pri tio! Kia absurda ideo! kiam li portis siajn mantelon kaj vintran vestaĵon. La bato estis celita al vi, mia karulino! Ŝi mallaŭtigis la voĉon kaj aldonis impreson²²:

„La jezuitoj!“

„Ĉu vi efektive tiel opinias?“ demandis la markizino mirigite.

„Tio estas ĝuste miaj opinio kaj kredo. Oni penis, ripeti tiun etan okazadon de la malsano de la reĝo en Metz, penis malfortigi lin, ĝis li forsendus vin, same kiel li forsendis Châteauroux. Akceptu mian konsilon kaj restu, kie vi estas.“

Madame Pompadour frapis la tablon per sia delikata mano.

„Mirapoix, vi estas prava! Tion mi faros!“ En sia ekscito ŝi kuregis al la eta diplomatino kaj ĉirkaŭprenis ŝin, certigante al ŝi, ke ŝi estas la plej adorinda amikino en la tuta mondo.

„Ho, la feliĉaĵo! — ni faros tion — ni nepre agos laŭ via konsilo. Ĉio ajn estus pli bona ol mia foriro hodiaŭ nokte. Nun ni ankoraŭ vidos, kiu triumfos — la jezuitoj aŭ la Pompadour!“

Ŝi diris tion kun fermitaj dentoj, kaj tiuj, kiuj aŭdis ŝian frazon, neniam forgesis ĝin.

SE MI ESTUS REĜO

Dum la konversacio kun Madame de Mirapoix, la koro de unu persono en la ĉambro tiel multe malgajiĝis, kiel tiu de Madame Pompadour gajiĝis.

Destine malofte komprenis la signifon de konversacioj, kiujn ŝi aŭdis en Versailles, sed ĉi tiu estis dolorige klara. La reĝo resaniĝos. Ĉi tio signifis nenian esperon por la malliberulo en Bellevue. Nenia espero! Nenia ŝanco de pardono! Madame Pompadour jam diris, ke „nenio povos savi lin, escepte la morto de la reĝo“.

Ĝis tiu momento Destine apenaŭ komprenis, kiel konfidante ŝi esperis la morton de la reĝo. Ŝin nekonscie subtenis la fakto, ke la kronprinco estas en ofico kun la plena reĝa povo. Li estis reganta anstataŭ la reĝo, kaj ŝajnis al ŝi nur afero da horoj, antaŭ ol li fariĝos reĝo laŭnome ankaŭ. Tiel konfidema ŝi fariĝis, ke ŝiaj timoj de la pasintaj du tagoj jam trankviliĝis. Ŝi komencis rimarki aferojn kaj objektojn, kaj efektive ĝuis sian vivon en la reĝa palaco. Neniu multe atentis ŝin en la renversita stato de la aferoj de la markizino. Ŝi, verdire, ne povis senti multe da simpatio aŭ intereso en la forsendo de Madame Pompadour, ĉar ŝi povis kompreni nenion pri ĝi. Sed kiam la markizino formetis sian mantelon kaj elspiris etajn historiajn ridojn de plezurogo je la ideo de restado en Versailles, Destine komprenis perfekte, ke la reĝo resaniĝos.

Madame de Mirapoix ankoraŭ diris: „Hodiaŭ matene mi subaŭdis mian edzon diri, ke la povo de la kronprinco certe estos nuligita morgaŭ.“

Neniu rimarkis la malgajan vizaĝon de la junulino, mute aŭskultanta, dum Madame Pompadour donis ordonojn laŭ sia plej lasta plano. Oni venigis kelkajn veturilojn kaj faris ĝeneralan impreson de tuja foriro al Bellevue. Kelkaj korteganinoj estis efektive irontaj, kaj Destine estis inter ili. Baldaŭ ŝi havis sian longan kapoton ĉirkaŭ si kaj, kun la aliaj korteganinoj, malsupreniris la Grandan Ŝtuparon. Ŝi estis tute indiferenta pri sia ĉirkaŭajo, kvankam ĉi tiu verŝajne estus la lasta vido, kiun ŝi iam havus de Versailles. Ŝi apenaŭ vidis la multajn korteganojn, soldatojn, gvardianojn kaj servistojn, kiuj silente faris spacon, dum la sinjorinoj iris al la veturiloj.

Atingante la ĉefan enirejan vestiblon, ili trovis sian progresadon haltigita, kaj ili estis devigataj, unuiĝi kun multspeca grupo ĉe unu flanko, por atendi, dum la svisaj grenadistoj ordigis ilin, laŭvice pretaj, saluti la kronprincon, kies kaleŝego je tiu momento eniris la korton.

Baldaŭ oni malfermis la altajn duoblajn pordojn, por enlasi Louis, la kronprincon, kiu estis eskortata en la palacon kun la tuta ceremonio kutime donita al la reĝo.

„Jen li venas“, diris unu el la sinjorinoj ĉe la flanko de Destine. Antaŭ kelkaj horoj ŝi estus rigardinta kun scivolemo, por vidi tiun gravan personon, sed ĉar li disrevigis ŝin, ne fariĝante orfo, ŝi sentis ne multe da intereso pri li — kvankam li estis princo reĝa.

Senkonscie ŝi levis la okulojn kaj vidis alproksimiĝanta inter du vicoj da grenadistoj sinjoron de favora sintenado, kies fortan personecon nenia aliformiĝo aŭ sceno aŭ kostumo povus kaŝi. Kun sento de kapturigi, kiu estis malfacile venkebla, Destine rekonis tiun

vizaĝon kaj figuron. Pro mirego kaj deziro pli bone vidi, ŝi sin klinis antaŭen, kaj, antaŭ ol ŝi povis pensi, ŝiaj mirigitaj lipoj lasis fali la nomon:

„Patro Bona Espero!“

La pastro kaj princo estis ja unu sama persono. Povis esti nenia eraro pri tiuj afablaj okuloj aŭ la kavetoj sur vangoj kaj mentono.

Dume okazis, ke la kronprinco ekvidis la surprizitan vizaĝon klinantan antaŭen kaj aŭdis la nomon, kiun ŝi eldiris. Tiu, simile al mistika simbolo, tuj atentigis lin. Paŭzante pro momenta surprizo, li rekonis la seriozan junan vizaĝon, kapuĉitan de la sama blua kapoto, kiun li vidis en la arbarego²³.

„Ha, Mademoiselle, ĉu estas vi? mi ĝojas, ke vi ne forgesis Patron Bonan Esperon.“

Senspira surprizo ekposedis ĉiun rigardanton de ĉi tiu okazaĵo, kaj envio plenigis la korojn de multaj, kiam la kronprinco ridetis afable al la junulino, kiu, malgraŭ sia surprizo kaj konfuzo, havis subitan esperon, kiu instigis ŝin timeme respondi:

„Mi ne povus forgesi lin, ĉar li promesis — ‚se li estus reĝo‘ —“ je tio mankis al ŝi kuraĝo; la sono de ŝia propra voĉo timigis ŝin kaj ŝi mallevis la okulojn pro tio, kion ŝi faris.

Sed ĉi tiuj nemultaj vortoj ne estis perditaj por la kronprinco. Li rememoris la arbaregan intervjuon kaj samtempe ne povis ne admiri la penon de la junulino, rememorigi lin.

„La promeso de jezuita pastro estas sankta, kaj ankaŭ tiu de la Kronprinco de Francujo. Mi rememoras vian mision, Mademoiselle, kaj via peto estos plenumata.“

Li sin turnis al siaj oficistoj kaj aldonis: „Konduku

tiun ĉi junulinon al mia konsilejo, por ke mi povu esplori ŝian aferon kaj preparu la necesajn paperojn.“

Li tiam supreniris la Grandan Ŝtuparon, dum oni ordonis al Destine, ke ŝi sekvu lin, dume ĉiuj okuloj rigardis ŝin.

„Protektatino de la foriranta markizino“, oni flustris unu al la alia. Konfuzite de la subita okazo, Destine paŝis simile al spirito en sonĝo.

„Kuraĝa koro kaj beleta vizaĝo“, estis la interna penso de pli ol unu rigardanto.

C A P I T R O * X X V I I

LA TERURO DENOKTO

Post la impona foriro de siaj sinjorinoj al Bellevue, Madame Pompadour sidis sola kaj neĝenata antaŭ la fajrejo en sia buduaro.

Ŝi jam estis forsendinta siajn ceterajn sinjorinojn kaj ordoninta, ke oni fermu la pordojn de ŝia apartamento. Dum duonhoro ŝi ne moviĝis. Maltrankvilaj, lacaj pensoj aperigis sur ŝia vizaĝo, kiam ĝi estis en ripozo, la markojn de ŝiaj tridek kvin jaroj de febra vivo. Ĉagrenata frunto kaj etaj dekurabaj linioj ĉe ambaŭ flankoj de ŝia buŝo klare diris, ke ne ĉio estas bona kun la Favoratino. La vino de la vivo subite malfreŝiĝis; la ekbrileto kaj vervo estis for.

Ŝi havis gravajn dubojn, ĉu la reĝo pardonos ŝin pro ŝia restado en Versailles spite de sia ordono. Aliflanke, ŝi sciis nur tro bone, ke estus preskaŭ neeble, ke ŝi, unufoje forsendita, iam povus esti revokata. Louis ĉiam sekvis la plej facilan rimedon. Pliigante ŝian maltrankvilecon, ŝin torturis subkuŝanta dubo, ĉu li iam efektive kredis la rakonton, kiun ŝi diris al li pri la grafo de Vrie. Li estis estinta afabla kun ŝi en la lasta tempo, tamen —? Pompadour ĝemetis kaj fermis la okulojn, dum ŝi devigis sin rekoni la eblecon, ke la nuna nokto povus esti ŝia lasta en Versailles.

Je tiu momento ŝi aŭdis piedpaŝojn en la ekstera

ĉambro. Kiu kuraĝis enveni post ŝia ordono, ke oni enlasu nenium!

La surprizo de Madame Pompadour fariĝis kolero, kiam la pordo estis impulseme kaj perforte malfermita kaj jen eniris — plena de konfido kaj feliĉa — la ĉie estanta junulino de Sankta Cyr!

„Kion ĉi tio signifas?“ severe demandis la markizino.
„Kial vi ne estas en Bellevue? Ĉu la aliaj ne iris tien?“

La tono, kun kiu la markizino diris ĉi tiujn demandojn je ĉiu ajn alia tempo estus rompinta la koron de Destine, sed, kiam oni ĵus estas veninta de aŭdienco ĉe la reganta Kronprinco de Francujo, eta montrero de koleremo je la parto de simpla markizino povas pasi nerimarkata. Destine estis tro ĝoja, por senti la mensan atmosferon.

„Madame — ĉu ne estas mirinde! Ho! mi apenaŭ kredas tion. — Li estas pardonata. La grafo de Vrie estas pardonata! Kaj tuj liberigota. Mi mem vidis la permesan ordonon, kaj kuriero estas jam survoje kun ĝi.“

„Pri kio vi parolas, infano? Ĉu vi freneziga?“

La suspekto de la markizino tuj kvietigis pro la rideto de amuzo sur la vizaĝo de Destine.

„Ne, Madame, sed ne estas strange, ke vi tiel opinias. Tio estas tiel mirinda, sed ĝi estas efektive, efektive vera.“

Ŝi surgenuiĝis apud la markizino kun infaneca sentimeco, kiu tute senarmigis la kutiman rezervemon de la sinjorino. La rebrilo de la fajra restaĵo aldonis pluan helecon al la vizaĝo de Destine, dum ŝi impulseme rakontis detale, kio ĵus okazis pri la lastatempaj faritaĵoj.

„Ĉiuj aliaj sinjorinoj iris al Bellevue laŭ via ordono. Sed oni ordonis, ke mi iru kun la kronprinco.“

„La kronprinco!“ — Madame Pompadour tute konsterniĝis.

„Jes, li ĵus revenis de veturado, kiam ni malsupreniris la ŝtuparon, kaj li pasis tute proksime de ni en la granda koridoro. Eble mi mem klinis pli antaŭen ol la aliaj — mi estis tiel surprizita vidante lin — iel li rekonis min.“

Madame Pompadour rektiĝis, tute senkonscia pri sia pozo, turnis la vizaĝon de Destine rekte al sia propra kaj demandis serioze:

„Ĉu vi intencas, diri al mi, ke Lia Kronprinca Moŝto konis vin tiel, ke li rekonis vin, kiam li vidis vin? Ne — tio estas neebla! La kronprinco — absurde!“,

La markizino preskaŭ ree konvinkis sin, ke Destine perdis la prudenton; sed la rakonto de la junulino baldaŭ ŝajnis komprenebla.

„Jes, mi jam renkontis lin kaj ne sciis, ke li estas la kronprinco, li portis la vestaĵon de pastro kaj ekhaltis, por paroli al mi, kiam mi estis survoje ĉi tien de Bellevue.“

Madame Pompadour komencis kompreni, kaj ŝi aŭskultis silente al la cetero de la rakonto. Ŝi restis silenta dum tempospaco post la fino de la ekstaze laŭdega raporto de Destine pri la bonkora kronprinco.

Tiam la markizino klinis malantaŭen en sia seĝo, kaj ŝiaj duone fermitaj okuloj rigardis kun nova kaj konfuzita intereso la junulinon antaŭ si.

Ŝi ne povis ne demandi sin, kian strangan facilecon posedis la infano — facilecon, kiu povis porti ŝin ĉiam en la turnakvo de okazaĵoj. Destine, modesta, kvietaj, naiva, senartifika, kaj ĵus el monaĥinejo, tamen aperis je ĉiuj urĝaj okazaĵoj. La unua vorto, kiun la markizino rememoris, aŭdante ŝin paroli, estis nomo, kiu portis agitadon al la tuta reĝa ĉasantaro. Poste, kiam Romain estis grave malsana en la kaŝita ĉambro en Bellevue,

estis ŝi, kiun la sorto kaj la reĝo elektis, por savi lin. Al Versailles ŝi venis sen voko aŭ kaŭzo, ŝajne pro nenia alia kialo, ol esti ĝustatempe en la privata ĉambro de la reĝo, kiam oni atakis lin. Tiam ŝi uzis la privatan ŝtuparon de la reĝo, por fari sensacian eniron en la buduaron de la reganta Favoratino. Kaj nun ŝi aperas, kiel ŝatata amikino de la kronprinco — kiu ĝoje faris al ŝi komplezon, per tio efektivigante tion, kion la Pompadour per sia tuta povo neniam estus povinta fari.

Ree ŝi rigardis al Destine kaj trovis sin distrite pensanta pri la baptopatrino de la junulino, kaj kiu ŝi eble estis. Samtempe ŝi decidis, ke junulino kun tia talento, por esti en la ĝusta loko je la ĝusta tempo, estas anomalio tro valora por perdi — efektive talismano! Jes, kompreneble. Tio ŝi estas, kaj nenio alia! Ĉiu okazintaĵo pruvis tion. Nur talismano povus esti tiel taŭga rilate al aferoj en Versailles. La vizaĝo de Madame Pompadour heliĝis pro subita ĝojo. La sorto sendis al ŝi talismanon! Ŝi kredis absolute, ke Destine portos al ŝi bonan ŝancon.

„Mi ĝojas, ke vi estos kun mi hodiaŭ nokte“, ŝi parolis la vortojn kore, karesante samtempe la suprenturnintan vizaĝon de Destine. „Mi deziras, ke vi restu por ĉiam kun mi.“

Madame Pompadour jam kutimiĝis al mirigaj teatraj finiĝoj ĉe Destine, sed la sekvanta eksplodo, kiun ŝi aŭdis, estis pli miriga ol ĉiuj aliaj.

„Kara Madame la Markizino, mi petas, ke vi ne opinias min nedanka, sed — kun via permeso — mi ŝatas plej multe, reiri al Sankta Cyr.“

„Kion nun mi aŭdas? Kia stranga ideo! Reiri al Sankta Cyr! Neniam! Vi kara eta naiva infano! ĉu vi supozas, ke mi permesus al vi, ruinigi vian tutan vivon

per reiro al tiu malgaja loko? Ne, ne, ne, ne! vi nepre devos resti nun kun mi“ kaj la markizino, plena de afableco, frapetis ŝian manon kaj kisis ŝin sur ambaŭ vangojn.

„Pensu pri via muziko, infano mia, kaj la oportunaj okazoj, kiujn mi povas doni al vi. Super ĉio, mia karulineto, mi diru al vi, mi ŝatas vin pro vi mem — vi distras min — kaj mi intencas, reteni vin ĉiam apud mi. Ho, vi nepre ne forkuros!“ ŝi aldonis ridetante, sed ne sen forta decido, reteni sian talismanon. „Jes, mi timos, lasi vin el mia vido, pro via freneza ideo, reiri al via malnova sanktakva, haleluja hejmo!“

Ĉi tiu nerespekta maniero, aludi al Sankta Cyr, multe ŝokis Destine, sed la markizino ne atentis la efekton de siaj vortoj kaj daŭrigis gaje:

„Mi ne permesos al vi forkuri, kiel vi forkuris de Bellevue, vi eta Mademoiselle Libera — kiel — birdo! eĉ se mi devos meti vin en oran kaĝon kaj doni al vi manaon en la formo de sukeraĵoj. Vi vidas, mi intencas, bone gardi vin per okuloj kaj oreloj, ankaŭ, ĉar mi devos havi pli multe da kantado, ol la lastaj semajnoj produktis.“

Destine konsterniĝis pro ĉi tiu gracie girlandita, tamen ne malpli akrapinta ordono, ke ŝi restu, kie ŝi estis, havis nenion por diri kaj nenia respondo estis atendata, ĉar la markizino forsendis ŝin kun la fina ordono, ke ŝi dormu bone kaj songu pri plezuro kaj festado anstataŭ pri preĝo kaj fastado, kiuj devas esti la sorto de loĝanto de Sankta Cyr.

Sed Destine estis maldormema dum la plejparto de la nokto. Tiom okazis en la lastaj horoj, ke tumulto da pensoj posedis ŝin. Ree kaj denove ŝi penis forpeli ilin. Ŝi tiris la litkovrilojn firme ĉirkaŭ si, aranĝis ĉion komforte, fermis la okulojn, sed vane. La delikate broditaj lintoj litotukoj donis pli multe da malvarmo ol da kom-

forto, kaj la glata silka kovrilo supre estis nur incitajo, kiam ŝi estis senripoza. Destine pensis sopire pri la peza griza lankovrilo sur sia eta lito ĉe Sankta Cyr.

„Estis nenia bezono, ke Madame Pompadour parolu tiel nerespekte pri la monaĥinejo“, Destine pensis, „estas nenio tre ĝuebla en aŭ ĉirkaŭ palacoj!“ La impreso de Destine pri la vivo en ili ja estis entute timiga: stranga amasego da danĝeraj episodoj, kaŝitaj ŝtuparoj, sekretaj ĉambroj, atencoj kontraŭ vivo, subitaj malfavoro kaj malhonoro, fortega plorado, subita morto — kun la abismo de la Bastille oscedanta sub ĉio. Destine ektemis, pro neformita penso, ke eble ŝi mem estas sendota al la Bastille. Ŝi miregis je sia propra malprudento, kuraĝinte veni al Versailles. Ŝajnis miraklo, ke oni ne tuj arestis, aŭ ke atencanto ne mortigis ŝin. Eble ŝi estis savita nur, ĉar la kronprinco okaze ricevis la povon regi.

Kun pensoj pri la konprinco revenis pensoj pri de Vrie, kaj Destine trovis pacon en sia animo kaj ĝojon en sia koro. „Li estas libera! Li estas libera!“ ŝi ripetis la vortojn, kvazaŭ ili estas triumfa rekanto.

La malvarma, necedema kapkuseno, kiu subtenis ŝian rondforman vangon, estis subite varmigita de la kontakto. Tiam ŝi tremetis, kiam ŝi komprenis, ke li baldaŭ estos malproksime de ŝi. Ĉu li pensos pri ŝi, iam — eble? Sed kial ŝi povus esperi tion, ĉar li jam klare diris al ŝi, ke ŝi forgesu lin! La kapkuseno nun estis ne nur varma, sed iomete malseketa, kie paro de longaj okulharoj brosis kontraŭ ĝi. Liaj vortoj estis severaj, sed lia maniero, ŝi rememoris, estis milda. Ĉi tiu memoro ĝojigis Destine, la rigardo en liajn okulojn, la tuŝo de lia mano, la tono de lia voĉo — pensi pri ili estis ĝojega revo.

Tiam ŝi rememoris la seriozan manieron, kun kiu li urĝis, ke ŝi reiru al Sankta Cyr. Devas esti ia bona kialo, pro kiu li tion faris. Eble li sciis, ke ŝi estas en danĝero, ke oni sendos ŝin al la Bastille! Patrino de Dio, protektu nin! Destine silente sin krucesignis. Tiam ŝi kovris siajn orelojn per la litotuko. Je tiu momento la obstina silka litkovrilo komencis ruze gliti al la planko. Postulis iom da kuraĝo etendi la brakon kaj retiri ĝin — la ĉambro estis tiel malluma kaj granda. Ŝi kuŝis tute senmova, sed kun malfermitaj okuloj. La vento tra la kavernosimila fajrejo blekegis malgaje, kaj nefiksita fenestra kovrilo ie, per intermitaj ekbruegoj sur la muro, protestis kontraŭ sia stataĉo, kaj plendanta ĉarniro aldonis sian proteston. Iafoje la vento, simila al fantomo spiromanka, abrupte ĉesigis sian ĝemadon, tiam la fenestra kovrilo ankaŭ staris senmova, kvazaŭ aŭskultante kaj atendante ian timegan okazaĵon. Destine ne moviĝis; ŝi apenaŭ spiris. Unufoje krako de la polurita planko rompis la silenton, kvazaŭ iu ŝtelisto rampas trans la ĉambro. Destine penis rigardi tra la mallumeco per siaj timigitaj plilarĝigantaj okuloj.

Poste ŝi aŭdis la sonon de piedpaŝoj en la koridoro. Supozu, ke oni venas por aresti ŝin! Ŝi haltigis la spiron kaj aŭskultis. La piedpaŝoj preterpasis ŝian pordon, sed la „teruro de nokto“ estis sur ŝi, kaj ree ŝi pensis pri la Bastille, hu! ratoj kaj rampaĵoj kaj ŝlimaj muroj — tiam — oni fortranĉos vian kapon!

Ĉ A P I T R O * X X V I I I

SUB MATENA ĈIELO

Dum la lastaj kelkaj tagoj la kvieto en Bellevue estis premeĝa. La servistoj, sub neniuj ordonantaj okuloj, ripozis en antaŭĉambroj, ludis ludojn en la koridoroj, babiladis en ĉiu angulo kaj vetludis ĉe ĉiu tablo.

Sed por Romain, koscia, ke lia vivo estas baldaŭ estingota sub la tureto de tiu fama estingilo, la Bastille, la horoj estis kiel feraj dentoj en la buŝo de la estonteco, formordantaj iom post iom lian vivon.

Malgraŭ lia malespero, la forto de juneco kaj saneco estis malrapide revenantaj al li. La antaŭa amo al vivo estis ĉe li, postulante rekonon, petegante kiel forgesita amiko. Sed la vivo, pri kiu li revis, estis malsimila al tiu, kiun li antaŭe konis. Lia koro ne plu pulsadis en ritmo kun la sceptro de Louis. La spirito en li ne plu estis tiu de kortegano. Li jam forlasis tiun grupon da aktoroj kaj estis nun en akordo kun multe pli alta harmonio. Suferado, la granda akordisto, tiel multe plilarĝigis liajn simpatiojn, ke li venis en harmonion kun la potenca korbatado de la homaro.

Li deziris vivi — donaci — regajni la malŝparitajn jarojn. Lia sola preĝo estis, havigi al si oportunan okazon, por helpi unu suferantan mortemulon, doni manĝaĵon al unu malsata viro.

Doni al la malsataj manĝaĵon. Dum deliro en lia malsano ĉi tiu frazo fariĝis al li kvazaŭ sorĉa signovorto,

kaj tio nun estis la ĉeftemo de liaj revoj: „Nutri la malsatajn!“ Tiu estis la sola ordono en la Biblio, kiun li povis klare rememori. Ĝi ŝajnis al li la sola solvo de la tuta plano de l' vivo; duono de la mondo havas la povon donaci tion, kion bezonas la alia duono. „Nutri la malsatajn!“

La nura vorto „malsato“ efikis sur lin strange; ĝi ekbrilegis en lia imago kvazaŭ lango el flamo. Sed tiu stato ne ĉiam estis tia. Ofte antaŭe li aŭskultis, kun sento de incitiĝo, petskribojn portitajn antaŭ la reĝo, dirantajn pri malabundo de nutraĵo en ĉi tiu aŭ tiu provinco aŭ pri malsatego inter la malriĉuloj.

„Dio! kia mi estis en tiuj tagoj?“ Li ekkriis la vortojn laŭte. Unu aparta okazintaĵo nun leviĝis, por danci en lia memoro simile al demono sur tombo. Li klare revidis la scenon: la reĝa ĉasantaro, kun ekbrilo de koloro kaj sono de trumpetado, paŭzis ĉe vido de kamparano, peze marŝanta laŭ la vojo kun malplena ĉerko balancata sur la ŝultro.

„Ĉu estas via propra ĉerko, kiun vi portas?“ demandis Louis ŝerce.

„Ne, ĝi estas por mortinta viro.“

„Kial li mortis?“

„Malsato!“ estis la akra respondo. Je tio la gaja aro da korteganoj kore ridis, ĉar al ili la ŝerco ŝajnis bonega.

Ĉe tiu punkto en sia silenta rememoro Romain ekkriis laŭte: „Kaj mi — mi — kiu estis tie kaj aŭdis — mi ridis kun la aliaj! Ho Dio! Pardonu al mi miajn pekojn! Mi ridis, kiam mi aŭdis, ke viro mortis pro malsatego.“

Romain kunpremis la manojn en plena mizero de memriproĉo. Li ankaŭ jam sentis malsaton kaj malesperon. Tio kvazaŭ iniciatis lin en la grandan kaj sanktan frat-econ de l' homaro.

Sed subita sono interrompis la pezan malĝojon de lia

meditado. La horo estis malfrua por klakado de spronhavaĵoj kalkanoj en la vestiblo, rapidaj paŝoj, laŭta frapado kaj ordona voĉo ĉe la pordo.

Romain streĉis ĉiujn fortojn, por renkonti la neeviteblon; li sciis, ke oni venos, por kapti lin je tiu nekonsvena horo kaj konduki lin al la Bastille.

„Eniru, sinjoroj“, li kriis per voĉo devige trankvila.

La pordoj malfermiĝis kaj servisto anoncis:

„Sendito de Lia Reĝa Moŝto, la Kronprinco de Francujo!“

Post momento letero kaj sigelita dokumento kuŝis en la mano de Romain. Li malfermis la leteron; pro nerva rapido li ŝiris la paperon en kelke da lokoj. La skribmaniero estis tiu de la propra mano de la kronprinco:

„Grafo de Vrie,

Aŭdinte pri via malfeliĉa situacio, mi sentas plezuron, ke mi havas la povon subskribi por vi ordonon de pardono. Pasporto ĝis Hispanujo ankaŭ akompanas ĉi tiun leteron, kaj mi metas je via dispono kaleŝegon, kiu venos por vi morgaŭ je sunleviĝo, por ke vi ekiru tuj al la suda landlimo.

Oni atendas, ke Lia Reĝa Moŝto, la reĝo, reprenos la aŭtoritaton morgaŭ, kaj vi nepre devos esti irinta grandan parton de via vojaĝo, antaŭ ol li sciigos pri via liberiĝo, ĉar li sendube faros ĉiun penon, ke oni rearestu vin.

Sciante tion, mia kara grafo de Vrie, mi preĝas al Dio, ke Li havu vin ĉiam en sia sankta tenado.

Louis (kronprinco)

Rex interim.*)

P. S. Faru nenian respondon al ĉi tiu letereto. Preparu ekiri je tagiĝo.“

*) Dumtempa reĝo.

Kiam la signifo de tiuj vortoj fariĝis klara al la streĉita kaj torturita cerbo de Romain, li ŝanceliĝis malantaŭen, apogis sin kontraŭ la muro por subteno; lia vizaĝo estis blanka, kiel la papero en lia mano. Daŭris longe, antaŭ ol li povis trankvile kompreni, ke li ne plu estas mal-liberulo.

Kiam la sendito foriris kaj Romain povis konsideri tion, kio okazis, liaj pensoj direktiĝis al la plej kara el liaj esperoj. Kiel la magneta montrilo, kiam ĝi estas libera, turniĝas senerare norden, tiel lia espero, nun liberigita, turniĝis rekte al Destine.

Li ne paŭzis tiam, por konsideri, kiel kaj kial la kronprinco tiel subite pensis pri li kaj pardonis lin, kaj kiel li havis la povon fari tion. Sed tiuj estis konjektoj por alia tago. Estis por li nun nur unu stelo sur la ĉielo — Destine! Liaj pulsoj batis kun la penso pri ŝi. Li ne vidis ŝin de tiu mizera horo, kiam li konsilis ŝin, ke ŝi penu forgesi lin, kaj li supozis, ke ŝi intence restis for de li.

Sed nun li povis nei tion, kion li tiam diris; li estis libera! Li nepre tuj vidus ŝin. Destine, kie ŝi estas? Li sonorigis, por alvoki la ĉefserviston kaj petis, ke li konduku Mademoiselle de Vârel al la malgranda salono. Eĉ se ŝi estus dormanta, li devas veki ŝin kaj peti, ke ŝi venu. La afero estas tre urĝa.

Tiam li atendis. Post ŝajne longa prokrasto, la ĉefservisto revenis: Oni ne vidis Mademoiselle de Vârel dum kelke da tagoj! Ŝi ne estis en sia ĉambro.

Bezonis nenion plu, por refortigi Romain tiel, ke li fariĝis sufiĉe ekscitita kaj freneza, por tiom agiti la tutan mastrumadon de Bellevue, kiom eĉ la Pompadour mem neniam faris.

Baldaŭ oni portis lumojn tien kaj ĉi tien, tra ĉiu ĉambro

de la kasteleto kaj ĉie oni serĉis Destine. Ree kaj denove Romain demandis la servistojn. Neniu antaŭe havis sufiĉe da intereso por rimarki ŝian foreston. Ŝi ne foriris kun Madame du Hausset; ĉiu estis certa pri tio, ĉar ili rememoris la ekscititan foriron de tiu sinjorino kun la kuracisto Quesnay. Sed kio okazis al Mademoiselle? Ĉiu tre ekscitiĝis, ĉiu estis sendata, por serĉi en ĉiuj imageblaj lokoj.

Teruro pli granda, ol tiu de la Bastille, atakis Romain, ĝis fine li demandis la soldatojn ĉe la ekstera pordego. „Jes“, unu el ili rememoris, ke li vidis ŝin ekiri sola. „Ŝi estis demandinta pri la vojo al Versailles.“

Romain elspiris sinceran ĝemeton de ektrankviliĝo. La mistero estis solvita. Ŝi iris al Sankta Cyr, kompreneble. Li ja jam estis konsilinta, ke ŝi iru tien. Ŝi sendube marŝis la tutan vojon — kaj sola, tra Versailles, Bouviers ktp. Kompatinda, eta, malĝoja koro! Se ŝi nur renkontis neniun malfeliĉaĵon!

Li kalkulis la minutojn, ĝis la unua grizo de tagiĝo sendos al li la kaleŝegon, kiu portos lin al ŝi. Sankta Cyr ne estis rekta laŭ lia vojo, sed tion li ne atentis. Li unue nepre devos vidi ŝin, kio ajn alia okazus.

Li observadis la lumon de la kreskanta tago. Estis mirinda kovrilo el prujno sternita sur la pejzaĝo kaj, kien oni rigardis, briletanta blanka vualo duone kaŝis la plej etajn branĉetojn kaj la plej altajn arbojn egale.

Tra la fenestro de la kaleŝego Romain rigardis la mondon kun sankta sento de ĝojo kaj dankemeco. Ŝajnis al li, kvazaŭ li neniam antaŭe vidis ĝin. La mondo estis tiel nova kaj bela. Li trovis subtilan signifon en ĉiu objekto, kiun li vidis. Li rimarkis, kiel profundan kaj signifan veraĵon, ke ĉiuj objektoj kreskas supren, montras ĉielen. Li sentis ankaŭ la spiriton de afableco en ĉiu

penoj de la naturo; li sentis la mildecon de la karesema vinberujo ĉirkaŭ falinta arbo.

Estis ĝojo ĉie ĉirkaŭ li, ankaŭ, ĉar la prujno trembrilis kaj dancis kaj ŝajne eljetis fajretojn — ĝi kvazaŭ ludis kun ĉielarko kaj petolis kun sunradio, plenigis la tutan terglobon per koloroj; ĉiu vojeto estis pavimita per perloj, kaj ŝnuretoj de tremantaj globetoj dependis de la bariloj; la terglobo estis kvazaŭ trempita en sonĝo.

La kaleŝego ruliĝis antaŭen rapide, sed ne sufiĉe rapide, por kontentigi Romain; liaj pensoj estis jam ĉe Sankta Cyr. Ili klakis tra Versailles galope; la granda palaco, simila al fantomo de la pasinteco, ekaperis kaj subite malaperis.

La kaleŝego turniĝis en la arbaregon de Bouviers. Dio mia! kiel malrapide antaŭeniris la kaleŝego. Romain malfermis ĝian pordon, por protesti al la veturigisto sur la konduksidejo, sed tuj li komprenis la kialon de la malakcelado; peza bovĉaro malhelpis la iradon antaŭen. Fine la malgraciaj bestoj movis sin dekstren. La bovĉaristo, en sia longa bluzo kaj kampara ĉapo, kriis pacience al la bestoj.

Virino sidis en la malantaŭa parto de la ĉaro, klinante siajn ŝultrojn antaŭen pro sia peno, reteni ekvilibron sur la ekskuanta sidejo. Romain havis sufiĉe da tempo, por rimarki ŝin, ĉar la vojo estis tiel mallarĝa, ke lia kaleŝego venis zorge flanken de la ĉaro. Ŝi ŝajnis profunde enpena; kapoto kaŝis ŝiajn formojn kaj trajtojn, sed Romain okaze rimarkis erarantan buklo de molaj brunaj haroj, kiu forvagus de siaj limoj, por ludi en la bloveto.

Subite kun plena, libera enspiro la virino rektigis la ŝultrojn, kaj la kapuĉo falis malantaŭen de ŝia kapo. La efekto estis tia de floro malfaldanta, ĉar la malkaŝita

vizaĝo estis bela kaj radianta, brila kun la freŝeco de mateniĝo.

Unue Romain rigardis en kapturiga mirego. Li ne konfidis siajn proprajn okulojn. Ree li rigardis. Tiam dubo fariĝis certeco, tio ne estas fantomo, sed efektivaĵo, estis ŝi — Destine. En sia konfuziĝo li vokis ŝian nomon.

Rapide ŝi rigardis ĉirkaŭen, unue iom timigite, sed la travibro de lia voĉo baldaŭ atingis ŝian koron. Vidante lin, ŝi ekstaris, simila al Aŭroro, en sia ĉaro. La lumo en ŝia vizaĝo donis brilegon al ŝia ĉirkaŭaĵo. Ŝi ne povis paroli pro ĝojo, ke li estas apude, kaj, ke ŝi aŭdis sian nomon sur liaj lipoj.

„Destine!“ li ripetis, „ĉu vi falis de la ĉielo? De kie vi venas, kaj kial vi estas ĉi tie?“

Nun ŝi ridetis, die — tiel ŝajnis al Romain — kaj tiam ŝi trovis voĉon por respondi, inter nervozaj etaj ridoj, por kaŝi la rapidan pulsadon de sia koro.

„Mi — mi forkuras de Versailles!“

„Mi ankaŭ“, li kriis ĝoje.

Je signalo de Romain lia veturigisto haltigis la ĉevalojn, kaj la peza irado de la knara ĉaro ĉesis.

„Venu en mian kaleŝegon“, li afable, sed firme, diris. „Ĉu vi iras al Sankta Cyr?“

Destine respondis timeme. „Jes, vi konsilis, ke mi iru tien.“

Tre plaĉis al li tiu respondo kaj la fido, kiun ĝi signifis. „Mi estas iranta tien ankaŭ“, li arde respondis, „por trovi vin“.

Li vidis la koloron de ĝojo fluegi en ŝian vizaĝon. „Venu“, li aldonis kun rava aŭtoritato, dum li elpaŝis de la veturilo kaj etendis siajn manojn. Helpante ŝin, li trovis okazon, ĉirkaŭpreni ŝin — ho, tiel delikate.

Destine sentis, kvazaŭ ĉiela ĉaro subite aperis ĉe sia flanko, por alporti ŝin, simile al Elio, for de la tero al la ĉielo. Sed malgraŭ siaj ravaj emocioj, ŝi ne forgesis danki la bovĉariston, kiu afable helpis ŝin, iri laŭ la vojo.

Kun mano ĉe mentono kaj pendanta makzelo, la kamparano staris sur la vojo flegma pro mirego, liaj okuloj sur la foriranta kaleŝego, dum grade eniris lian cerbon sento de romaneco en la aero.

Por Romain kaj Destine la tuta mondo ŝajnis svingiĝadi pro ĝojo; la veturigisto krakigis sian vipon, la ĉevaloj rapidigis kun ritma paŝo, la suno leviĝis klara kaj arda, kaj la tago signifis la plenumon de l' vivo!

„Mi trovis vin! Mi trovis vin!“ Romain ekkriis ree kaj denove. Li tiris ŝin al si: „Destine, rigardu al mi!“

Malrapide iliaj okuloj renkontiĝis — kaj tiam iliaj lipoj.

Fluego de melodio plenigis ŝian animon. Tiu kiso estis por Destine simila al la ravanta alta noto de kanto. Ĉiu muziko en la mondo ŝajnis subite moduliĝi en unu perfektan kadencon. Ŝi estus povinta ridi aŭ plori — larmon aŭ arion — ĉar unu aŭ la alia estus taŭginta por la pulsanta ekstazo de ŝia koro. La mirinda konsciado, ke oni estas amata! Kiel la steloj povas resti en siaj lokoj? kiel la suno povas daŭrigi sian vojon, serena, kiam tia miraklo okazis? Li amas ŝin! Romain! Ŝia savanta kavaliro!

„Vidu!“ ŝi diris milde, „la arbarego de Bouviers. Tie ni unue renkontiĝis. Ĉu vi rememoras?“

Romain respondis dolĉe: „Mi rememoras ĉiun vorton, kiun vi parolis — ĉiun ekrigardon de viaj okuloj, kaj mi rememoras la kanton, kiun vi kantis — *Benedicite* — ĝi sonis tra miaj songoj simile al preĝo.“

Li kisis ŝian frunton kaj harojn kaj okulojn, kaj nomis

ŝin per ĉiuj karaj nomoj. Ŝi estis lia „Birdo de la Arbarego!“ la „Kantulino“, kiu devas flugi kun li suden!

Tiu frazo revokis Destine al la aktualajo, kaj ŝi ek-saltis de timo.

„Dio mia! vi devas rapidi al Hispanujo. Vi perdas tempon. Vi iras la malĝustan vojon. Mi detenas vin. Sankta Maria, mi forgesis! Ordonu al la veturigisto, ke li haltigu, por ke mi elpaŝu, kaj vi iru returnen ĝis la rekta vojo!“

„Ne rapidu, etulino! mi iros kun vi al Sankta Cyr.“ La trankvilaj tonoj de Romain montris tian ordonan kvaliton, tiel kara al la koro de virino.

„Sed la reĝo sendos siajn ĝendarmojn, por sekvi vin kaj vin kapti“, ŝi persistis. „Mi scias ĉion pri la afero, ĉar mi ĵus venis de Versailles.“

„Ne ĝenu vin pri la ĝendarmoj“, li kviete admonis; „ili almenaŭ ne serĉos min en monaĥinejo! Kaj krom tio, mi ne opinias, ke estas tia granda bezono de rapido; estos iom da tempo, antaŭ ol Louis sciigĝos pri mia ekiro. Sed tio ne tiel gravas, ĉar — ĉiaokaze — mi intencas trovi tempon, preni tempon, fari tempon, por akompani vin, ne nur ĝis la pordo de Sankta Cyr, sed la tutan vojon —“, li parolis la jenajn vortojn malrapide, arde, „la tutan vojon ĝis la altaro en la kapelo“.

„Vidu“, li aldiris gaje, „la suno estas teksanta por vi nebulan vualon el la arĝenteca prujno!“

Ĉ A P I T R O * X X I X

KELKAJ IMPRESOJ PRI PALACO

Kiam la kaleŝego haltis en la bone konata korto kaj Romain helpis Destine, depaŝi el la veturilo, ŝi ekrigardis supren al la manĝosalono kaj gaje ŝvingis la manon. Ili ĉiuj estis tie, Adrienne, Fanchon, Ninette kaj la ceteraj. La duone malpoluritaj fenestroj estis plenaj de vizaĝoj, similaj al la fono de la Sistina Madono.

Per siaj amelitaj antaŭtukoj la junulinoj frotis la vitro-panelojn, penante, pli bone vidi la mirindan vidon de Destine de Vârel, revenanta al Sankta Cyr, akompanata de bela kavaliro.

„Ĉu vi supozas, ke li estas la sama viro, kiun ŝi kaj Fratino Thérèse renkontis en la arbarego? Kaj, Dio mia! kiel gracia li estas! Kiam li ĵus nun kisis la manon de la Patrino Supera, li klinis la kapon same kiel Sinjoro la Abato, kiam li en la diservo diras: „Nia Sinjoro Jesuo Kristo!“

„Li envenas kun ŝi, — nun, ĉu vi vidas? — la veturigisto metas lankovrilojn sur la ĉevalojn. Venu rapide, ni rigardu malsupren de la balustrado en la akceptejon.“

Simile al kuregantaj musoj, kaj preskaŭ tiel rapide kaj mallaŭte, ili iris piedpinte laŭ la koridoro kaj baldaŭ ili estis rigardantaj malsupren de la balustrado; simile al franĝo el grizaj kaj brunaj kvastoj, reciproke sin puŝante kaj ŝvingigante en bloveto de scivolemo.

„Vidu, la abato mem venas antaŭen por renkonti lin. Fanchon, — rigardu rapide! Ĉu vi vidis, kiel grazie li kapoklinis denove? Dio mia! kiom mi povus ami viron eĉ se li neniam farus ion alian ol nur tian kapoklinadon! Silentu, Ninette, ne faru bruon aŭ ili aŭdos vin!“

„Ho, — la — la — la —! ĉu vi vidis liajn manojn? Ili estas blankaj, kiel la kufo de la Patrino Supera, kaj liaj ringoj! *Sanctissima!* Tiu verda ŝtono estas tiel granda, kiel fabego.“

„Pri kio ili parolas laŭ via opinio — la abato kaj la nekonata kavaliro? Ili iras en la sakristion, kaj jen venas Destine suprenkuranta la ŝtuparon — ŝi jam vidis nin.“

Post momento ŝi estis kun la junulinoj, ridanta, helokula, rozvanga — spiromanka, kaj oni ĉirkaŭis, enbrakigis kaj demandis ŝin de ĉiuj flankoj.

En ŝia kutima ĉirkaŭaĵo kaj libera de sindeteno, ne mankis al Destine vortoj. Ŝi povis paroli tiel rapide, kiel iu ajn, kaj povis ridi libere, kiam timo pri kortega etiketo ne malhelpis ŝin. Ŝi sentis tian grandan plezuron estante ree ĉe hejme, ke ŝia spirito kvazaŭ ekbolis pro viveco.

Ŝi gaje faris gestojn, ke ili silentu kaj ridante ili sidigis sin sur la supran ŝtupon por respiri. La aliaj rapide grupiĝis ĉirkaŭ ŝi sur la larĝa ŝtuparo, kaj Destine, apogante sin komforte kontraŭ la muro, asertis, ke tiu momento estas la unua, en kiu ŝi povas sidiĝi kaj ripozi, de kiam ŝi lasis ilin.

„Oni efektive ne povas ripozi sur seĝo, kiu estas brodita tiel delikate, kiel nia altara tuko“, ŝi aldonis pro klarigo. „Kaj ili ĉiuj estas tiaj en la palaco en Versailles.“

Ĉi tiu lasta okazo parolita vorto treege mirigis la junulinojn.

„La reĝa palaco! vi ne intencas diri, ke vi estis tie?“
Destine kapojesis iomete kaj ĝuis la efekton. „Jes, mi foriris de ĝi hodiaŭ matene.“

Kiam la junulinoj ree povis spiri, ilia demandado vive rekomenciĝis. „Ho, Destine, diru al ni ĉion pri ĝi! Ĉu ĝi estas tute ora kaj marmora, kun kristalaj speguloj kaj poluritaj plankoj?“

„Jes“, ŝi respondis, kvazaŭ ne impresita de la grandiozeco. „Sed ĝi estis mirinde malvarma. Preskaŭ ĉiu fenestro klakis.“

„Malvarma!“ ili ekkriis. „Nur pensu pri malvarma palaco!“

„Mi supozas, ke jen estas, kial reĝoj kaj reĝinoj ĉiam portas ermenon!“ enmetis gaje Fanchon.

„Ĉu vi vidis la reĝon?“ ili demandis avide.

„Jes.“

„Kaj la reĝinon?“

„Jes.“

„Ĉu ŝi estas bela?“

Destine ridetis kun nuanco de amuzo. „Mi ne scias. Kiam mi vidis ŝin, ŝi estis ploranta.“

„Ploranta! mi neniam opiniis, ke reĝinoj ploras.“ Fanchon estis tute enpena dum momento, sed la aliaj insiste demandadis.

„Ĉu vi vidis aliajn el la reĝa familio; princinon aŭ princon?“

„Mi vidis la kronprincon.“

„La kronprincon! Dio mia, nur pensu! ŝi vidis la kronprincon ankaŭ! Ĉu li estas iel simila al fea princo?“

„Fea princo!“ Destine respondis al tiu demando kun entuziasmo. „Jes, li estas precize simila al fea princo. Mi povus preskaŭ kredi, ke la feinoj sendis lin!“

„Diru al ni ankaŭ ion pri li“, ili persistis. „Li nepre estas belega. Ĉu li estas altkreska kaj majesta?“

„Ne, ne altkreska, li estas proksimume tiel granda, kiel nia abato.“

„Pro ĉielo, vi ne intencas diri, ke li estas grasa?“
Destine malkaŝe konfesis, ke li estas tia, iomete!

„Grasa princo!“ Fanchon ekĝemis.

Destine varmiĝis kaj tial demetis sian kapoton.

„Patrino Maria! vidu ŝian kostumon! De kie vi havigis ĝin?“ ili ekkriis en unu spiro.

„Ĝi estas malnova kostumo de Madame Pompadour. Ŝi donacis ĝin al mi; antaŭe ĝi apartenis al ŝia filino.“

„Malnova! ĉu ŝi nomas ĉi tiun malnova? Ĝi estas sufiĉe bela por edziniĝonto!“

Destine subite ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ la junulinojn pli proksime de ŝi kaj anoncis per tonoj konfidencaj kaj vibrantaj kun profunda sentado:

„Tia mi baldaŭ estos — edziniĝonto! Fanchon! Adrienne! Suzanne! mi invitas vin ĉiujn al mia edziniĝa soleno!“

La eta grupo preskaŭ paralizigis pro ekscito kaj surprizo.

„Destine! ĉu vi intencas tion?“ ili ekkriis en unu spiro.

„Jes.“

„Kiam?“

„Nun, tuj post mia konfeso.“

Je tiu momento la Patrino Supera elvokis Destine, kiu rapide ekiris, sed subite ŝi returniĝis kaj impulseme, senvorte, rapide kisis ilin ĉiujn.

Ĉ A P I T R O * X X X

TALISMANO MIREGATA

Antaŭ ol iri al sia loko en la konsilejo je la unua tago post sia resaniĝo de la atenco, Louis okaze esploris oficialan raporton pri la agoj de la kronprinco dum la tri tagoj de lia aŭtoritato.

Lia Rega Moŝto legis la dokumenton, komence indifere, sed baldaŭ kun kreskanta intereso, dum li notis iujn alĝustigojn de aferoj, kiuj montris, ke la kronprinco plene profitis de la oportuna okazo, por fari, kiel plaĉis al li. La reĝo iom amuziĝis pri tiu neatendita individueco, kiun montris lia filo.

„Mia sekvanto ĝuis sian anticipan staton!“ li lakone diris, sed subite li batis la plankon per sia piedo.

„Ordonu al la kronprinco, ke li tuj venu ĉi tien. Li devas esti rememorigata, ke Louis XV-a ankoraŭ regas.“

La sinjoroj deĵorantaj tre volis scii, kiu aparta detalaĵo sur la listo tiel multe ekscitis la reĝan indignon, sed Louis ne informis ilin, kaj kiam oni anoncis la kronprincon, ili estis, je sia ĉagreno, forsendataj.

Solaj kune, kaj patro kaj filo estis silentaj dum momento, la kronprinco atendante, ĝis la reĝo parolos. Li ne devis atendi longe. Louis, sidante ĉe la skribtablo, kun la dokumento en sia mano kaj malama rigardo sur la frunto, eksplodis furioze kun veneno en sia voĉo.

„Ĉu mi estas reĝo de Francujo? Aŭ ĉu mi estas nur vermo sur la muro?“

La kronprinco kliniĝis antaŭen respekte, svingante sian ĉapelon ĝis la planko, dum li respondis:

„Mi salutas la reĝon.“

„Kiel vi kuraĝis, nuligi ordonon mian?“

„Al kiu ordono Via Reĝa Moŝto aludas?“

„Ĉi tiu inferna — hundo el la infero, grafo de Vrie!“

„Kun la permeso de Via Reĝa Moŝto, mi klarigos.“

„Kiel vi sciis pri la enkarcerigo de tiu viro?“

„Mi sciigis per hazardo.“

„Kiel vi sciis, kie li estas?“

„Oni informis min.“

„Kiel vi sciis, ke li vivas?“

„Tiu fakto venis kun la aliaj —.“

La kolero de Louis estis tiel fortega, ke li rifuzis atenti la respondojn de la kronprinco.

„Kiel, pro la nomo de l' satano, vi kuraĝis pardoni ĉi tiun kanajlon?“

„Via Majesto donis al mi la rajton.“

„Tiun rajton vi tre neĝuste uzis.“

„Mi bedaŭras, ke mi tiel ofendis vin.“

„Do, kial vi faris ĝin?“

„Mi trovis min konsciencie devigata agi, kiel mi agis —.“

„La diablo prenu vian konsciencon. Diru al mi, kiel kaj kiam kaj kie vi sciigis pri tiu kanajlo de Vrie? — ruza kaj glata kiel angilo — la morto ne povas kapti lin, kaj la reĝo ne povas retenigi lin!“

„Mi ekscii en la arbarego apud Meudon, kie okaze mi promenis, vestite per la inkognito de jezuita pastro, kiam —.“

„Malbenon al la jezuitoj!“ Louis deĵetegis la paperojn sur la tablon. „Mi havis nenion escepte de pastroj kaj preĝoj dum la pasintaj kvar tagoj! Kaj nun vi komencas pri via impertinenta konscienco! Mi ne aŭdos plu; ni malŝparas tempon. Tuj venigu du Berryier.“

Du Berryier estis policestro. Du Berryier baldaŭ venis kaj baldaŭ foriris kun ordono en sia poŝo, ke li sekvu la grafon de Vrie kaj rekaptu lin, kiom ajn da ĉevaloj, viroj aŭ mono li devos malŝpari.

Post tri horoj Louis, en la eta konsilejo, aŭskultis lace al parolado de la ĉefministro. La reĝo evidente estis en malbona humoro. Tia li jam estis dum la tuta mateno. Ne estis nur la sceno kun lia filo, kiu kaŭzis ĉi tiun staton; la kaŭzo, fakte, estis la posta efiko de lia lastatempa ekpieco. Klare li sentis ofendiĝon kontraŭ la mondo ĝenerale, la eklezio aparte, kaj eĉ la morto mem, ĉar per ĝi oni estis trompinta lin, ĝis li forsendis Pompadour. Kompatinda Pompadour! — li supozis, ke ŝi estas for; li ne riskis demandi.

Jes, Louis estis evidente malbonhumora, sed la ĉefministro kuraĝe daŭrigis sian paroladon. La sekretarioj diligente skribis notojn per siaj gratantaj flugilplumoj. La ĉefepiskopo de Parizo, kvankam atenta al la parolanto, samtempe sin okupis per sia flartabakujo, kiun li manipulis kun kortega gracio. Aliaj prelatoj kaj ministroj de l' ŝtato grupiĝis ĉirkaŭ la trono, kaj kiel fono por ĉi tiuj floroj de la regno, sidis en vicoj nobeluloj de diversa rango, kiuj efektive helpis tiom, kiom egala nombro de necesaj sed negravaj arbustoj.

Subite la pordo malfermiĝis kaj oni anoncis du Berryier.

La parolado de d'Argenson interrompiĝis. Louis avido demandis al la policestro, tuj enlasita:

„Vi havas novaĵon?“

„Jes, Via Reĝa Moŝto; oni kaptis la grafon de Vrie.“

„Bone!“ ekkriis Louis. Tiam, kun gesto de forsendo, li lakone ordonis: „Al la Bastille!“

„Sed, Via Reĝa Moŝto, mi devas informi vin plue, ke la grafo de Vrie estas akompanata de — virino.“

„De virino!“ La vizaĝo de Louis fariĝis plumbo-kolora. Fulmorapide li pensis pri la Pompadour. Ŝi iris kun de Vrie! tia estis ŝia maniero, ricevi sian forsendon!

Furiozo flamis en la reĝaj okuloj; la mano, kiu portis la sigelringon fermegiĝis kvazaŭ en ventkirlo de kolerego. Louis demandis neniajn demandojn. Li ordonis:

„Enkonduku ilin ĉe ni!“

Li intencis permesi, ke la Pompadour sentu unufoje la vipon de reĝa kolerego! Ŝi nepre trinkos la pokalon de humiliĝo antaŭ la tuta konsilantaro!

La ĵaluza kolero de Louis fortiĝis kaj pli furioziĝis en li, dum li konsideris la perfidecon de la Pompadour.

Silento de timo kaj konfuzo restis super ĉio en la ĉambro, ĉar la esprimo sur la vizaĝo de la reĝo estis tia, kia povus tremigi nacion. Li estis klinanta antaŭen, kun la mentono sur sia mano.

La pordo ree malfermiĝis kaj la malliberuloj eniris. La reĝo ne rigardis supren.

Romain marŝis antaŭen kun sintenado tre simila al tiu, kun kiu li elmarŝis tiun antaŭan tagon, kiam li ricevis la leteron de forsendo.

Destine ĉe lia flanko, sin apogante al lia brako, estis bildo plej alloga, tre pala, tre bela. Ĉiuj okuloj ŝin observis.

Fine la reĝo malrapide rigardis supren, liaj brovoj estis pezaj kun malamo. Li eksaltis, sin klinis antaŭen ekscitite, ree rigardis, tiam, kvazaŭ ellacigite pro mirego, li ĵetis sin malantaŭen, faligis la manojn sur la genuojn kaj ekkriis — mezavoĉe:

„Vi dioj! la protektatino de la Pompadour!“

Stranga varmo kaj ĝojo mildigis la koron de la monarĥo, dum li sentis ĉi tiun ŝajnan pruvon pri la sincereco de la Pompadour. Li murmuris al si kun kontenteco:

„Do Madame, post ĉio, restis fidela!“

Vi vidas, la talismano de la Pompadour estis bonfarantino, kvankam ĉiu el la maltrankviligita trio plej koncernata — Louis, Romain kaj la markizino de Pompadour — tute ne sciis tion.

La talismano mem opiniis, ke ĉio estas malĝusta, kaj apenaŭ povis kredi siajn proprajn orelojn, kiam, post paŭzo de danĝera necerteco, voĉo de la trono alparolis ŝin per tonoj de ekstrema ĝentileco.

„Ni ĝojas vidante vin, Mademoiselle.“

Tiam Romain parolis:

„Pardonu al mi, Via Reĝa Moŝto; ĉi tiu sinjorino estas mia edzino.“


Neniaj vortoj estus povintaj pli plaĉi al Louis. Kun reĝa svingo de la mano, li anoncis:

„Ni bonvenigas vian grafinon al Versailles. Kaj, ĉar vi montris tian bonegan guston je via elekto de edzino, vin — de Vrie — ni pardonas.

La historio kronikas, kiel tiun saman posttagmezon Louis, en reĝa pompo, vizitis la markizininon, Madame Pompadour, por ke la mondo povu sciigi, ke li ĝojas, ke ŝi restis en Versailles²⁴.

Post dek jaroj, kiam, pro sia influo, ĉiu jezuito en Francujo estis pelita el la reĝolando, iuj amikoj de la Pompadour rememoris la vortojn, kiujn ŝi eldiris je tiu memorinda tago de ŝia forsendo:

„Ni ankoraŭ vidos, kiu triumfos — la jezuitoj aŭ la Pompadour!“



HISTORIAJ NOTOJ

¹⁾ p. 8. Madame Pompadour naskiĝis la 29-an de Decembro 1721.

²⁾ p. 8. Oni nomis Madame Pompadour la „Poissonière“ (fiŝ-vendistino), ĉar la nomo de ŝia familio estis Poisson (fiŝo).

³⁾ p. 15. La monaĥinejon de Sankta Cyr fondis Madame de Maintenon. Ŝi estis iama Favoratino de Louis XV.

⁴⁾ p. 25. La Marquis de Livry ricevis sian leteron de ekzilo sammaniere, dum Louis XV. petis lin, ke li ne estu malfrua ĉe la ĉefmango.

⁵⁾ p. 47. La noto, ke Louis sendis la Grandan Falkiston por vidi, ĉu estas nove fositaj tomboj en la apuda tombejo, estas aŭtentika.

⁶⁾ p. 58. Monsieur de Marigny havigis al si la nomon kaj titolon per la influo de sia fratino Madame de Pompadour. Ŝi ĉiam favoris siajn parencojn.

⁷⁾ p. 63. Voltaire je tiu tempo pasigis la plejparton de sia tempo en Sanssouci kun Frederiko la Granda, sed li estis, kiam li estis en Parizo, tie kutima gasto ĉe Madame Pompadour, do, priskribo de ŝia salono sen li ne estus tute kompleta.

⁸⁾ p. 87. La kvin herezaj frazoj pretenditaj, esti en la libro de Jansen, estas jenaj:

1. Estas diaj ordonoj, kiujn bonaj viroj, kvankam volonte, ne povas obei; kaj la Dia graco, per kiu ĉi tiuj ordonoj estas eblaj, ankaŭ mankas.
2. Neniu en la stato de falinta naturo povas kontraŭstari eternan Dian gracon.
3. Fari la agojn de la homa gento meritplenaj aŭ alie havigi al si liberecon de neceso, ne estas postulata; sed nur libereco de sindeteno (estas postulata).
4. La Semi-Pelagianoj, dum ili konfesas la neceson de evitiga Dia graco, aŭ Dia graco antaŭ ĉiuj agoj, estis herezuloj, pro tio ke, kiel ili diris, ĉi tiu Dia graco estas tia, kian homo povus, laŭ sia propra volo, aŭ kontraŭstari aŭ obei.

5. La Semi-Pelagianoj ankaŭ eraris, dirante, ke Kristo mortis aŭ elverŝis sian sangon, por savi ĉiujn homojn universale.

(Estis verŝajne, ke la jezuitoj originale prezentis ĉi tiujn frazojn nur kiel enkorpiĝon de la esencaj doktrinoj de la libro de Jansen, kaj ne pro la ideo, ke oni akceptos ilin kiel laŭvortaj. Vidu „Historio de la Jezuitoj“, de Nicolini, p. 233.)

⁹⁾ p. 108. La kunveno de la parlamento de Parizo, kun la reĝo ĉeestanta, okazis je la 13-a de Decembro 1756, — kaj nur je la antaŭa tago Louis subite decidis pri ĝi.

¹⁰⁾ p. 108. Preskaŭ la tuta parlamento estis ekzilita. (Vidu „La Cour de Louis XV-a“, de Emile Campardon, p. 179.) La reĝo revokis la ekzilitojn post ses monatoj kaj la parlamento rekomencis funkcii la 1-an de Septembro 1757.

¹¹⁾ p. 134. La altiĝo de Madame de Pompadour, ĝis la pozicio de korteganino por la reĝino en 1756, estis granda triumfo. Ŝia ĵurinta malamiko — la aroganta kaj severa Madame de Luynes — estis devigata, fari la ceremonion, prezenti ŝin en tiu nova ofico al la reĝino.

¹²⁾ p. 145. Madame du Hausset malkaŝe kaj kun esprimo de bedaŭro rakontas la profiton, kiun ŝi ricevis, aŭskultante en tiu kamero malantaŭ la alkovo. (Vidu „Memoires de Madame du Hausset“.)

¹³⁾ p. 155. Ŝajnas nekredible, ke oni permesis al komercistoj, proponi siajn komercaĵojn en la koridoroj de Versailles, sed Walpole tiel atestis — kaj ankaŭ li atestis pri la trablovemeco de la loko.

¹⁴⁾ p. 155. Biografioj de tiu tempo abunde konfirmas la rakontojn, ke Lebel kutimadis, kaŝe enkonduki junulinojn en la privatan ĉambron de Louis.

¹⁵⁾ p. 157. La peno, mortigi la reĝon, okazis je la 7-a de Januaro 1757, kvankam kelkaj kronikoj notas la daton de la 5-a de Januaro.

¹⁶⁾ p. 160. Ĉi tiun privatan ŝtuparon oni poste fermis per muro.

¹⁷⁾ p. 163. Damiens estas torturita ĝis morto per kvar ĉevaloj, jungitaj al liaj membroj. Ĉiu ĉevalo tiris lin laŭ malsama direkto. Granda popolamaso vidis ĉi tiun teruran spektaklon.

¹⁸⁾ p. 166. La sangohundo, Mars, ĉiam dormis sub la lito de Louis. (Vidu „Memoires“ — Comte Dufort.)

¹⁹⁾ p. 167. La kronprinco regis dum tri tagoj. (Vidu „La Cour de Louis XV-a“, Campardon, p. 192.)

²⁰⁾ p. 169. D' Argenson estis tiu, kiu unue estis komisiita, por informi Madame Pompadour pri ŝia forsendo, sed li lerte transmetis la malagrablan taskon al Machault.

²¹⁾ p. 173. Sole pro la ĝustatempa konsilo de Madame de Mirapoix la Favoratino savis sin de elpelo el Versailles. (Vidu „La Cour de Louis XV-a“, Campardon, p. 194.)

²²⁾ p. 174. Kelkaj verkistoj raportas, ke la jezuitoj instigis la atencon kontraŭ la vivon de la reĝo; la plimultaj tamen opiniis, ke Damiens estis nur senresponda viro. Ĉiuj aŭtoritatoj konsentas, ke estis nenia ebleco, ke Damiens estus povinta mortigi la reĝon per la poŝtranĉilo, kiun li uzis.

²³⁾ p. 177. Estis kutimo de la kronprinco, rondiri inter la malriĉaj kaj malsanaj homoj, vestita kiel jezuita pastro.

²⁴⁾ p. 203. Post sia akcepto en Versailles, kiel korteganino al la reĝino, Madame Pompadour neniam reiris al Bellevue. Fajro detruis tiun kasteleton dum la „Commune“; nur la ĉevalejo ankoraŭ staras. La markizino, Madame de Pompadour, mortis pro ftizo en Versailles, la 15-an de Aprilo 1764, havante 42 jarojn.



Aliaj verkoj tradukitaj de

EDWARD S. PAYSON

*

1. **Mabel Wagnalls** „La Rozujo ĉiumiljara“
2. **Mabel Wagnalls** „Miserere“
3. „La Akrobato de Nia Sinjorino“ (aŭtoro nekonata)
4. **Ossip Schubin** „Blanche, La Virgulino de Lille“
5. **J. U. Giesy** „Mimi“, Rakonto pri la Latina Kvartalo dum la milito
6. **John Bennet** „Sinjorino Margot“, Groteska Legendo Pri Malnova Charleston
7. **Anatole France**, „Thais“


La n-roj 1, 2, 4, 7 estas presitaj ĉe Ernest Fairman Dow,
West Newton, Mass.

N-ro 5 ĉe la Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street,
London W. C. 1

N-ro 3 eldonita de l' tradukinto

N-ro 6 ankoraŭ ne presita

104 473
Esp.



104473